



*Rusoj loĝas en Rusujo: landonomoj en Esperanto*  
© Anna Löwenstein 2007

Unua eldono: junio 2007

Redaktoro: Anna Löwenstein  
Kovrilo: Fabiano Corsetti

FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA  
Via Villoresi 38  
20143 Milano  
Italujo  
*fei@esperanto.it*

# Rusoj loĝas en Rusujo

landonomoj en Esperanto

*redaktis:* Anna Löwenstein

FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA



# Enhavo

Antaŭparolo: Estas malfacile helpi Zamenhof-on.  
- *Renato Corsetti* 1

Kial mi favoras *-ujo* - *Anna Löwenstein* 4

El nepublikigita korespondaĵo de LLZ - *Paul Gubbins* 10

La landnoma sufikso *-ujo* en instruado - *Bertilo Wennergren* 13

Nefikcie el la vivo de japana esperantisto - *Tacuo Huĝimoto* 23

Reago al *Paŝo al Unueco de Nia Landnomaro*  
de d-ro A. Albault - *Edwin de Kock* 26

Io en ujo - *Blazio Vaha* 31

Pri landnomoj - *M.C. Butler* 32

Nia fundamente perfekta lingvo - *Brunetto Casini* 47

« La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo. »  
- *Francisko Simonnet* 48

Kamikazoj loĝas en Kamikazujo! - *Petro Desmet'* 56

*-i-* minacas la kernan strukturon de Esperanto  
- *Rudolf Fischer* 58

*-ujo:* finaĵo plej bela - *Jorge Camacho* 62

Ni metu *-ion* en la ujon! - *Marcel Leereveld* 63

*Francujo* trovas lokon en mia koro - *Fra Gaeta* 64

Esperanto, lingvo de paco kaj toleremo - *Franciska Toubale* 65

La Esperantaj landnomoj tamen kontentigaj - *Edwin de Kock* 66

Tankae pri *uj* - *Tacuo Huĝimoto* 72

Instrui la landonomojn - *Anna Löwenstein* 74

Landonomoj en Esperanto: instrumaterialo por la Cseh-kurso  
- *Anna Löwenstein* 78

Mi havis sonĝon - *Luiĝi Rokamoriĉe* 82

Kiu estas pli facila? : lingvo-ekzerco 83

*Ujo-* kaj *io-*formoj por la nomoj de regionoj

Ekzemplo: La nomoj de la federaciaj landoj en Germanujo

- *Rudolf Fischer* 85

Listo de landoj kaj landanoj - kompilis *Bertilo Wennergren* 89

Promeso 94

## Antaŭparolo

# Estas malfacile helpi Zamenhof-on.

Renato Corsetti

La longa historio de Esperanto montras, ke estas ekstreme facile malfaciligigi Esperanton kaj ege malfacile plibonigi ĝin.

La temo de ĉi tiu libro estas ekzemplo, unu el la grandaj ekzemploj, pri tio. Zamenhof kreis sistemon de land-nomoj ne perfektan sed uzeblan, kaj certe la plej bonan, kiun li povis elpensi en sia tempo. Bedaŭrinde tuj je la apero de la lingvo oni provis ne uzi ĝin laŭ la plej bona maniero ebla, sed ŝanĝi ĝin laŭ la ideologiaj kaj aliaj preferoj de la ŝanĝanto: ŝtatoj ne ekzistu, do ni certe forigu la finaĵon *-ujo*; la sono *uj* ne estas eltenebla por francoj; ne ekzistas belgoj sed nur flandroj kaj valonoj; Aristotelo parolis pri la lando *Egipto* kaj ne pri *Egiptujo*; ktp.

Aliflanke neniu provis simpligi la kelkajn verajn malfacilaĵojn: la paron *Skotlando/Nederlando*, ks. Neniu demandis sin kiel plej klare prezenti la sistemon al ĉinoj, japanoj kaj al parolantoj de aliaj ne-eŭropaj lingvoj, kiuj solvas ĉi tiun problemon en maniero tre pli simpla kaj logika.

La samo okazis en pluraj aliaj kampoj de la lingvo. Pensu nur pri la troigita demando pri *ata/ita*, per kiu oni penis montri sian klarecon pli ol teni la sistemon uzebla por “normalaj” homoj. Pensu pri la vort-trezoro, en kiu al neanalizeblaj vortoj aldoniĝas neanalizeblaj finaĵoj, malgraŭ tio, kion Zamenhof tre klare skribis: "Mi aranĝis plenan dismembriĝon de la ideoj en memstarajn vortojn..."<sup>1</sup>. Se vi volas pli malgrandajn ekzemplojn, pensu pri la nealdono de la demanda vorto *ĉu* komence de frazoj. Oni ne faras tion en kelkaj eŭropaj lingvoj, do, kial fari tion en Esperanto? Kaj kio pri la japanoj, kiuj ne konas la eŭropan demandan fraz-melodion? Ili iru al la infero (tion ne diras, sed pensas la uzantoj de tiu ellaso)! Pensu pri la

---

<sup>1</sup> El *Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto*, 12a eldono. Parizo: Esperantista Centra Librejo, 1929, p. 248.

ĉarma escepto *dank' al*, kiun oni provas defendi per sia vivo, ĉar ĝi estas tiel potence pruva pri tio, ke Esperanto vivas kaj kapablas produkti esceptojn kiel veraj naciaj lingvoj.

Miaflanke mi opinias, ke la plej bona decido farita dum la tuta historio de Esperanto estis la akcepto de netuŝebla Fundamento, kio malebligis (aŭ almenaŭ malpliigis) senkonkludajn lingvajn debatojn, kaj permesis al ĉiuj fosi sian sulkon. Sen tio la historio de Esperanto ne estus estinta malsimila ol la historio de aliaj planlingvoj, kiuj neniam transformiĝis al vere parolataj lingvoj.

Ni povus debati tra la tuta eterneco, sed vi ne konvinkus min ke la radiko *libr-* estas pli bela ol la radiko *kitab-*, nek mi konvinkus vin, ke la radiko *kurt-* estas duoblaĵo por *mallong-*. Kaj cetere niaj solvoj, kiel montras ĉi tiu libro pri unu el la demandoj, ne estus pli bonaj ol tiuj de Zamenhof. Li havis senton kaj intuicion, kiujn multaj el ni tute ne havas.

Aliflanke nun multaj opinias, ke la situacio de Esperanto estas tute alia ol la situacio en la jaro 1905-a, kiam oni bezonis la Fundamenton. Nun, oni argumentas, Esperanto jam venkis. Ĝi estas lingvo parolata de granda komunumo; tial estas nature ke ĝi evoluigu siajn apartajn formojn kaj iĝu tiom malregula kiom la parolanta komunumo postulas. Nia rolo estas nur registri tiujn formojn.

Ni povas nomi tiujn esperantistojn “jam-venkistoj” laŭ la konata vorto “fin-venkistoj”. Finvenkistoj estas la homoj, kiuj ne povos ripozi ĝis Esperanto estos ĉies dua lingvo, instruata en la elementaj lernejoj de Tajlando kaj de Belgujo. Jamvenkistoj estas la homoj, kiuj diras, ke Esperanto jam venkis, kaj ke sekve ni ne bezonas fari ion, por ke ĝi disvastiĝu. Ni lasu tion al la ridindaj finvenkistaj zelotoj. Ni ĝuu ĝin kaj klopodu helpi Zamenhof-on, igante la lingvon pli lingveca laŭ la ekzemplo de niaj (eŭropaj) lingvoj, certe ne de la ĉina. Se tio igas ĝin malpli regula, tio ne estas nia zorgo. Finfine ne estas ni, kiuj renkontas la neesperantistojn kaj provas instrui ĝin al ili.

Mi kredas, ke la jamvenkistoj devus fari de tempo al tempo ion humilan. Ili rezignu pri siaj esperantologiaj konferencoj, kies celo estas montri, ke en Esperanto oni povas uzi grekajn vortojn same bone kiel en la franca; kaj ili iru instrui Esperanton al veraj komencantoj ie ajn en la mondo, prefere ekster Eŭropo. Tiam ili provu respondi la demandon, kial skotoj loĝas en Skotlando sed



nederroj ne loĝas en Nederlando. Mi volas nur diri, ke de la lernantoj venas la postulo pri simpleco kaj kohereco en la kadro de la lingvo. Nia tasko, la tasko de la spertuloj pri la lingvo, estas respondi tiujn petojn; ni ne faru ion, kio igas la lingvon pli malfacila kaj pli malregula por, ekzemple, indonezianoj, simple por igi ĝin surface pli simila al la angla aŭ al la latinidaj lingvoj.

Mi mem opinias, ke Esperanto estas ankoraŭ tre malproksima de sia celo: ĝenerala uzo en la mondo kiel justa dua lingvo. Tial nia tasko estas teni ĝin lerninda. La kialoj por lerni Esperanton kaj ne unu el la grandaj naciaj lingvoj estas ĝia justeco, ĝia idea valoro, kaj samtempe ĝia facileco.

Kalman Kalocsay en sia poemo *En amara horo* diras:

*Ho, jen vi, Esperanto! Ne glora kaj fiera,  
Nur orfa, senpotenca, senforta, senmatura,  
Svenema kaj senhelpa kaj - eble - senespera,  
Sed nobla, blanka, klara kaj senmakule pura.<sup>2</sup>*

Io ajn farata por malfaciligi la vojon de la eble senespera Esperanto, estas io ne aprobinda, por diri la aferon milde. Tion, laŭ mi, provas fari tiuj, kiuj opinias ke Esperanto devas “riĉiĝi” je novaj formoj, kiujn ili mem kreas, tamen ne havante la intuicion de Zamenhof.

Tamen en la lastaj tempoj mi vidas ankaŭ signojn de reveno al la simpleco de la Fundamento (ekzemple per la lastatempaj iniciatoj reeldoni la Fundamenton rete kaj prese). La kvanto da kontribuintoj al ĉi tiu libro montras, ke malgraŭ ĉio multaj esperantistoj eliras el la ebriiĝa fazo, kiu regis en la antaŭa periodo.

Sukceson al ĉi tiu libro, kiu celas paroli al la menso de esperantistoj!

---

<sup>2</sup> La poemo estas reproduktita en la libreto *El streĉita kordo*, eldonita de Hungara Esperanto-Asocio.

## Kial mi favoras -ujo

Anna Löwenstein

*Por lernantoj, Esperanto ŝajnas tre facila lingvo - ĝis ili atingas la lecionon pri landonomoj. Subite ili baraktas en konfuza marĉo, en kiu eŭropaj landoj havas unu formon, ekstereŭropaj alian - tamen kun pluraj esceptoj. Ĉu ili ne lernis, ke en Esperanto ne ekzistas esceptoj? Landoj, kies nomoj ŝajnas preskaŭ samaj (Ĉinio, Ĉilio), tamen havas tute malsamajn nomojn por la loĝantoj (ĉino, ĉiliano).*

*Al tiu konfuzo aldoniĝas la fakto, ke dum la plejmulto da esperantistoj finas landonomojn per -io, aliaj preferas la finaĵon -ujo. Kiam mi mem lernis Esperanton, la du finaĵoj estis same popularaj; verŝajne -ujo estis pli uzata, kvankam sendube la situacio variis de lando al lando. En la sepdekaj jaroj mi laboris en la Centra Oficejo de UEA, kie parto de la oficistoj uzis -ujo, kaj parto -io. Tiu situacio speguliĝis en la eldonaĵoj de la asocio; en la Jarlibro oni tiutempe uzis -ujo, sed en la revuo Esperanto -io. Simila divido aperis tra la tuta Esperantogazetaro. Praktike la du formoj pace kunvivis.*

*Mi lernis uzi -ujo, kaj mi plu uzas ĝin. Mi neniam vidis kialon por ŝanĝi, same kiel mi ne vidas kialon ŝanĝi aliajn sufiksojn: lerninte la sufikson -ulo, ekzemple, ĉu oni rajtas laŭ sia bontrovo decidi, ke la sufikso prefere estu -uo? Sed kiel -ujo-uzanto mi sentas min pli kaj pli sieĝata: de redaktoroj kiuj devige ŝanĝas miajn tekstojn, de artikolantoj kiuj informas (senbaze) ke la finaĵo -ujo malaperis, kaj de verkantoj de lernolibroj, kiuj eĉ ne mencias la ekziston de la -uj-finaĵo, aŭ aperigas ĝin nur en piednoto kiel arĥaikaĵon.*

*Mi ankoraŭ insistas pri -ujo, parte ĉar mi neniam sentis neceson ŝanĝi mian kutiman parolmanerion, sed plejparte ĉar laŭ mi la finaĵo -io kondukas al granda konfuzo kaj malreguleco en la landonoma situacio. Kial? Nu, miajn argumentojn mi klarigis jam antaŭ dek jaroj, en artikolo aperinta en La Kancerkliniko en 1996. Ĉar tiu artikolo ŝajnas al mi ankoraŭ inter la pli simplaj enkondukoj al la temo, mi invitas legantojn de ĉi tiu libro komenci per ĝi.*

Artikolo unue aperinta en La Kancerkliniko, n-ro 79, julio-septembro 1996.

Neniu povas nei, ke la sistemo de landonomoj en Esperanto estas la plej malkontentiga parto de la tuta lingvo. La sola maniero komplete solvi la problemon nun estus forviŝi la tutan sistemon kaj rekomenci. Almenaŭ teorie. Kiel ni ĉiuj scias, neniu nova propono iam ajn estos akceptita de la tuta esperantistaro. La sola praktika sekvo de tia propono estus aldoni kvaran aŭ kvinan sistemon al la pluraj kiuj jam konkurencas inter si. Tial estas malutile elpensi drastajn modifojn kaj reformojn; prefere ni retenu la ekzistantan sistemon, uzante ĝin laŭeble konsekvence.

Tradicie la landonomoj estas dividitaj en du kategoriojn. Ĉe la unua, la simpla radiko donas la nomon de la loĝantoj (ekz. *brito*, *turko*), kaj por atingi la landonomon necesas aldoni *-ujo* aŭ *-io* (*Britujo/Britio*, *Turkujo/Turkio*). Ĉe la dua kategorio, aliflanke, la simpla radiko donas la landonomon (ekz. *Kanado*, *Maroko*) kaj per la finaĵo *-ano* oni akiras la nomon de la loĝantoj (*kanadano*, *marokano*). Por simpligi la postan diskuton, mi prezentos la du kategoriojn per tabelo:

	Landonomo	Loĝanto
I	<u>Radiko + -ujo (-io)</u> <i>Franc-ujo (Franc-io)</i> <i>Japan-ujo (Japan-io)</i> <i>Egipt-ujo (Egipt-io)</i>	<u>Radiko + -o</u> <i>franc-o</i> <i>japan-o</i> <i>egipt-o</i>
II	<u>Radiko + -o</u> <i>Kub-o</i> <i>Israel-o</i> <i>Peru-o</i>	<u>Radiko + -ano</u> <i>kub-ano</i> <i>israel-ano</i> <i>peru-ano</i>

La adjektivon, cetere, oni ĉiam derivas rekte de la radiko, do de la loĝantonomo ĉe kategorio I, kaj de la landonomo ĉe kategorio II: *franca*, *japana*, *egipta*, *kuba*, *israela*, *perua*.

Ĝis tiu punkto, neniu problemo. Sed ni ankoraŭ ne konsideris la finaĵon *-lando*. Ni rigardu kelkajn ekzemplojn. *En Skotlando loĝas skotoj, en Pollando loĝas poloj, en Finnlando loĝas finnoj, en Nederlando loĝas nederoj, en Islando loĝas...* Evidente io ne estas en ordo. Fakte la landonomoj kiuj finiĝas per *-lando* apartenas jen al la kategorio I, jen al la kategorio II. Mi prezentos ilin denove per tabelo:

	<b>Landonomo</b>	<b>Loĝanto</b>
I	<i>Skot-lando</i>	<i>skot-o</i>
	<i>Pol-lando</i>	<i>pol-o</i>
	<i>Finn-lando</i>	<i>finn-o</i>
	<i>Svis-lando</i>	<i>svis-o</i>
	<i>Dan-lando</i>	<i>dan-o</i>
II	<i>Nederland-o</i>	<i>nederland-ano</i>
	<i>Island-o</i>	<i>island-ano</i>
	<i>Irland-o</i>	<i>irland-ano</i>
	<i>Novzeland-o</i>	<i>novzeland-ano</i>

Kiel oni vidas, ĉe la kategorio I, la finaĵo *-lando* estas sufikso, kiun oni forigas por atingi la nomon de la loĝantoj. Praktike, do, ĝi anstataŭas *-ujo/-io*. Ĉe la kategorio II, aliflanke, ĝi estas parto de la radiko.

Kion fari pri tiu malregulaĵo? Ĉu devigi novajn esperantistojn lerni listojn de landonomoj, arbitre dividitaj en du grupojn, kaj fari ekzercojn por asigni ilin al la ĝusta kategorio? Tiaj ekzercoj okupas multajn studohorojn dum la lernado de naciaj lingvoj, sed oni ĉiam supozas, ke ili ne necesas por Esperanto.

Ĝenerale, kiam temas pri la kategorio I, la alternativaj formoj en *-ujo/-io* ja estas uzataj, se malpli ofte ol tiuj en *-lando*. Mi certe aŭdis ekz. *Skotujo, Polujo* kaj *Svisujo*. Tial ŝajnas al mi preferinde uzi tiujn formojn, kaj rezervi la uzon de *-lando* por la dua grupo, kie ĝi estas esenca parto de la radiko.

Samaj konsideroj validas por la malpli ofta finaĵo *-stano*. *Pakistano* certe apartenas al la kategorio II; ĝiaj loĝantoj

nomiĝas *pakistananoj*. Pri *Afganistano* kaj *Uzbeĥistano*<sup>3</sup>, por ne menciigi *Kazaĥistanon* kaj aliajn, mi estas malpli certa. Ĉu asigni ilin al la unua grupo, laŭ kiu la loĝantoj nomiĝas *afganoj*, *uzbeĥoj* ktp? En tiu kazo la landoj pli logike nomiĝus *Afganujo* (aŭ *-io*) kaj *Uzbeĥujo (-io)*. Aŭ ĉu estas preferinde asigni ilin al la dua grupo kaj nomi la loĝantojn *afganistananoj* kaj *uzbeĥistananoj*? Plia malregulaĵo cetere troviĝas en la fakto, ke la sufikso en Esperanto estas foje *-stano*, foje *-istano*.

Nun ni turniĝu al la disputveka demando pri *-io*. Konsideru la jenajn parojn: *Ĉinio/Ĉilio*, *Aŭstrio/Aŭstralio*. La landonomoj aspektas similaj, sed la nomoj de la loĝantoj estas formataj laŭ tute malsamaj principoj: *ĉino/ĉiliano*, *aŭstro/aŭstraliano*. Mallonge, la nomoj kiuj finiĝas per *-io*, same kiel tiuj kiuj finiĝas per *-lando*, povas esti asignitaj jen al la kategorio I, jen al la kategorio II:

	Landonomo	Loĝanto
I	<i>Ĉin-io</i>	<i>ĉin-o</i>
	<i>Aŭstr-io</i>	<i>aŭstr-o</i>
	<i>German-io</i>	<i>german-o</i>
	<i>Bulgar-io</i>	<i>bulgar-o</i>
	<i>Eston-io</i>	<i>eston-o</i>
II	<i>Ĉili-o</i>	<i>ĉili-ano</i>
	<i>Aŭstrali-o</i>	<i>aŭstrali-ano</i>
	<i>Siri-o</i>	<i>siri-ano</i>
	<i>Niĝeri-o</i>	<i>niĝeri-ano</i>
	<i>Kolombi-o</i>	<i>kolombi-ano</i>

Oni vidas, ke la *-i-* de la finaĵo havas tute malsaman funkcion en la du kategorioj. Ĉe la unua, ĝi rolas kiel sufikso, alternative al *-uj-*. Ĉe la dua, aliflanke, ĝi ne havas gramatikan funkcion, sed estas parto de la radiko. Tial, kiel ĉe *-lando*, mi preferas

<sup>3</sup> Mi tute ne memoras kial, verkante ĉi tiun artikolon antaŭ pli ol dek jaroj, mi decidis uzi la formojn *Uzbeĥistano* kaj *uzbeĥo*. Nun mi certe skribus tiujn vortojn kun *k*, ne *ĥ*.

rezervi la finaĵon *-io* por la dua kategorio, kaj uzi ĉe la kategorio I nur la finaĵon *-ujo*.

Kiel vidite, mia prefer pri *-ujo* super *-io* baziĝas tute sur formaj kialoj, kaj neniel rilatas al ĝia signifo. Sed mi konscias, ke por multaj esperantistoj la problemo prezentiĝas alie. Zamenhof klarigis (en *Lingvaj Respondoj* n-ro 18 B), ke la nomoj de la malnovaj landoj estas derivitaj de la nomo de la ĉefa gento kiu okupas ilin. La “malnovaj landoj” por li estis la eŭropaj, plus kelkaj afrikaj kaj aziaj kiuj sukcesis trafi la konscion de la eŭropanoj de tiu epoko: Egiptujo, Arabujo, Etiopujo, Hindujo, Ĉinujo, Japanujo. Krom la koreoj, kiuj asertas sian rajton esti konsiderataj samrangaj kiel la ĉinoj kaj japanoj, la esperantistoj praktike akceptis kaj pluakceptas tiun arbitran dividon de la mondo.

Ankoraŭ disputveka, tamen, estas lia aserto ke la landonomoj kun *-ujo* baziĝas sur gentonomoj. Inter la etnokonsciaj esperantistoj, tia klarigo estas nepreterlasebla invito al sinfinaj diskutoj. Kiam mi estis redaktoro de la Jarlibro (kiu tiutempe ankoraŭ uzis *-ujo*), belgo skribis por argumenti, ke ne ekzistas belgoj, sed flandroj kaj valonoj, kaj do ne havas sencon nomi la landon *Belgujo*. Tial li proponis, ke en la Jarlibro oni uzu la formon *Belgio*. Tiaj proponoj povas nur malfaciligi la lingvon kaj krei malregulaĵojn, kiuj ne ekzistis antaŭe.

La fakto estas, ke la romantikaj argumentoj de Zamenhof pri la rilato inter lando kaj gento estis same senbazaj kiel lia divido de la landoj laŭ du kategorioj. Se ne ekzistas belgoj, same ne ekzistas svisoj aŭ hispanoj aŭ britoj, kaj pro la samaj kialoj. Eĉ popolo kiel la italoj, kiu deekstere ŝajnas geografie, politike, rase kaj lingve homogena, en la realeco tute ne estas tia. Italujo fariĝis unuiĝinta ŝtato nur dum la pasinta jarcento<sup>4</sup>, kaj ĝia lingvo estas artefarita kreaĵo. Kaj kiuj estis tiuj mitaj italoj, kiuj donis sian nomon al la lando? Temis pri historie sensignifa tribo de la antaŭromia epoko, kiu loĝis en la suda parto de la lando, dum la cetero estis dividita inter deko da aliaj multe pli gravaj popoloj, inter kiuj estis la latinoj kaj la etruskoj.

Ne ŝajnas al mi, ke oni ĝustigas la situacion se oni forigas *-ujo* kaj anstataŭigas ĝin per la dubinda *-io*. Prefere ni konstatu ke

---

<sup>4</sup> Evidente temas pri la 19a jarcento!

estas senutile paroli pri “gentoj” aŭ “popoloj” en ĉi tiu kunteksto kaj pensu nur pri “ŝtatoj”. Tiel ni povos trankvile pluparoli pri la norvegoj en Norvegujo, la hungaroj en Hungarujo kaj la koreoj en Koreujo, sen la neceso unue fari kompletan analizon de la historio, politiko kaj etna konsisto de la koncerna lando. (Tio kompreneble ne malhelpus nin paroli ankaŭ pri subgrupoj, kiuj estas civitanoj de alia ŝtato, ekzemple svedoj loĝantaj en Finnujo, germanoj en Italujo ktp.)

Mi ofte suspektas, tamen, ke se multaj esperantistoj preferas la formon kun *-io* anstataŭ *-ujo*, iliaj argumentoj pri gentoj kaj popoloj estas nur preteksto. Ĉu la vera kialo ne estas ke *Svedio*, *Rumanio*, *Rusio* ktp. aspektas pli similaj al la nacilingvaj formoj ol *Svedujo*, *Rumanujo* kaj *Rusujo*? Mi agnoskas, ke la finaĵo *-ujo* (same kiel la supersignoj) povas aspekti strange al alilingvanoj. Tio en si mem ne ŝajnas al mi sufiĉa kialo por ŝanĝi ĝin. Esperanto delonge estas memstara lingvo kun sia propra interna logiko, kaj ni ne bezonas adapti ĝin pro la antaŭjuĝoj de neinformitaj eksteruloj.

Zamenhof mem iugrade faris tion kiam li akceptis la koncepton de dukategoria sistemo laŭ la modelo de la naciaj lingvoj. Estas nun klare, ke per tiu decido li ne solvis la problemon de la landonomoj; male li kreis novan, kiel atestas la lavango da artikoloj, polemikoj, proponoj kaj kontraŭproponoj rilate al tiu temo.

En la komenco, ŝajne, Zamenhof intencis havi unuecan sistemon, laŭ kiu ĉiuj landonomoj finiĝus per *-ujo*, tiel ke oni parolus eĉ pri *Brazilujo* kaj *Ĉilujo*. Alivorte, ĉiuj landoj apartenus al la kategorio I. (Mi bedaŭras, ke li ne proponis anstataŭe ĝeneraligi la kategorion II, tiel ke ni nun parolus pri *Brito/britano*, *Franco/francano*, *Svedo/svedano*, *Italio/italiano* ktp.) Tamen li decidis rezigni pri tiu unueca sistemo por transiri al alia, malpli logika sed pli simila al tiu de la nature evoluintaj lingvoj. Farante tion, li enprenis ankaŭ la malregulaĵojn, kiuj karakterizas tiujn lingvojn, sed kiuj neniam devus trovi lokon en lingvo kiel Esperanto.

Ne estas eble nun forigi tiun dukategorian sistemon. Ni nur povas fari nian eblon por kompreni kiel ĝi funkcias, strebante apliki ĝin ĉiam regule kaj konsekvence.

## El nepublikigita korespondaĵo de LLZ

*Aldonas Paul Gubbins: La jenajn foliojn, nur pene deĉifreblajn, kaj evidente ne kompletajn, mi trovis inter la paĝoj de unua eldono de la Fundamento de Esperanto en Biblioteko Butler, Barlastono, Britujo. Sen-dataj, vermovoritaj kaj disfalemaj, ili ŝajne devenas de la 19a jarcento. Almenaŭ laŭodore. Pri ajnaj transskribaj eraroj kulpas mi.*

... nun preskaŭ preta, kaj ankoraŭfoje mi dankas pro via fidela kaj ĉiel fidinda subtenado. Sen vi, ho granda forto mistera, mia lingvo universalana ne estus atinginta la stadion, kiun ĝi fakte atingis. Sed, ho ve (kaj pardonu al patro, almenaŭ al patriĝonto, iom da orgojlo antaŭ la nasko de lia longe sopirata ido), sed de tempo al tempo mi kredas mian lingvon universalan tro perfekta. Mi timas, ho lumo de l' malluma mondo, ke la homaro, vidante ion senmakulan, vere genian (via estas la genio, ho spiro de l' inspiro, mia nur mano plumon tenanta), taksos ĝin artefarita, netuŝebla, iel dia kaj pia.

Al la homaro, kaj tion mi forte bedaŭras, ne plaĉas perfekteco: en ĝia ankoraŭ nematura stato ĝi preferas pekulon al sanktulo, malbonulon al bonulo, vinon al akvo. Sed - mil pardonojn! Ankaŭ vi, mi kredas, en via ĉiela paradizo, vinon preferas. Aŭ ĉu lakton? Mi ne plu memoras: laca mi estas. Tre laca. Sed mi esperas, ke tiel kapteblas la esenco de mia argumento. Resume: ĉu eblus iel makuleti la lingvon universalan, por ke la homaro akceptu ĝin kiel ion neperfektan, do ion normalan kaj ĉiutage - ne sole ŝabate - alireblan?

Respondon senspire atendas via surtera sentalentulo,

via  
LLZ



PS. Ne necesas poŝtrevene respondi. Sendube pli urĝaj aferoj vian atenton meritas. Ekzemple la milito en ... [nedeĉifreble] ... danka, se vi povus malaltigi je kelkaj kopekoj la koston de terpomoj. Ankaŭ pano terure ... [nedeĉifreble] ...

Mia altrespektata amiko,

pro via lasta skribaĵo mi sincere dankas. Pri la florbrasikoj, la terpomoj, la pano kaj la malvarmumo de via patrino mi faros mian plejebulon. Tamen bonvolu memori, ke ankaŭ ĉiopotenco siajn limojn konas kaj mi ne tiom junas kiom antaŭe. Sed krom la menciitaj florbrasikoj, kaj tiel plu, viaj vortoj min profunde emociigis, aparte viaj zorgoj pri perfekteco. Mi, ekzemple, estas la plej perfekta estaĵo, tamen ĉu min respektas homaro pekema? Supraĵe, jes: la adeptaro vizitadas preĝejojn, moskeojn, templojn, sed ĉu ĝi kondukas laŭ mia principaro? Neniel! Kiel diros Auld (vin li ne konas, kara, almenaŭ ne ĝis la postvivo): "kaj nia sankta dev' dekretas / mortigi en nom' de civilizo ..." sed, pardonon, mi deflankiĝas (lastatempe pli kaj pli: kulpas tiu fiulo Alzheimer, unu el miaj malplej agrablaj kreitaĵoj).

Sed, jes. Vi pravas. La homaro preferas diablojn, ne diojn. Do nian lingvon universalan - mi dankas pro la komplimento pri *nia* lingvo, kara, sed mi timas, ke estontece nur vin kreinto oni agnoskos, ne min - la lingvon ni diablighos. La unuaj paŝoj al plena malposedo (eta ŝerco mia, kara: iam vi komprenos) jam estas faritaj. Ekzemple, la akuzativo, kiu multe diablighos (la mencio pri via "ido" enkapigis al mi ideon tre amuzan, kiun mi rezervos por la estonteco).

Ankaŭ alian manieron eĉ pli konvinke diablighi la lingvon universalan mi elpensis. Certe, kara, vi memoras la *uj*-afikson, per kiu ni tre lerte

kaj, se vi permesas, tre zamenhofe etikedas la diversajn gentuojn. Eble ni tro entuziasmiĝis, enujigante - por tiel diri - ne nur landojn sed ankaŭ arbojn. Foje mi timas, ke lernantoj opinios, ke *Polujo* estas arbo por poloj. Fakte tio nervozigas min, ĉar ŝajnas, ke tiel vi sugestas - ĉar simioj vivas en arboj - ke homoj devenas de simioj, kiel proponaĉas tiu Darvino, la herezulo, kiu renversis la biblian fikcion, pardonu, veron, pri Adamo kaj Evo, kaj ... [nedeĉifreble] ... sed enkonduki alian finaĵon, do -io, alportos plurajn diablugaĵojn. Unue, ĝi montros, ke nia lingvo universala ne die perfektas sed home malperfektas. Due, ĉar ĉio malperfekta perfektigeblas (almenaŭ teorie: kiel vi scias, kara, dum jarcentoj mi provadas perfektigi kaj la mondon kaj la homaron, sed tute vane), ĝi altiros lingvistojn, reformemulojn, eternajn komencantojn, kaj similajn kuriozaĵojn, eĉ eble ordinarajn parolantojn, kaj ilin kvereligos kaj senpacigos ĝis la - kiel diri? - fina venko (tio bele sonas, ĉu ne?), tiel provizante la lingvon per konstanta kialo por plua ekzisto (elmensigu fantaziaĵojn pri interkompreniĝo, kara; ĉarma ideo sed ... [nedeĉifreble] ... laste, kaj jen la majstraĵo, ni povos tuj distingi verajn adeptojn de la lingvo universala, do fidelulojn kaj fundamentistojn, disde amatoroj, hobiistoj, glumarko-gvatantoj kaj pinglo-portantoj. La veruloj - hmm, pli poezie - la verduloj ujos, dum la aliaj nur krios kaj rabios kaj furiozas kiel torturatoj en infero. Vidu, kara, vere diable diabluga solvo. Cetere, pri *ita/ata* ...

***Abrupte ĉesas ĉi tie la teksto. Horoj pasigitaj en Biblioteko Butler ne ellibrigis la mankantajn foliojn, tamen senpolvigataj estas plurdekoj da volumoj. Plendis kaj la bibliotekisto, ĉar oni ne tuŝu tiom da libroj, damne, kaj la purigistaro, kiu minacas procesi kontraŭ la biblioteko pro la enpulgigita polvo.***

# La landnoma sufikso *-ujo* en instruado

Bertilo Wennergren

Jam delonge en nia lingvo hejmas du sinonimaj sufiksoj por landonomoj: *-ujo* kaj *-io*. Siatempe okazis pri tiuj du sufiksoj eĉ lingvaj bataloj inter du tendaroj de pacaj batalantoj. Sed tiuj tempoj bonŝance pasis. Nun tiuj du samsignifaj sufiksoj kunekzistas sufiĉe kviete en nia paca lingvo. Krome apud ili oni trovas ankaŭ sufiksecan uzon de *-lando* por precize la sama signifo. Ni havas do eĉ tri samcelajn vortfarilojn. Oni povas diri, ke temas pri lingva riĉeco, do pri io pozitiva.

Mi mem klare preferas la sufikson *-ujo*. Tio certe malmultajn surprizas, ĉar mi estas konata apoganto de la *Fundamento de Esperanto*<sup>5</sup>. Sed mia prefero de *-ujo* ne radikas en mia Fundamentaneco. Mi uzas la landonoman sufikson *-ujo*, ĉar tio rezultigas pli klaran lingvaĵon.

Tiu aserto pri klareco eble surprizas iujn legantojn, ĉar ofta argumento por la sufikso *-io* estas, ke ĝi kreas pli internaciajn kaj pli rekoneblajn landonomojn. Ekzemple *Italio* pli similas al nacilingvaj formoj kiel *Italia*, *Italie*, *Italien*, *Italy* ol la formo *Italujo*. Tial *Italio* devas esti pli facile komprenebla unuavide, kaj sekve pli klara. Tute prave, sed mi parolas pri alia speco de klareco. Mi parolas pri rekoneblo de la kategorieco.

## Du kategorioj

En la komenca tempo la landonomoj en Esperanto apartenis al nur unu sola klaso: oni formis ĉiujn landonomojn en la sama maniero, per la sufikso *-ujo*, kiun oni aldonis al vorto por la koncernaj landanoj: *svedoj* loĝis en *Svedujo*, *japanoj* en *Japanujo*, *holandoj* en *Holandujo*, *braziloj* en *Brazilujo* kaj eĉ *amerikoj* loĝis en *Amerikujo*.

---

<sup>5</sup> Zamenhof, L.L.: *Fundamento de Esperanto*. 9a eldono kun enkondukoj, notoj kaj lingvaj rimarkoj de A[ndré] Albault. Esperantaj Francaj Eldonejoj, Marmande, 1963.

Sed jam Zamenhof frue rimarkis, ke tiu simpla skemo ne estas praktike taŭga, kaj li senceremonie transiris al dukategoria sistemo, en kiu la plimulto de la landonomoj estas sensufiksaj vortoj, el kiuj oni formas la vorton por la landanoj per la sufikso *-ano*. Nur relativa malplimulto da nomoj restis en la origina *uj*-klaso. (Tio, ke plej multaj el tiuj *uj*-nomoj apartenas al landoj en Eŭropo, povas tamen doni la impreson, ke la *uj*-nomoj estas pli multaj, sed tiel ne estas. Nur rigardu ĉiun ajn liston de landonomoj, ekzemple tiun, kiu aperas en tiu ĉi libreto.)

Ni havas do jam delonge la jenajn du kategoriojn en nia lingvo:

- “**Lando** → **landanoj**”: ekz. *Usono* → *usonanoj*, *Irlando* → *irlandanoj*, *Birmo* → *birmanoj*
- “**homoj** → **Homujo**”: ekz. *germanoj* → *Germanujo*, *ĉinoj* → *Ĉinujo*, *somaloj* → *Somalujo*

Mi nomos ilin ĉi-poste por simpleco la **uj**-kategorio kaj la **an**-kategorio.

Mi rimarkigu - parenteze - ke tiu divido laŭ du kategorioj esence estas arbitra. Aparteno al la *uj*-kategorio diras nenion ajn pri la koncerna lando kaj ties popolo, kaj aparteno al la *an*-kategorio same diras nenion pri tiu lando kaj ĝia popolo. Multaj provis trovi aŭ elpensi ian sistemecon en la klasado, sed tio plejparte estis vana.

## Samsignifaj sufiksoj

Nuntempe plej multaj Esperantistoj uzas anstataŭ *-ujo* la neoficialan sufikson *-io*, dirante ekzemple *Germanio*, *Ĉinio* kaj *Somalia* anstataŭ *Germanujo*, *Ĉinujo* kaj *Somalujo*. En tiaj okazoj ambaŭ sufiksoj signifas simple “lando”: *Germanujo/Germanio* = “la lando de la germanoj”; *Ĉinujo/Ĉinio* = “la lando de la ĉinoj”; *Somalujo/Somalia* = “la lando de la somaloj”. Ankaŭ eblas uzi la radikon *land*: *Germanlando*, *Ĉinlando*, *Somal(o)lando*, sed tio okazas multe malpli ofte.

Diferencas ĉe tiaj nomoj sole kaj nure la formo de la elemento uzata por esprimi la ideon “lando”. Tial ankaŭ landonomoj kiel *Germanio*, *Japanio*, *Pollando* kaj *Svislando* apartenas al la *uj*-kategorio. Temas pri la sama maniero formi la nomojn. Oni

simple anstataŭigis la elementon *uj* per *i* aŭ *land*. Okazis nure supraĵa ŝanĝo. Sed ĉu en la direkto de pliboneco?

### Rekoneblo de la kategorio

Ĉu ĉi tia teoriumado pri du kategorioj havas ankaŭ praktikan valoron? Ĉu ordinaraj lingvouzantoj bezonas scii la kategorion de landonomo por povi ĝin uzi senerare? Aŭ ĉu ĉio ĉi estas afero nur por gramatikistoj kaj harfenduloj?

Fakte por povi uzi tiajn ĉi vortojn praktike en Esperanto oni ja bezonas scii, kiel ili estas kunmetitaj aŭ ne-kunmetitaj. Bedaŭrinde multaj lingvouzantoj ne tre bone tion komprenas, nur tre nebule konsciante, aŭ tute ne konsciante, pri la baza divido de la landonomoj en du kategoriojn. Kaj el tio fontas multa erarado.

Ege tro ofte oni renkontas diraĵojn de la jena speco: “Mi babilis kun du francoj, tri usonoj kaj unu aŭstralo.” En tiu malfeliĉa frazo estas pluraj eraroj diversspecaj:

- La parolanto ne scias, ke la radiko *franc* estas nomo de homo, sed pensas, ke ĝi estas nomo de lando, kaj sekve li uzas ĝin laŭ la reguloj de la *an*-kategorio, anstataŭ laŭ la reguloj de la *uj*-kategorio. Alternative li ja scias, ke la lando estas *Franujo/Francio*, sed ne bone komprenis, ke oni tiam ne povas aldoni la sufikson *-ano* anstataŭ *-ujo/-io* por paroli pri la landanoj. (Sed oni ja povas ĝin aldoni, se oni konservas la landnoman sufikson: *francujano/ franciano* = *ano de Franujo/Francio* = *franco*.)
- La parolanto imagas, ke *usono* estas nomo de landano, kaj ke la lando estas *Usonujo/Usonio/Usonlando*. (Aŭ eble li eĉ uzas la vorton *Usono/usono* egale kaj por la lando, kaj por ties landanoj.)
- La parolanto pensas, ke la landonomo *Aŭstralio* apartenas al la *uj*-kategorio, kaj ke ĝi do enhavas la sufikson *-io* (sinonimo de *-ujo*).

Laŭ mi la fonto de tiaj ĉi eraroj troveblas en la baza lernado. Multaj simple ne bone enkapigis la sistemon de la du kategorioj. Ili ne bone lernis, kiel funkcias nomoj de la *uj*-kategorio, kaj kiel

funkcias nomoj de la *an*-kategorio. Kaj sekve ili ĉion intermiksas kaj konfuzas. Aldone ili pri multaj landoj simple ne scias, al kiu kategorio ili apartenas.

Kiel estiĝis tiu mankohava lernado? La bazaj reguloj finfine estas sufiĉe simplaj kaj facilaj. Kiel aperis la kaoso en la praktika uzado?

### **Kulpas la sufikso -io**

Mi tute ne kontraŭas la landonoman sufikson *-io*. Ĝi estas parto de la lingvo, kaj ĝi enkondukiĝis en la lingvon en maniero, kiu kontraŭas nenian regulon aŭ principon en la Fundamento. (La Fundamento permesas enkondukadon de novaj lingvoelementoj, eĉ de tiaj, kiuj estas - parte - samsignifaj kiel jam ekzistantaj Fundamentaj elementoj.)

Sed tamen estas al mi klare, ke tiu konfuzo, kiun mi priskribis ĉi-antaŭe, fontas el la vasta uzado de la sufikso *-io* anstataŭ *-ujo* en landonomoj. Ne ĉio, kio estas rajte enkondukita en la lingvon, bone funkcias. Ne ĉio, kio estas establita parto de Esperanto, estas utila kaj klara.

Sed kiamaniere *-io* kontribuas al la multa erarado pri landonomoj?

### **La klareco de -ujo**

En la komenco mi skribis, ke mi uzas la landonoman sufikson *-ujo*, ĉar tio rezultigas pli klaran lingvaĵon. Per tio mi celis la jenon: kiam oni renkontas landonomon, kiu finiĝas per *...ujo*, oni tuj rekonas, ke ĝi apartenas al la *uj*-kategorio. Kaj kiam persono, kiu uzas ĉiam nur la sufikson *-ujo* en tiaj nomoj (neniam *-io*), diras aŭ skribas landonomon, kiu ne finiĝas per *-ujo*, ĉiu perfekte rekonas, ke temas pri landonomo de la *an*-kategorio. En tia uzado ĉiuj landonomoj, ĉu jam konataj de la aŭskultanto aŭ leganto, ĉu neniam antaŭe renkontitaj de li, kvazaŭ laŭte elkrias sian kategoriecon: *Usono* (*an*-kategorio!), *Vjetnamujo* (*uj*-kategorio!), *Ĉilio* (*an*-kategorio!), *Uzbekujo* (*uj*-kategorio!), *Namibio* (*an*-kategorio!), *Ganao* (*an*-kategorio!), *Etiopujo* (*uj*-kategorio!). Dubo simple ne povas esti. La

aŭskultanto aŭ leganto tuj scias, kiel nomi la landanojn: *usonanoj*, *vjetnamoj*, *ĉilianoj*, *uzbekoj*, *namibianoj*, *ganaanoj* kaj *etiopoj*. T.e. li tion scias, se li bonorde lernis la sistemon: se li bone lernis, kiel funkcias nomoj de la *uj*-kategorio, kaj kiel oni uzu nomojn de la *an*-kategorio.

Kiam parolas favoranto de la sufikso *-io*, tia klareco tamen plene forestas: *Usono*, *Vjetnamio*, *Ĉilio*, *Uzbekio*, *Namibio*, *Ganao*, *Etiopio*. Nur pri *Usono* kaj *Ganao* mankas dubo. La aliaj povas esti, ĉu *uj*-kategoriaj (sed kun la sufikso *-io*), ĉu *an*-kategoriaj (kun ŝajna sufikso *-io*). Kaj tie ni finfine renkontas la fundamenton de la tuta problemo kaj de la konfuzo: **multegaj landonomoj havas ŝajnan sufikson *-io***. (Ankaŭ *uj*-emuloj uzas tiujn samajn nomojn kun ŝajnaj *i*-sufiksoj: *Ĉilio*, *Namibio*, *Aŭstralio* kaj multajn aliajn. Sed kiam *uj*-emulo skribas aŭ parolas, oni scias, ke ne povas temi pri veraj sufiksoj en tiuj nomoj, ĉar *uj*-emulo ne uzas la sufikson *-io*.)

*uj*-uzado do ebligas tujan rekonadon de la kategorio de ĉiu landonomo. Se ĉu tiu eblo de rekonado estas treege grava? En ordinara komunikado eble ne. Se iu parolas al mi ekzemple pri *Namibio*, mi ne nepre bezonas respondi parolante pri la anoj de tiu lando. Sed ekzistas okazoj, kiam tiu rekoneblo vere gravas.

## Instruado de landonomoj

Por bone kapti la bazan sistemon de la Esperantaj landonomoj, kaj por bone kompreni, kiel ilin uzi senerare, oni bezonas la tutan aferon lerni ĝuste de la komenco. Tio, kion oni komence mislernas aŭ lernas nur duone, oni poste malfacile riparas. Ofte rezultas baza konfuzo aŭ sento, ke la tuta afero estas tre malfacila aŭ eĉ tute ne lernebla.

Bedaŭrinde multaj el niaj lernolibroj preterpasas la kampon de landonomoj, kaj precipe la dukategorian dividon, tre rapide kaj supraĵe. Ili mencias ion nekларan pri diversaj sufiksoj, kaj ofte eĉ diras rektajn malveraĵojn. La plej ofta misaĵo estas ŝajnigo, ke la *uj*-kategorio estas la baza kaj plej ofta speco de landonomoj, dum la *an*-kategorio estas kvazaŭ ia escepto. Ni do ne miru, ke eĉ multaj progresantoj, progresintoj kaj iafoje eĉ spertuloj mankohave uzas landonomojn en Esperanto. Ili simple neniam vere lernis, kiel uzi tiajn vortojn. Ne kulpas la mislernintoj.

Kulpas la lernolibroj kaj la verkintoj de tiuj lernolibroj. En kelkaj okazoj eble eĉ la verkinto de la lernolibro neniam bone lernis la sistemon, kaj sekve ankaŭ ne povas ĝin bone klarigi. La tuta konfuzo estas jam plurajn jardekojn aĝa, kaj multaj nunaj verkantoj de instrumaterialo mem lernis Esperanton per lernolibroj, kiuj ĉion ĉi nur supraĵe aŭ eĉ rekte erare prezentis.

En lernolibro do necesas bona kaj klara prezento de la du kategorioj, kun facile kompreneblaj ekzemploj, ne nur en tiuj lecionoj, en kiuj eksplicite temas pri landonomoj, sed ankaŭ en la postaj lecionoj, kie uziĝas landonomoj en la tekstoj kaj ekzercoj. Ĝuste tiam plej gravas, ke la landonomoj, kiujn la lernantoj renkontas, estu klaraj kaj senkonfuzaj. Necesas, ke ĉiu el ili kvazaŭ anoncu sian kategoriecon, por ke la lernantoj ne miskomprenu.

Devas nun jam esti evidente, kiel laŭ mi oni agu pri tio: en la unua instruado pri landonomoj, kaj almenaŭ en kelkaj postaj lecionoj, **ne uziĝu la sufikso -io**. Mi jam montris, kiel maleble estas rekoni la kategoriecon de nomoj kiel *Aŭstralio*, *Vjetnamio* kaj *Namibio*, se parolas aŭ skribas uzanto de la sufikso *-io*. Niaj lernolibroj do estu baze *uj*-emaj (ĉe nomoj de la *uj*-kategorio). La lernantoj lernu unue pri la sufiksoj *-ujo* kaj *-ano*, pri la du kategorioj, kaj kiel ili funkcias. Poste ili ekzercu uzon de landonomoj kaj nomoj de landanoj, sole kaj nure laŭ *uj*-ema uzado. Kaj en la tuj postaj lecionoj aperu pliaj ekzemploj, daŭre sen spuro de la sufikso *-io*. Tiam la tuta afero lerniĝas facile kaj senprobleme. Neniu lernanto bezonas heziti, kiel paroli pri la landanoj de lando, kies nomon li renkontas je la unua fojo. Tio sekvas aŭtomate el du facilaj reguloj:

- se la landonomo finiĝas per *-ujo*, forprenu *uj*
- se la landonomo ne finiĝas per *-ujo*, aldonu *an*.

Iam poste, kiam la lernantoj jam firme ĉion komprenis pri la du kategorioj, kiam ili jam povas flue kaj senprobleme uzi landonomojn, nur tiam oni enkonduku la sinonimon *-io*, informante tute honeste, ke nuntempe multaj (eĉ la klara plimulto) uzas anstataŭ *-ujo* la neoficialan sinonimon *-io*. Tio tiam apenaŭ konfuzas la lernantojn. Ili povas facile kaj aŭtomate mem krei *i*-formojn el tiuj *uj*-formoj, al kiuj ili jam alkiutimiĝis. Por multaj landoj ili tiam jam sukcese enkapigis la kategoriecon,



kaj tial ili povas tiujn nomojn plu uzi ĝuste, eĉ se ili renkontas ilin en *i*-vesto.

Bona lernolibro ĉiuokaze devas instrui ambaŭ sufiksojn. Ambaŭ uziĝas en la lingvo, kaj ambaŭ estas lernendaj. Oni nur elektu taŭgan vicordon en la instruado.

Povas esti tente, kaj povas soni logike, unue instrui tiun sufikson, kiu estas uzata de la plimulto, kaj nur poste mencii la alian. Luj lernolibroj fakte agas pli-malpli tiel. Ne malofte ili eĉ prezentas *uj* pli-malpli nur piednote, eble eĉ asertante, ke apenaŭ iu ĝin plu uzas, kio simple ne estas prava.

La lernantoj bezonas lerni ambaŭ sufiksojn, kaj por ke ili bone komprenu la sistemon de la Esperantaj landonomoj, ili bezonas **unue lerni pri *-ujo***, ĉar *uj*-uzado estas pli klara rilate la kategoriecon de la nomoj.

### **Kio pri *-lando*?**

Uziĝas en *uj*-kategoriaj landonomoj ankaŭ la radiko *land* en sufikseca maniero. Tio okazas plej ofte ĉe kelkaj landoj, kies internacie konataj nomoj finiĝas per ...*land* aŭ simile, ekzemple *Finnlando*, *Svazilando*, *Tajlando* kaj *Skotlando* (kie loĝas respektive *finnoj*, *svazioj*, *tajoj* kaj *skotoj*). Bedaŭrinde ...*lando* aperas ankaŭ kiel ŝajna sufikso en nomoj kiel *Nederlando*, *Irlando* kaj *Islando* (kie ni trovas *nederlandanojn*, *irlandanojn* kaj *islandanojn*).

Tial en lernolibro estas preferinde unue ne prezenti nomojn kiel *Finnlando* kaj *Svazilando*. Oni povas simple ne mencii ĝuste tiujn landojn en la unua instruado pri landonomoj, aŭ oni komence prezentu ilin en iliaj malpli oftaj, sed gramatike tute eblaj formoj kun *uj*-sufikso: *Finnujo*, *Svaziujo*, *Tajujo* kaj *Skotujo*. En ia posta leciono, eble kiam oni enkondukas la sufikson *-io*, oni povas instrui ankaŭ la uzon de la radiko *land* kiel sinonimo de *-ujo* kaj *-io*.

### **Kio pri aliaj uzoj de *-io*?**

Bedaŭrinde pro la multjara hezitado pri landonomoj en Esperanto, enkondukiĝis kelkaj pli aŭ malpli bonaj komplikaĵoj

en la praktikan uzadon. Tiujn komplikaĵojn oni ne prezentu en la unua leciono pri landonomoj. Oni atendu, ĝis la lernantoj bone komprenis kaj bone ekregis la bazan sistemon.

Unu el tiuj komplikaĵoj estas uzo de la la sufikso *-io* en okazoj, en kiuj ĝi ne estas paralelaĵo de *-ujo*. Temas pri nomoj, en kiuj oni aldonas *-io* ne al vorto por landanoj, sed al vorto por urbo, rivero, monto aŭ io simila. Temas pri provoj distingi en Esperanto inter samnomaĵoj. Pluraj landoj en la mondo havas nomon, kiu ankaŭ estas nomo de io en tiu lando. Ni havas ekzemple la landon Kenjo, en kiu ekzistas la monto Kenjo. Ni havas la landon Senegalio kun la rivero Senegalio. Ekzistas la lando Nikaragvo kun la lago Nikaragvo. Ni havas la landon Gvatemalo kun ĝia ĉefurbo Gvatemalo. Ekzistas la lando Belizo kun ties eksa ĉefurbo Belizo. Kaj tiel plu. Oni trovas eĉ okazojn, en kiuj temas pri pli ol du samnomaĵoj, ekzemple la landon Meksiko kun la federacia ŝtato Meksiko, en kiu troviĝas la ĉefurbo Meksiko. (Apude estas krome la golfo de Meksiko, kaj en Usono troviĝas la ŝtato Nov-Meksiko.)

Jam Zamenhof proponis imiti la ekzemplojn de la landoj *Alĝerio* kaj *Tunizio* kun ties ĉefurboj *Alĝero* kaj *Tunizo*, kie oni povas kvazaŭ rekoni uzon de distinga *i*-sufikso. En Lingva Respondo<sup>6</sup> Zamenhof prezentis la ideon uzi la formon *Meksikio* por la lando, kaj *Meksiko* por la urbo. (Pri la ekzisto de la federacia ŝtato Meksiko li verŝajne nenion sciis.) Zamenhof mem laŭ mia scio neniam praktikis tiun proponon, sed multaj aliaj provis ĝin realigi. Tiuj provoj neniam fariĝis sistemaj aŭ konsekvencaj, kaj apud formoj kiel *Meksikio*, *Senegalio*, *Luksemburgio* kaj *Gvatemalio*, ĉiam uziĝis ankaŭ la pli simplaj kaj pli internaciaj formoj sen *i*-sufikso. Krome multaj landoj, kiuj teorie devus esti kandidatoj por tia distinga *i*-sufikso, apenaŭ iam ajn estis tiel uzataj (*Paragvajo*, *Urugvajo*, *Malto*, *Singapuro*, *Kenjo* k.a.).

Efektive neniu iam sukcesis apliki tiun ideon konsekvence kaj plene. En iaj okazoj ĝi eĉ tuj fiaskas. La plej bona ekzemplo

---

<sup>6</sup> Zamenhof, L.L.: *Lingvaj Respondoj. Konsiloj kaj Opinioj pri Esperanto*. Redaktis G[aston] Waringhien. 6a eldono, Esperantaj Francaj Eldonejoj, Marmande, 1962 [represo: Pro Esperanto, Vieno, 1995].

estas la du landoj Niĝerio kaj Niĝero, kiuj estas ambaŭ nomataj laŭ la sama rivero Niĝero. Teorie do ambaŭ landoj devus nomiĝi *Niĝerio!*

En 1974 la Akademio de Esperanto oficialigis<sup>7</sup> interalie la landonomojn *Gvatemalo, Meksiko, Nikaragvo, Panamo, Paragvajo, kaj Urugvajo*. En 1985 la Akademio konfirmis sian starpunkton per la jena eksplacita rekomendo:

*Principe estas malrekomendite nove formi nomon per iu internacia "sufikso" aŭ sufikse uzata fremda vorto (-io, -(i)stano, ...), se la tiel ricevita landnomo ne jam ekzistas internacie.*<sup>8</sup>

Tial formojn kiel *Meksikio, Senegalio* kaj *Luksemburgio* oni prefere ne uzu, kaj lernolibroj ilin menciu nur flanke. Tiaj landonomoj ja ekzistas, kaj kelkaj el ili eĉ estas ofte uzataj. Oni ne kondamnu tiujn el ili, kiuj estas jam forte enradikiĝintaj. Sed oni ankaŭ ne rekomendu ilin, kaj oni nepre ne kreu pliajn landonomojn de tiu speco. Prefere tiaj komplikaĵoj kaj evitindaĵoj estu traktataj nur en instruado al progresantoj aŭ eĉ nur en kursoj por progresintoj. En baza instruadoj ili povas nur konfuzi la lernantojn.

## Konkludo

Se vi estas instruisto aŭ verkanto de lernomaterialo pri Esperanto - eĉ se vi mem preferas la sufikson *-io* en landonomoj - lernu uzi ankaŭ *uj*-stilajn nomojn, kaj uzu prefere nur tiajn nomojn en via instruado kaj en via instrumaterialo, almenaŭ en la komenca tempo. Poste enkonduku ankaŭ la sufikson *-io*. Vi certe rimarkos, ke viaj lernantoj pli bone komprenos, kiel funkcias la Esperantaj landonomoj, kaj sekve malpli eraros.

Mi mem komence uzis nur *-io* (ĉar ĉiuj ĉirkaŭ mi uzis nur tiajn landonomojn), sed poste mi komprenis, ke *-ujo* estas pli klara.

---

<sup>7</sup> *Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro*. En: *Aktoj de la Akademio II 1968-1974*. Paris, 1976 (Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, 10).

<sup>8</sup> *Rekomendoj pri Landnomoj*. En: *Aktoj de la Akademio III 1975-1991*. Redaktis André Albault (k.a.). Paris, 1992 (Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, 11).

Kaj nun de pluraj jaroj mi senprobleme uzadas nur *-ujo*. Mi ne estas la sola - kiel montras interalie tiu ĉi libreto. Ankoraŭ dum longa tempo certe plu kunekzistos ambaŭ sufiksoj, kaj neniu povas esti certa, ĉu iam unu el ili plene venkos, nek kiu el ili finfine superregos la alian. Dume ni vivas kun tiu duobla kaj espereble plu paca uzado.

Eble tiu ĉi mia artikoleto tentos vin transiri, almenaŭ prove, al *-ujo*. Tiam ne hezitu. Sed pensu aparte pri via instruado. Tie *-ujo* estas speciale rekomendinda kaj utila.

# Nefikcie el la vivo de japana esperantisto

Tacuo Huĝimoto

Mi estas japano (1935.06.29 - ) kaj esperantisto de la 22a de junio 1953; tion mi notis taglibre. En la daŭro de pli ol duonjarcento, mi neniom sentis malkontentecon pri Esperanto; sekve, mi havis nenan emon plibonigi ĝin laŭ mia gusto. Plaĉas al mi ĉiu detalo de nia lingvo, ekzemple la literoj kun supersignoj, la klara prononceblo, la regula gramatiko, la (plejparte) eŭropcivilize bazitaj vortoj, ktp.

Do, evidente, ankaŭ la heroo de nia komuna libro, nome la landnoma sufikso *-ujo*. Ankaŭ ties kromsignifoj je vazo kaj arbo estas nature akceptitaj ĉe mi. Kiam la uzo de *-io* kiel landnomo disvastiĝis, mi estis iom embarasita, ĉar ĝis tiam mi sentis neniun ĝenon pri la *ujo* kiel landnomo.

Ŝajnas, ke la apliko de *-io* kiel landnomo disvastiĝis pro tio, ke ĝi, precipe al eŭropanaj oreloj, sonis “nature”. Ĉi-kuntekste, mi devas eldiri mian bedaŭron pri la tiel nomata “natureco” ĉe la lingvouzado. Eĉ tiel nomatan naturan lingvon ne ĉiu povas uzi nature, do nek parole, nek skribe. Oni sentas sin plej hejme parolante sian denaskan dialekton; duavice, sian regionan kaj landan komunan lingvon; lastavice, iun fremdan lingvon.

Esperanto ne estas por ĉiuj lernantoj kaj praktikantoj “alilanda” lingvo, sed almenaŭ en la komenco ĝi estas ja fremda; kun la tempo oni tamen povas pli kaj pli familiariĝi kun ĝi, eĉ intimiĝi kun ĝi, tiel ke, ekzemple, mi mem sentas min hejme ĉe Esperanto, kvazaŭ denaska uzanto de la lingvo.

Bedaŭrinde, malkiel mi, multaj, eĉ eŭropaj esperantistoj, ne povoscias uzi parole kaj skribe Esperanton tiel nature, ke oni sentus nian lingvon certe natura idiomo. Sen tio, Esperanto-uzantoj vole-nevole devas resti sub dezirinda nivelo. Mi bone komprenas la lingvan situacion de okcidentaj lernantoj de Esperanto, kies naciaj lingvoj estas tiel similaj al Esperanto, ke ili ne bezonas tro multe streĉi sin por ellerni almenaŭ elementan gradon de Esperanto por kompreni kaj ankaŭ iomete paroli. Tial,

se ili ne posedas tre bone la gramatikon de Esperanto en detaloj, ili ne ĝenas sin kaj fartas bone, eĉ se ilia uzo de Esperanto ne estas matura.

Kompreneble, inter la okcidentaj samideanoj troviĝas pli multe da bonaj parolantoj, ol ĉe aziaj esperantistoj, tio tamen estas tute natura fakto, ĉar ili ne havas tian malfacilecon, kiun sur ĉiu paŝo renkontas azianoj. Tiurilate, nepre leginda artikolo aperis en *Esperanto* de UEA je decembro 2006, “Instrui en Ĉinio” de Roman Dobrzyński. Ĝi ja reliefe rakontas tiun, al la okcidentanoj eĉ ne imageblan, malfacilecon, kiun travivas ĉinaj lernantoj de nia lingvo. Ne tute saman, sed similan malfacilecon renkontas ankaŭ ni, japanoj. Plimalpli tiel ankaŭ ĉe koreaj samideanoj.

Mi ŝatus, se okcidentaj samideanoj estus pli modelkonsciaj kaj parolus tre pli bone ol nune, ĉar tiam, ekzemple, dum UK-semajno neeŭropanoj povus pli trankvile imiti la modelajn parolantojn. Sed reale, multaj eŭropanoj parolas laŭ maniero forte influita de sia propra lingvo.

Kelkaj stultuloj ankaŭ en Japanujo, eĉ en intelekta rondo, asertas senscie, ke Esperanto estas nur eŭropa lingvo, do ne taŭga kiel komuna internacia lingvo por la tuta mondo. Certe, origine, nia lingvo devenis de eŭropaj lingvoj, tio tamen ne signifas, ke ĝi estas nur eŭropa. Vortare, ĝi ja estas certe eŭropa, sed gramatike, ĝi estas ne sole eŭropa, ĝi estas ankaŭ universala. Pro tio, mi, neinstruita japano, povis ellerni la gramatikon kun konsiderinde granda vortprovizo kaj efektive scipovas uzi Esperanton tute libere kaj nature, kvazaŭ denaskulo.

### **Mi sentas min reviviĝinta post pulmito**

La 5an de oktobro 2006 oni ambulance enportis min en malsanulejon kaj mi kuŝis tie dum dek du tagoj pro pulmito kaj maligna sindromo (pro kromefikoj de tro fortaj medikamentoj). Unu semajnon post eliro de la malsanulejo, la 16an de oktobro, mi grade resaniĝis de la pulminflamo kaj rapide resaniĝis tagon post tago, kvankam mi ne povis piediri (do, mi rampis laŭ ŝtuparo), butonumi, kravati; mallonge: pro bona prizorgado fare

de geflegistoj, precipe kelke da flegistinoj, tre kompetentaj, eĉ belaj, mi revigliĝis, sentante min kvazaŭ reviviĝinta.

Kun la reala sento preskaŭ renaskiĝinta, mi eniris en la jaron de apro: 2007. Mi decidis esti ĉiuflanke aktiva, precipe je verkado en ambaŭ lingvoj, japane kaj esperante. Meze de mia malsaneco mi ricevis inviton kontribui al ĉi tiu libreto. Volonte mi akceptis tion, kvankam tiumomente mi ne povis bone skribi pro iom paralizitaj fingroj en la dekstra mano.

En la jaro 2006 aperis du libroj: 1) *Esperanto tiel parolata: Interparola praktiko*; 2) *Enkonduko al Esperanto: Gramatiko laŭ Tacuo Huĝimoto*. Feliĉe, ili estas bone akceptataj, eĉ aperis jam samjare en aŭtuno korea traduko de la unua.

Proprakorpe mi spertis, kial oni uzas unu saman vorton *akuŝi* por naski bebon kaj naski verkon. Senkonscie, aŭ sen rimarko pri tio, mi estis lacigita, preskaŭ tuj post la akuŝo de dua libro plus legado de ties presprovaĵoj, komence de oktobro, mi falis en staton, kompreneblan de neniu, inkluzive min mem: mi estis en danĝero eventuale morti pro pulmito plus maligna sindromo.

Malgraŭ ĉio, nun mi tamen fartas denove bone, kaj sentas min preta kontribui entute al Esperanto, pli konkrete al UEA internacie, JEI enlande, krom mia konstanta kunlaboro ĉe EPA, kie mi estas de jardekoj kolumnisto en ĝia revuo *Nova Vojo*.

Esperanto, kvankam naskita profunde en la sino de Eŭropo, estas kaj devas esti tamen lingvo komuna ne sole por eŭropanoj, sed ankaŭ idioma universala por ĉiuj homoj de la mondo; do ĝi estas, aŭ almenaŭ celas esti “lingvo neŭtrale homa” laŭ la Zamenhofa ideo kaj idealo. Sole pro tiu konstato kaj kredo je tio, mi restas en Esperantujo kaj klopodis diversmaniere ĝis nun kaj tiudirekte faros eĉ pli multe en la proksima estonteco.

“Kie vi loĝas?”

“Mi loĝas en Eŭropo.”

“Ĉu Eŭropanujo?”

“Jes, ankaŭ tiel bone.”

“Salut’ el Japanujo!!”

## Reagas Edwin de Kock al *Paŝo al Unueco de Nia Landnomaro* de d-ro A. Albault

*Tiu ĉi verko estas la lasta parto de studo dissendita 1982-12-23 al ĉiuj Akademianoj kaj disponigita de la aŭtoro por publikigo en Akademiaj Studoj 84. Ĝi respondas al studo, kiun d-ro Albault sendis al ĉiuj Akademianoj, kiu en pli detala formo aperis en Ak. St. 83.*

... Kaj nun mi devas veni al problemo en la listo de d-ro Albault, kvankam li ĝin ne aludas rekte. Tio estas, ke li antaŭsupozas la ĝeneraligon de la finaĵo *-io* por anstataŭi *-ujo*, precipe ĉar li metas la formojn kun ĝi en la unuan kolumnon, kion mi volas protesti.

Lastatempe iuj homoj kolopodis montri, ke *-io* havas grandan avantaĝon super *-ujo*, pro ĝia “internacieco”. Rolis en la afero ankaŭ influo de la Sennacieco. La laste menciitan ni povas simple forpuŝi, ĉar ĝi devenas el rondo kiu iafoje emas konfuzi sian vizion pri tio, kion ĝi deziras, kun tio, kio efektive ekzistas. Vere estas surtere nacioj, kaj la diversaj ŝtatoj de la nuntempo.

La ĉefa motivo por enkonduki *-io* kiel sufikson landnoman estis la emo al “internacieco”. Kiel mi jam montris, tio kondukas al tendenco Naturalisma, kontraŭa al la spirito de Esperanto.

Krom la subjektiva deziro mem, ne ekzistas bonaj argumentoj por la anstataŭigo. Ja troviĝas fortaj motivoj kontraŭ ĝi. Tial, ke oni tro ofte aŭdas nur unu flankon de la debato, mi ripetos ĉi tie la rezonadon, kiun mi ellaboris kaj oni publikigis en 1979.

La deirpunkto estas tio, ke oni klopodas montri la netaŭgecon de *-ujo* kaj la superon de *-io*. Specife oni argumentas, ke la unue menciita havas “tri sencojn”. Efektive *ujo* ne signifas, kiel oni supozigas, “lando, arbo kaj enhavilo”. Ĝi havas, efektive, per si mem nur unu sencon, nome “kio enhavas”. La precizigon pri la koncernataĵo venas el la kombino de la sufikso *-ujo* kun la antaŭa radiko. Praktike tiaj kunmetoj nuntempe ne inkluzivas



arbojn. Oni ne plu diras, ekzemple, *pirujo* en tiu senco. La vorto fariĝis, definitive, *pirarbo*. Restas nenia konfuzeblo.

Nun ni konsideru *-io*. Kontraŭ la fono de la antaŭa alineo oni certe rajtas atendi, ke ĝi evidentigos sian superecon, mem estante nepre unusenca. Sed kion ni trovas? Esploro pruvas, ke ĝi havas - ho ve! - multegon da funkcioj, entirante nin en la marĉon de la Naturalismo. Ĉu surprize?

En mia esploro mi trovis almenaŭ ok sencojn por *-io*, sendube rekordo. Jen:

1. Post la plej diversaj pseŭdoafiksoj Grekdevenaj ĝi indikas sciencon, ekzemple:

- (a) *-grafo* (*geografo* - *geografio*)
- (b) *-metro* (*geometro* - *geometrio*)
- (c) *-nomo* (*astronomo* - *astronomio*)
- (ĉ) *-ologo* (*biologo* - *biologio*)

Krome, laŭ PIV<sup>9</sup>, antaŭ la finaĵo *-io* povas stari tiusence *-mat*, *-pat*, *-tom*, *-urg* kaj *-zof*, kion mi tamen ne pluesploris.

2. Aliflanke ĝi celas ankaŭ malsciencon, kiel en *astrologo* - *astrologio*!

3. Ĝi povas aludi teknikon nomitan laŭ ĝia karakteriza instrumento:

- mikroskopo* - *mikroskopio*
- stetoskopo* - *stetoskopio*
- telefono* - *telefonio*.

4. En kelkaj vortoj Grekdevenaj ĝi koncernas la politikon, interalie post la jenaj elementoj:

- agogo* (*demagogo* - *demagogio*)
- arĥo* (*monarĥo* - *monarĥio*)
- krato* (*demokrato* - *demokratio*).

5. Ekzistas kazoj en kiuj *-io* diferencigas inter urbo kaj lando, jene:

- Luksemburgo* - *Luksemburgio*
- Meksiko* - *Meksikio*

---

<sup>9</sup> Ndlr: *Temas pri la unua eldono de PIV.*

6. Iufoje, tamen, la supra distingo aperas ankaŭ en la formo de mala tipo:

*Brazilo* (lando) - *Brazilio* (urbo).

7. Alia diferencigo estas inter lando kaj la rivernomo el kiu ĝi devenas:

*Niĝero* - *Niĝerio*.

8. Plia speco de landnomoj, pli ol 30 laŭ Montagu C. Butler (*Esperanto-English Dictionary*), simile sed ne same finiĝas per *-io*, kiu ĉe ili tamen – ni notu tion bone – ne estas sufikso, nur la lastaj du literoj en vorto. La formoj pri kiuj temas ne povas disiĝi en radikon plus finaĵo, kaj ilin oni ankaŭ ne kreas el radikoj nomantaj popolanojn. Ekzemple, loĝanto de *Ĉilio* ne estas *Ĉilo* sed *Ĉiliano*, kontraste kun *Hispano* troviĝanta en *Hispan* + *ujo*.

Ĝuste por ne konflikti kun tiu ĉi lasta nesufiksa tipo de landnomoj, *-io* ne devus esti alternativo aŭ anstataŭigo por *-ujo*. Se ni akceptus, apud vorto kiel *Hispanujo*, ankaŭ *Hispanio*, ni perdus klaran kaj necesan distingilon. La Esperantistoj ne sciis, ĉu enloĝas la du landojn supre menciitajn *Ĉiloj* kaj *Hispanoj* aŭ *Cilianoj* kaj *Hispanianoj*.

Sed ĉu la problemo ne solveblas per la simpla forigo de ĉiuj simplaj formoj kiel *Hispano*? Tiukaze *Hispaniano* ne estus konfuza. Bedaŭrinde ni ne povas, kaj ne rajtas, peli la simplajn vortojn el nia lingvo. Tion la Esperanta popolo simple ne akceptus. Krome, tia procedo rezultigas aliajn problemojn.

Iuj popolnomoj ne rilatas al lando, ekzemple *Buroj*, *Ciganoj* kaj *Judoj*. Oni ne povas paroli pri *Burio*, *Ciganio* kaj *Judio*! La laste menciita validas nur en perspektivo historia. Tiaj vortoj do fariĝus neregulaĵoj.

Aliaj popolnomoj ne koincidas kun unuopa lando. *Arabojn* oni ne trovas nur en *Arabio*! Krome naskiĝas homoj parolantaj certan lingvon kaj kun specifa kulturo ankaŭ en lando fremda. Ekzemple en Sud-Afriko, kaj multloke, oni havas *Grekojn*, kiuj tamen ne povas esti *Grekianoj*.

Inverse troviĝas ŝtatanoj en landoj, kiuj ne donas al ili sian nomon. Ekzemplas la *Katalunoj* kaj la *Vaskoj* en *Hispanujo*. Ilin

oni povas tamen nomi *Hispanujanoj*, nete distingante ilin de la *Hispanoj*.

La ĉiam pli larĝan uzadon de *-io* mi konsideras unu el la gravaj kaŭzoj por la kaoso landnoma. Mi tial ne povas ne bedaŭri la decidon de la Akademio nuligi sian antaŭan malaprobon al *-io*, kiu naskiĝis el plia saĝeco.

Do kion fari nun? Ekzistas du vojoj, kiujn mi priskribos jene:

Unue, ni neniel reliefigu la tendencon anstaŭigi *-ujo* per *-io*, sed lasu la aferon al la popolo Esperanta. Tiucele la listo de d-ro Albault devas ne meti la formojn kun *-io* en la unuan, pli okulfrapan pozicion, sed en la lastan kolumnon, kaj inter krampojn, tiele:

*Albanujo Albanoj (oficiala) (Albanio)*

Due, se oni vere insistas pluri sur la vojo disvastigi la uzon de *-io* landnoma, oni almenaŭ forigu la eblon krei formojn konfuzajn. Tio eblas per la sistema ŝanĝo de ĉiuj popolnomoj ĝis nun finiĝintaj per *-iano* post la malnovaj *-io*-landnomoj, cele unutipigon. Per tio malaperus la konfuzeblo menciita rilate al *Ĉilianoj* kaj *Hispanoj*.

Adopti tiun ĉi ideon necesigus la jenajn formojn:

<b>Popolo</b>	<b>Lando/kontinento</b>	
<i>Alĝeroj</i>	<i>Alĝer/io</i>	(Por la konservativuloj validus ankaŭ aldoni <i>-ujo</i> al ĉiuj ĉi formoj.)
<i>Aŭstraloj</i>	<i>Aŭstral/io</i>	
<i>Aŭstroj</i>	<i>Aŭstr/io</i>	
<i>Bolivoj</i>	<i>Boliv/io</i>	
<i>Ĉiloj</i>	<i>Ĉil/io</i>	
<i>Liberroj</i>	<i>Liber/io</i>	
<i>Liboj</i>	<i>Lib/io</i>	
<i>Polinezoj</i>	<i>Polinez/io</i>	
<i>Niĝeroj</i>	<i>Niĝer/io</i>	
<i>Siberoj</i>	<i>Siber/io</i>	
<i>Siroj</i>	<i>Sir/io</i>	kaj tiel plu.
<i>Tunizoj</i>	<i>Tuniz/io</i>	

Kompreneble iuj el la novaj formoj kolizius kun aliaj vortoj jam ekzistantaj en la lingvo, kio postulus kelkajn adaptojn.

*Aŭstralo* konfliktus kun *aŭstrala* = “sudhemisfera”. Ĉi-lastan oni povas ŝanĝi al *ostrala*, tiom pli ĉar ĝi estas vorto nekutima kun malmulta konateco inter la ordinaraj Esperantistoj.

*Libero* povas signifi ankaŭ “liberecon”, kiu estas formo kiun ni ne rajtas ŝanĝi. La solvo estas nomi la popolon *Lajberoj*, laŭ la Angla prononco de *Liberians*, almenaŭ en mia terparto.

Samas rilate al *Niĝero*, formo konservebla por la rivernomo. La popolon ni nomu *Najĝeroj*, laŭ la prononco Angla.

*Siro* ĝis nun signifis “Reĝa Moŝto”, ĉefe se ne sole en tekstoj beletraj. Sed ni preferu *Siroj*, por indiki la poplon. En la alia signifo ni povus uzi *Sireo*.

*Tunizoj* konfuzebblas kun la urbonomo *Tunizo*, sed ĉi-lastan oni povas senpene ŝanĝi al *Tuniso*, laŭ la prononco en iuj lingvoj kiel la Angla.

Oni min tamen ne miskomprenu. Mi preferas la forigon de sufiksa *-io*, kaj la daŭran uzadon de *-ujo*, kiu estas nepre supera, krom Fundamenta. Sed la menciitaj adaptoj almenaŭ helpus pliondigi nian kaoson, se oni persistus uzadi *-io*, ĝeneraligante ĝin. Kompreneble la pluekziston de *-ujo* oni ne rajtas nuligi per decido Akademia. Tion atingus nur la evoluo mem, sed mi bone konscias, kiel influa povas esti la premo de iuj homoj.

# lo en ujo

Blazio Vaha

lo estas en ĉi ujo:  
ĉu Francujo, ĉu Francio?  
Mankas al mi klaraj konoj,  
mankas ankaŭ ĝusta scio.

Devas ni elĵeti ion,  
mi mem ja ne scias: kion?  
ĉu mi ion svinge ĵetu,  
ĉu mi ujon rompe tretu?

Eble mi elĵetos ion,  
kaj mi l' ujon ne elĵetos.  
En la ujo restos io:  
ĉu Francujo, ĉu Francio.

Eble Francjo mem decidis,  
en Franclando de la francoj,  
plaĉas al ĝi kiu nomo,  
ĉu Francujo, ĉu Francio.

Franca lando fore floras  
damne, mi ĉi-fore ploras:  
kaj Franclando kaj Francujo  
estas en tre fora ujo.

Eble francoj mem ne scias,  
ĉu la ujo estas bona,  
tamen ujo estas bona,  
en ĝi ĉiam estas io.

# PRI LANDNOMOJ

(Resuma Esperantigo de Ĉapitroj IV kaj V el tezo pri Propraj Nomoj, aperinta en *The British Esperantist*, 1947, p. 65; 1948, pp. 152, 190, 199; 1949, p. 54.

Ĉapitroj I-III pritraktas problemojn de asimiliĝo, transliterado, transskribo, kaj traduko, kaj nomoj Bibliaj, klasikaj, viraj, inaj, personaj, k.s.)

## *Dua Eldono*

*La redaktoro kore dankas s-ron Koiĉi Ŝimizu, kiu sendis jenan valoran artikolon kiel sian kontribuon al ĉi tiu libreto. Ĉar la kvalito de la tre malnova originalo ne permesis fotorepreson, la artikolo estas fidele retajpita kun korekto nur de malmultaj evidentaj komposteraroj.*

## ĈAPITRO IV: LA ZAMENHOFA LANDNOMA SISTEMO

### (1) DU KLASOJ

Ĉe naciaj lingvoj la landnomoj kutime staras en du klasoj. En unu (klaso I), la radiko estas landa, loka: *Africa*<sup>10</sup>. En la alia (klaso II) la radiko estas genta, rasa: *Turk*.

Ĉe Esperanto same. Iufoje la radiko nomas la landon, kaj la loĝanto nomiĝas per **-ano: Afrik-o, Afrik-ano** (klaso I). Aliffoje la radiko nomas la genton, kaj la lando nomiĝas per **-ujo** aŭ **-lando: Turk-o, Turk-ujo (-lando)** (klaso II).

Tiu duklaseco ĝenerale havas historian bazon (LR 41).

### (2) KLASO I RADIKOJ GEOGRAFIAJ

*La radiko nomas la landon (lokon), la loĝanto estas -ano (en Azio loĝas Azianoj).*

<b>Afrik</b>	<b>Ekvador</b>	<b>Jav</b>	<b>Pakistan</b>
<b>Amerik</b>	<b>Eŭrop</b>	<b>Kanad</b>	<b>Paragvaj</b>
<b>Argentin</b>	<b>Grenland</b>	<b>Kolombi</b>	<b>Peru</b>
<b>Aŭstrali</b>	<b>Gvatemal</b>	<b>Korsik</b>	<b>Siberi</b>
<b>Birm</b>	<b>Indonezi</b>	<b>Kub</b>	<b>Sicili</b>
<b>Bolivi</b>	<b>Irak</b>	<b>Kvinsland</b>	<b>Siri</b>
<b>Borne</b>	<b>Iran</b>	<b>Libi</b>	<b>Tasmani</b>
<b>Brazil</b>	<b>Irland</b>	<b>Marok</b>	<b>Tibet</b>
<b>Cejlon</b>	<b>Island</b>	<b>Nederland</b>	<b>Urugvaj</b>
<b>Ĉili</b>	<b>Izrael</b>	<b>Novzeland</b>	<b>Venezuel</b>

(a) Ĉe **Aŭstrali, Bolivi, Ĉili, Kolombi, Siberi, . . .** la fina **-i** ne estas sufikso: ĝi estas parto de la radiko. Oni ne parolas Angle pri *Australs, Bolivs, Colombos, Sibers, Sirs*, nek Esperante pri *Aŭstralroj, Bolivoj . . .*. Ni diras *Australians, Aŭstralianoj*.

---

<sup>10</sup> *Ndlr: Ĉar ĉi tiu artikolo unue aperis en The British Esperantist, Butler plurfoje citas ekzemplojn el la angla lingvo.*

(b) same, ĉe **Grenlando, Irlando, Islando, Kvinslando, Nederlando, Tajlando** . . . la finaĵo **-lando** estas parto de la radiko. Oni ne parolas pri *Grenoj, Iroj, Isoj, Kvinsoj, Nederoj, Novzeoj, Tajoj* . . ., sed pri **Grenlandanoj, Islandanoj** . . .

### (3) KLASO II RADIKOJ GENTAJ

*La radiko nomas la genton (rason): la lando estas -ujo* (la **Grekoj** loĝas en **Grekujo**).

<b>Angl</b>	<b>Dan</b>	<b>Ital</b>	<b>Portugal</b>
<b>Armen</b>	<b>Egipt</b>	<b>Japan</b>	<b>Prus</b>
<b>Aŭstr</b>	<b>Eston</b>	<b>Katalun</b>	<b>Ruman</b>
<b>Belg</b>	<b>Franc</b>	<b>Kimr</b>	<b>Rus</b>
<b>Breton</b>	<b>German</b>	<b>Kroat</b>	<b>Serb</b>
<b>Brit</b>	<b>Grek</b>	<b>Latv</b>	<b>Slovak</b>
<b>Bulgar</b>	<b>Hind</b>	<b>Litov</b>	<b>Sved</b>
<b>Ĉeĥoslovak</b>	<b>Hispan</b>	<b>Norveg</b>	<b>Svis</b>
<b>Ĉin</b>	<b>Hungar</b>	<b>Pol</b>	<b>Turk</b>

(a) Bibliaj nomoj: **Arab-(Etiop-Filiŝt-Ĥalde-Jud-Med-Pers-)o, -ujo**. Pri **Egiptujo** vidu LK 42.

(b) Anstataŭ **-ujo** oni povas ankaŭ diri **-lando**. Ekz., **Danujo** aŭ **Danlando**. Simile: **Beĉuan-(Basuto-Kafro-Zulu-)lando**.

(c) Se **-lando** estas peza, **-ujo** estas preferinda. Cf. **Anglujo, Italujo, Polujo** kun **Anglolando, Itallando, Pollando**.

(d) Tamen **Fin(n)lando, Skotlando, Svislando**, ĉar pli internaciaj, estas pli ofte uzataj ol **Fin(n)ujo, Skotujo, Svisujo**.

(e) Aligentanto loĝanta en lando de klaso II estas **-ujano** aŭ **-landano**. “Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas **Rusujanoj**” (Ekzercaro 27).

(f) Ni vidos poste, ke ĉia provo starigi ĉiujn landojn en unu klason (**ĉu I, ĉu II**), nepre malsukcesos, ĉar ĝi naskas formojn neinternaciajn kaj nepraktikajn.



#### (4) DERIVAĴOJ\*

(a) En ambaŭ klasoj, egale ĉu la radiko nomas landon aŭ genton, la finaĵoj **-a**, **-e**, kutime sufiĉas por esprimi ideon adjektivan aŭ adverban. Ekz., **Angla (Usona) voĉo (pejzaĝo)**. *Paroli Angle (Usone)*.

(b) Se bezone oni povas precizigi. **Usonana voĉo, Angluja pejzaĝo, paroli Anglalingve**.

#### (5) EN KIU KLASO?

(a) Oni povas diskuti, ĉu iu radiko apartenas al klaso I aŭ al klaso II. Diversaj konsideroj povas influi la respondon: Esperanta tradicio, internacia uzado, la juĝo de la loĝantoj.

(b) Parolante ĝenerale, oni povas diri, ke Esperanto sekvas la uzadon internacian. Tamen tio ne estas gvidilo certa, ĉar diverslingve la uzado malsamas. Ekz., F G formas *Russie, Russland*, el *Russe*, sed A formas *Russian* el *Russia*; A G formas *Poland, Polen*, el *Pole*, sed F formas *Polonaise* el *Pologne*; A formas *Scotland* el *Scot*, sed F formas *Ecosais* el *Ecosse*. *France* kaj *Portugal* estas landnomoj Angle, sed gentnomoj Esperante.

(c) Ĉe LR 42 Zamenhof skribis: “Tiel longe, kiel ni uzas...nomojn de gentoj, ni devas ĉiam uzi tiujn nomojn kun la sufikso **-uj**”. Se do ekzistas **Aŭstroj, Belgoj, Jugoslavoĵ, Svisoj** (kaj tion oni povas nei), tiam la formoj **Aŭstrujo, Belgujo, Jugoslavuĵo, Svisujo**, estas sendisputeble ĝustaj. Kompreneble, se ekz. **Jugoslavoĵ** ne ekzistas, oni povus logike anstataŭigi la radikon **Jugoslav** per **Jugoslavi**, kaj diri **Jugoslavio, Jugoslaviano**. Tamen Zamenhof aldonis: “Estas vero, ke ekzistas tri Eŭropaj regnoj, por kiuj la sufikso **uj** estas ne tute logika (*Aŭstrujo, Belgujo, kaj Svisujo*), kaj se la Akademio trovus necesa anstataŭigi en ili la **uj** per **i**, mi tion ne malkonsilus; sed fari *propravole* escepton por tiuj tri regnoj mi al niaj verkistoj *ne* konsilus, ĉar la Esperantistoj jam tro forte al kutimiĝis al la ĝisnunaj...nomoj..., kaj por fari rompon en tiu al kutimiĝo mi ne vidas ian gravan neceson. La tuta esenco de lingvo

---

\* Preferinde estas, ĉe derivaĵoj, uzi majusklon: **Polo, Pola, Polujo**. En siaj plej maturaj verkoj (*Biblio, Fabeloj*), Zamenhof definitive adoptis tiun Anglan sistemon. Ofte minusklo kaŭzas heziton aŭ dubesencon. Inter **Kuba radiko** kaj **kuba radiko** estas diferenco. Same, ĉe **Esperanto, Esperanta, Esperantisto**. *Mi skribas Esperante, esperante tujan respondon*.

estas bazita antaŭ ĉio sur *interkonsento*, tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco; oferi la unuan al la dua mi konsilus nur en tia okazo, se nia Lingva Komitato tion postulus.”

(d) Zamenhof opiniis (OV 356/7), ke gentaj nomoj kondukas al ŝovinismo kaj malpaco; do diplomatoj bone farus, anstataŭigante ilin per nomoj neŭtrale-geografiaj. Boirac, en sia *Plena Vortaro* xix, same diris, ke en okazo de dubo klaso I (-o, -ano) estas preferinda. Tamen la praktiko montras, ke starigi *ĉiujn* nomojn en klaso I ne estas eble.

## (6) UZADO ĈE LA FUNDAMENTO

(a) La Fundamento diras “La Rusoj loĝas en Rusujo, kaj la Germanoj en Germanujo”, kaj UV difinas **-uj** kiel landnoman sufikson, kun la ekzemplo **Turkujo**. La Fundamento estas neŝanĝebla, kaj eĉ se oni uzos ankaŭ alternativajn formojn, la tradicia uzo de **-ujo** restos por ĉiam bona Esperanto. Vidu la antaŭparolon al la Fundamento, kaj fundan esploron pri ĝia signifo en “*B.E.*”, Majo, 1944.

(b) Iuj lernolibroj kaj gazetoj tute bojkotas la Fundamentajn formojn, kaj tiumaniere intence misgvidas la legantojn. Tiu atenco kontraŭ la vivo kaj unueco de la lingvo estas nedefendebila, kaj senrezerve kondamnenda.

## (7) ARGUMENTOJ KONTRAŬ -UJO

(a) “Ĝi estas malbela.” Gustoj diferencas. Kiaj juĝi **-ejo** bela, sed **-ujo** malbela? Miasente, **-ujo** estas pli belsona ol alternativoj proponitaj. Kontraŭ la monotoneco de listo de landnomoj kun la malforta sono **-io**, nomoj kun **-ujo** liveras bonvenan liberigon.

(b) “Ĝia trisignifeco (lando, enhavilo, planto) kondukas al malklareco.” Pri tio Ossaka (*Revuo Orienta*, 1925, p. 1) kaj Corret (LI, 1920, p. 330) atentigas, ke la signifo de vorto dependas ne nur de la radiko, sed ankaŭ de uzado kaj kunteksto. En la praktiko **Germanujo**, **lernejo**, **malfacila**, estas vortoj sendependaj: oni ne dismembrigas ilin ĉiufoje kiam oni uzas ilin.

Teorie estas dezirinde, ke ĉiu vorto havu nur unu signifon. Tiun principon Esperanto obeas pli rigore, ol ĉiu alia lingvo. Tamen ĝia senvaria aplikado estas neebila en lingvo vivanta. En Esperanto, kiel

ankaŭ internacie, multaj radikoj havas plurajn signifojn aŭ nuancojn de signifo. Ekz., **akra, alta, marko, ek, pra, re, ad, aĵ, um, ism**, havas almenaŭ du ĝis kvin diversajn signifojn. La finaĵo **-ŝipo** havas malsamajn rilatojn laŭ la kunteksto: **petrolŝipo** (*movata per*); **aerŝipo** (*veturas en*); **kirasŝipo** (*provizita per*); **batalŝipo** (*uzata por*); **karbŝipo** (*kiu portas*). En la praktiko tio naskas nenian miskomprenon. Neniu lingvo povas vivi sen marĝeno de elasteco.

La argumento ne havas faktan bazon. “Ĉu iu povas imagi, ke *Kristano* estas loĝanto de la lando Kristo? aŭ *Usonano* kredanto al la religio Usono? aŭ *monujo* lando de mono?” (Ossaka). “Neniam eĉ plej malinteligenta idioto supozus, ke *Germanujo* estas arbo sur kiu kreskas Germanoj, aŭ skatolo en kiun oni metas Germanojn; aŭ ke *supujo* estas lando loĝata de supoj” (Corret).

Tamen estas vere, ke **-ujo** ĉe nomo de arbo aŭ planto povetas esti dubesenca: *pomujo* povas signifi aŭ arbon aŭ korbon. Pro tio, kvankam tiu uzo ĉiam restos bona Esperanto, preferindaj estas **-arbo, -planto**, k.s.

(c) “Franclingve la sono ‘uj’ havas malagrablan signifon.” Same malagrablaj por Anglo estas *pi, po, fart, fuk*.... Iam Britaj Esperantistoj komencis demandi “*Kiel vi statas?*”, sed alilingvanoj tolere ridetis je tiu strangajo, kiu baldaŭ mortis. Samtempe kaj samkiale Francoj kaj Belgoj ekuzis *rogi* anstataŭ *peti*, sed ne trovis imitantojn, kaj tio same malaperis. En *Sennaciulo* (11 Okt., 22 Nov., 1938) Perso volis forigi la vortojn *kun, rid*, kaj ĉiujn radikojn kun la silaboj *kir, kos* (ekz., *akiri, kosti*), ĉar Perse tiuj sonoj havas malbelan signifon, kaj malebligas propagandon en Persujo. Sed ne estas eble, postuli, ke neniu sono en unu lingvo havu malagrabalan signifon en alia. Gravigi tiajn tabuojn estas absurde. Vivantan lingvon oni uzu kiel ĝi ekzistas, kaj *honi soit qui mal y pense*<sup>11</sup> (LI 1909, p. 268).

## (8) ELEKTO DE RADIKO

(a) Diversaj cirkonstancoj estas konsiderendaj: ekz., la nomo ĉe la lando mem; internacia uzado; Esperanta tradicio; oportuneco por derivaĵoj.

---

<sup>11</sup> Ndlr: “*Hontu tiu, kiu pensas pri ĝi malbone*”: temas pri frazo en la mezepoka franca, tre konata en Britujo, ĉar ĝi estas la devizo de la plej alta kavalira ordeno.

(b) Plej ofte la nomo uzata de la nacio koncernata estas preferinda. Do **Kimrujo**, ne *Valeso* aŭ *Galo*.

(c) Tamen, se la nacia nomo estas malmulte konata alilande, dum alia radikoj estas internacia, la internacia formo ŝajnas preferinda: **Kroat**, **Montenegro**, prefere ol *Ĥorvat*, *Crno gorac*. Simile: **Aŭstr**, **Finland**, **German**, **Hungar**, **Japan**, ŝajnas preferindaj ol *Ostriĉ*, *Suomi*, *Dojĉland*, *Magjar*, *Nipon*. Tamen *Helen*, *Nipon*, *Suomi*, kaj similaj radikoj, restas eblaj alternativoj por celo poezia aŭ patriota.

## (9) RADIKOJ DISKUTEBLAJ <sup>12</sup>

(a) La formoj **Ĉeĥ**, **Ĉin**, **Flandr**, **Japan**, **Ruman**, nun ĝenerale anstataŭas la pli fruajn **Bohem**, **Ĥin**, **Flamand**, **Japon**, **Rumen**. Anstataŭ **Brazilio** la Brazilanoj nun uzas **Brazil-o**, **-ano**. **Kanad-o**, **-ano**, venkis kontraŭ **Kanad-o**, **-ujo**, kaj **Ĉili-o**, **-ano**, kontraŭ **Ĉil-o**, **-ujo**.

(b) Ĉu **Finlando**, **Finnlando**, aŭ **Suomio**? Ĉu la loĝantoj estas **Finlandanoj**, **Finnoj**, aŭ **Suomianoj**? Ŝajne **Finnlando**, **Finno**, venkas, kun **Suomio** kiel ebla varianto.

(c) **Holando** estas provinco, **Nederlando** lando.

(d) Takahaŝi en 1926 diris, ke la internacia formo **Japan** estas ofenda por Japano orelo, kaj li proponis **Nippon-o** aŭ **Nihon-o**, **-ujo**. Sed la Japanoj mem uzadas **Japanujo**. Tamen **Nipono** (ne *Nippono*) estas ebla varianto.

(e) Okamoto (*Revue Orienta*, 1928, p. 347) diris, ke la formo **Kore-o**, **-ano**, estas malĝusta: la lando **Koreujo** estas loĝata de la **Koreoj**. Tamen **Kore-o**, **-ano**, ŝajne venkas.<sup>13</sup>

(f) En *Litova Stelo* (Aprilo, 1925), Dombrowski kontraŭbatalis proponojn nomi lian landon **Litvujo** (Grabowski), aŭ **Litvanio** (Meazzini), aŭ **Lituvujo** (Stojan). Li diris: “Faru eksperimentojn pri viaj

---

<sup>12</sup> Ndlr: *Kelkaj el la radikoj menciitaj en jena paragrafo, verkita en 1947-8, ne plu estas diskutindaj (Litov-, Uson-); aliaj (Kore-, Meksik-) ankoraŭ vekas polemikojn. Suomio kaj Nipono normale ne estas uzataj.*

<sup>13</sup> Ndlr: *Tion Butler skribis en 1947-8. Nun, sesdek jarojn poste, eblas aserti la malon.*

propraj landnomoj, se vi volos; sed afable permesu al ni nomi nian landon laŭ nia volo. Ni **Litovoj** trovas la Zamenhofan nomon **Litovujo**, uzatan jam 30 jarojn, tute kontentiga.”

(g) Ĉe LR 42 Zamenhof proponis **Meksikio** (lando), kaj **Meksiko** (urbo). Sed *Meksikio* ne estas internacia. Angle oni diras *Mexicans*, ne *Mexicians*. Pli bone estas uzi **Meksiko** por la lando, kaj **Meksikurbo** por la urbo (A: *Mexico, Mexico City*).

(h) Ne ekzistas bona radiko en la Angla lingvo por U.S.A. aŭ por loĝanto en U.S.A. *United States* ne estas sufiĉe preciza: ekzistas aliaj unuiĝintaj ŝtatoj. *America* estas aplikebla al la tuta kontinento. *Yankeeland* estas neebla! Propono farita en U.S.A. kaj Kanado enkonduki *Usona* (*United States of North America*) kaj *Usonian* ne trovis favoron en la Angla lingvo, sed Esperanto ĝin akceptis (**Uson-o, -ano**). (LI, 1907, 214)

## ĈAPITRO V ALTERNATIVOJ AL -UJO

### (10) HISTORIO

*(Sekvas resumeto de artikolo multe pli longa kaj plene dokumentita: ne por malfermi vundojn nun feliĉe cikatriĝintajn, sed nur kiel ĉapitro el pasinta historio.)*

(a) En 1906 G. Moch sendis al la 143 membroj de la Lingva Komitato multajn proponojn pri propraj nomoj kaj ilia transskribo. Unu propono estas anstataŭigo de **-ujo** per **-io**. En 1907 LK starigis komitaton por studi la aferon. Sekve, en 1910 tri el la komitatanoj prezentis raporton kun konfliktantaj personaj opinioj. El ili, la sola persono kiu aprobis **-io** estis Moch mem! Neniu streĉo de la imago povus nomi tion “voĉdono farita de la LK favore al ‘io’”, kiel iuj poste diris. LK nenion ajn voĉdonis.

(b) En 1908 la Akademio (tiam la centra komitato de LK) konsideris la diversajn proponojn. Ĝi malakceptis **-io** per 8 voĉoj kontraŭ 1 (Moch mem!) En 1912, “pro publika kontraŭbatalo de Esperanto”, Moch ĉesis esti LKano, kaj fariĝis Idisto.

(c) En Decembro, 1918<sup>14</sup>, la tiama redaktoro (kaj posedanto) de la gazeto *Esperanto* skribis: “La sufikso **-i** por landnomoj jam estas akceptita de la LK”. Kaj dum kelkaj jaroj en sia gazeto kaj en la Jarlibro de U.E.A. li anstataŭigis la Zamenhofan **-ujo** per **-io**. La U.E.A. membraro ne estis konsultita. Li diris (“*B.E.*”, 1919, p. 79) ke li ne estus farinta la ŝanĝon, se ĝi ne estus rekomendita de la LK! Tamen tian rekomendon la LK neniam faris. Kontraŭe, la Prezidanto de la LK esprimis “ĉagrenon” pri la daŭrigo, malgraŭ ripetitaj protestoj, de “maldisciplino, kiu subfosas la aŭtoritaton de la Lingvaj Institucioj”.

(d) En 1920, la Akademio deklaris: **“Pri landnomoj, la Akademio insiste kaj forte konsilas al ĉiuj Esperantistoj kiuj konscias, ke disciplino estas absolute necesa por konservi la unuecon de nia lingvo (kaj aparte al la gazetoj), uzi nur la Fundamentan kaj tradician finiĝon ‘ujo’: Turkujo, Germanujo, Rusujo, k.t.p.** La Akademio memorigas, ke jam en 1909 ĝi oficiale voĉdonis kontraŭ la sufikso ‘i’ por landnomoj.”

(e) En 1921 la redaktoro de *Esperanto* petis, ke la LK konsideru modifitan formon de lia io-propono. En 1922, per 75 voĉoj kontraŭ 5, la LK malakceptis ĝin, kaj subtenis la Akademion. **Tiun rezulton de la voĉdono kiun li petis, la redaktoro ne raportis al siaj legantoj. Li simple ĝin ignoris.** Okazis tutmondaj protestoj: de la Universala Kongreso; de la naciaj societoj; de membroj de LK kaj U.E.A. Kiam, en la U.E.A. kunveno ĉe la Nurnberga Kongreso (1923), mi mem demandis, kial la U.E.A. malobeas la decidon de la LK, oni de la estrado respondis al mi, ke pri ĉiuj lingvaj demandoj oni sin turnu al la LK! Fine, tamen, U.E.A. cedis, kaj ĉio reordiĝis.

(f) Sed dume, kelkaj Esperantistoj jam ekuzis *-io*, pro la supozita rekomendo de la LK. Krome, pro ideologia motivo, S.A.T. ĝin adoptis. Ĝi ankoraŭ uzigaĉe la maldekstruma gazetaro, kaj fariĝas ia politika

---

<sup>14</sup> Ndlr: En la originala artikolo erare aperis la dato 1908, anstataŭ 1918. *Esploro en la koncernaj numeroj de revuo Esperanto montras, ke la artikolo aperis en decembro 1918. Mi dankas al Rob Moerbeek, kiu kontrolis la datojn. Li informas: “En decembro 1918 Esperanto XIV-a jaro, numero 220 (12), pp 138-140: rubriko Lingvaj Studoj; titolo: ‘Pri la geografiaj nomoj’. Sen aŭtornomo. Ĝi promesas normliston en la sekva numero. Tamen nur en 1919, numero 2, aperos mallonga listo en artikolo subskribita per H.H., evidente la ‘direktoro’ Hector Hodler (p. 30).”*

ŝiboletoj. Tiel naskiĝis la unua (kaj ĝis nun la sola) skismo kaj dissplitiĝo en la movado.

## (11) LA SINTENO DE ZAMENHOF

Ne estas vere, citi Zamenhof kiel favora al *-io*. Efektive, en fruaj tagoj li modeste estis preta akcepti preskaŭ ĉian modifon de la lingvo, se per tio li povus certigi unuecon, kaj silentigi malkontentulojn. Ekz., en 1894, “sub la konstanta bombarado de kritikistoj” kaj “por kontentigi diversajn kriistojn”, li proponis por voĉdono multajn reformojn: ekz., forlasi la korelativojn, la akuzativon, kaj la akordon de adjektivo kun substantivo; adopti “*io*”, doni saman finaĵon al adjektivo kaj adverbo... Kiam, feliĉe, la Esperantista mondo malakceptis tiujn proponojn, Zamenhof skribis pri ili: “Baldaŭ montriĝis, ke tio, kio en la teorio ŝajnis bona, en la praktiko *nenion taŭgis*. Post pli matura pripenso kaj elprovo ĝi montriĝis *tre malbona*,” kaj “tute malbonigus la lingvon”. Li eĉ rajtigis juran proceson lianome kontraŭ iu ajn, kiu represigos tiujn proponojn sen lia permeso.

**Neniam ajn**, krom ĉe tiu reformprojekto, **Zamenhof uzis io** anstataŭ **ujo**. “**Oferi la ĝisnunan uzadon mi konsilus nur se la LK tion postulus.**” Kaj aliloke: “**Se la LK malakceptos vian proponon, submetu vin discipline al ĝia decido...** Ĉiun mature pripensitan kaj orde voĉdonitan decidon de la Komitato mi akceptos sendispute.”

## (12) ARGUMENTOJ KONTRAŬ “IO”

(a) Anstataŭigi Germanujon per *Germanio* estas ŝanĝi la formon donitan en la Fundamento. Vidu Corret: “Ĉu ni faru la unuan ŝanĝon en nia Fundamento?” (LI, Dec., 1920). La nomo mem estas afero relative negrava. Sed la principo koncernas la vivon de la lingvo. “Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon.” Pri la signifo de tiuj vortoj legu la antaŭparolon al la Fundamento, kaj detalan pritrakton en “*B.E.*,” 1944, p. 118. Ekster ĉia dubo, sistema bojkoto de Fundamentaj formoj ne estas pravigebla.

(b) Lingvo grandparte estas afero de konvencio kaj uzado. Diferencoj ĉe la uzo de formoj en ĉiutaga uzo kaŭzas heziton, embarason, ĝenatecon.

(c) Ni jam havas tro multajn vortojn kun la finaĵo *-io*. Lernantoj trovas ĉe ili la ĉefan prononcan malfacilaĵon, kaj volas diri **opinio**, **nenio**,

alia.... Konglomeraĵo de vortoj per *-io* (7a) impresas malagrade: ekz., “*la partio de demokratio en Polio kaj Danio*” de kelkaj brodkastoj.

(d) Ni povas lerni el la historio de Ido. Komence, Ido uzis *-io* (*Italio*). La akcentita “i” montriĝis monotona, malfacila, kaj neinternacia, do oni provis la formon *-jo* (*Italjo*). Fine oni decidis, ke kvankam *Italio* devas esti prononcata *Italjo*, *Sundio* ne havu la prononcon *Sundjo*. Posta komplikaĵo estis la adjektiva finaĵo por landnomaj substantivoj (*Italia*). Esperanto, feliĉe, ne bezonas esceptojn, kaj esceptojn al esceptoj.

(e) Internacie la finaĵo *-io* estas malpreciza. Ĝi povas signifi *sciencon*, *arton*, *landon*, *kampon de agado*.... Reformistoj proponis ĝin en Esperanto kun tiuj signifoj kaj aliaj: la ŝanĝo estas de klareco al mall klareco.

### (13) ĈU “I” ESTAS SUFIKSO?

La ianoj ne interkonsentas: kelkaj diras “jes”, kelkaj “ne”; aliaj, ke iufoje jes, iufoje ne. La demando havas gravecon.

### (14) TEORIO I: “I” ESTAS SUFIKSO

Ĉi tiu teorio estas tute ne subtenebla, kaj verŝajne malmultaj nun defendus ĝin. Kiel sufikso “i” estas anomalio. Ĉiuj aliaj sufiksoj (krom *ĉj*, *nj*, la solaj veraj fleksioj en la lingvo) konsistas el almenaŭ du literoj: kaj ĉiu estas sendependa radiko kun propra signifo. *Hundaĉo* = *aĉa hundo*: *klubano* = *ano de klubo*: *ludema* = *ema ludi*: *beligi* = *igi bela*. Sed ĉe “i” tio ne estas vera: oni ne povas diri *Svisio* = *io de Svisoj*. La vorto **io** kaj la finaĵo **i** jam havas aliajn signifojn. Kiel sufikso “i” havas nenian sendependan signifon: ĝi estas escepto, kontraŭ la genio kaj la aglutina strukturo de la lingvo.

La pledo, ke akcepto al “i” samrangas kun akcepto al **mis**, **ism**, **aĉ**, **end**, ne validas. Ĉi tiuj ne (kiel “i”) enkondukas ŝanĝon al la Fundamento, kaj ili ne estas (kiel “i”) fremdaj al la strukturo de la lingvo. Ili ne estas ŝanĝoj, nek senutilaj alternativoj por aliaj ekzistantaj sufiksoj. La ĉefa misaĵo pri **end** estas la ebla dusenceco de la du vortoj **lavenda** kaj **legenda**. Sed kiam centoj de radikoj fiŝas per *-io*, la danĝero estas multe pli granda. Ekz., *filozof-(koleg-visk-harp-kamel-lin-makaron-pens-pluv-)* *io*.... Ĉu *Sardinio* estas lando de *Sardinioj*? *Germanio* estas metalo, ne lando.



## (15) TEORIO II

### “I” ESTAS PARTO DE LA RADIKO

Pli nova teorio estas, ke “i” ne estas sufikso, sed parto de radiko: do “internaciaj” nomoj kun finaĵo *-io* estas bona Esperanto laŭ Regulo 15. La Akademio definitive malakceptis tiun hipotezon (Feb., 1929). Cetere, kiu povas decidi kiuj radikoj estas “internaciaj”? Kaj ĉu ĝia uzado devas limiĝi al okazoj, ĉe kiuj ĝi estas internacia?

(a) Se “i” en *Germanio* estas parto de la radiko, la loĝantoj de *Germanio* ne estas *Germanoj*, sed *Germanianoj*.

(b) Eĉ se oni akceptus *Germanio*, *Italio*... kiel formojn internaciajn, tio ne pravigus *Anglio*, *Britio*, *Svedio*, kaj similajn formojn, kiuj tute ne estas internaciaj. Nek *Angle*, nek alilingve, oni parolas pri *Britians*, *Francians*, *Swedians*, *Swissians*. Kaj iliaj logikaj derivaĵoj *Japaniano*, *Danianino*... estas netolereble pezaj.

(c) La formo *Anglio* estas aparte malbona: ĉar *England* kaj *Anglia* ne estas samaj: *Anglia* nomas nur kelkajn provincojn de **Anglujo**.

## (16) TEORIO III

### DU RADIKOJ ESTAS NECESAJ

“Ni bezonas samtempe du radikojn (ekz., *Dan-* kaj *Dani-*), anstataŭ nomi kaj landon kaj loĝanton per nur unu radiko (*Dan-*) laŭ Regulo 15.” Tio formas novan komplikaĵon: ĝi ŝveligas la vortaron kaj ŝarĝas la memoron per amaso da radikoj novaj kaj senutilaj. Al kiom da radikoj oni devos aldoni duplikaton? Kaj al kiuj? Kaj kiom tio profitos?

## (17) HEZITOJ : ŜANCELIGOJ

Ĉe ĉiu el la supraj teorioj, ekzistas granda necerteco de uzado.

(a) Ianoj tendencas uzi la formon ĉe radikoj kie ĝi tute ne estas pravigebla laŭ iu ajn teorio, krom kiel ofero de internacieco al unuformeco. Ekz., Bartelmes (*Worker Esperantist*, Aprilo, 1948) parolas pri *Aŭstralioj*, *Braziloj*, *Kanadoj*, kiel loĝantoj de *Aŭstralio*, *Brazilio*, *Kanadio*. Sed tiuj formoj ne ekzistas Esperante aŭ alilingve. Ni ne parolas *Angle* pri *Australs*, *Brazils*, aŭ *Canads*.

(b) Ekzistas dua ŝanceliĝo. Ĉu diri *Franca* aŭ *Francia*, *Dana* aŭ *Dania* (voĉo, vetero, lingvo)?... La malfacilo decidi kiun formon elekti diversokaze montriĝas per la kreskanta ĥaoso ĉe ilia uzado.

(c) La uzo de *-io* ne forigas (kiel oni asertas) la dividon de landnomoj en du klasojn (IV/1). Kaj kiel diveni, ĉu nomo per *-io* estas en klaso I (*Siberio*, *Bolivio*), aŭ en klaso II (*Francio*, *Danio*)? Eĉ J. Elliott, kiu neniel estis konservativulo, konstatis, ke estas konfuzo devi memori, ke el *Bolivio* oni ricevas *Boliviano*, ne *Bolivo*; sed ke el *Bulgario* oni ricevas *Bulgaro*, ne *Bulgariano*. R. Rossetti en artikolo “La malfacileco de *-io*” (*Worker Esperantist*, Jan. kaj Julio, 1948) konstatis tiun malfacilaĵon, kaj klarigis kial, uzinte *-io* dum 17 jaroj, li revenis “firme kaj fortike” al *-uj*.

Sed ĉe la Zamenhofa sistemo nenio dubo estas ebla: la loĝanto de *Kimrujo* estas okulvideble *Kimro*: la loĝanto de *Libio* certe estas *Libiano*.

## (18) DEFENDO DE -IO

(a) “Ĝi estas internacia”. Ĉe kelkaj nomoj jes, sed kun misakcentita “i”: ĉe aliaj, tute ne.

(b) “Ĝi estas neŭtrala, nenacia”. Tute ne! Se *-i* estas sufikso kun signifo “land”, la formoj *Franc-ujo*, *-io*, *-lando*, ĉiuj egale signifas la lando de la Francoj, kaj ĉiuj estas egale neŭtralaj aŭ neneŭtralaj.

(c) “Ĝi estas pli simpla, pli klara”. Ni jam montris, ke tio ne estas vera.

(d) “Ĝi evitas la du-klasecon de landnomoj.” Ankaŭ tio ne estas vera. Se *-io* estas alternativo por *-ujo*, la divido restas tiel same, sed kun aldonitaj komplikaĵoj. Bartelmes (vidu supre) diras, ke la kriterio estas belsoneco kaj analogeco. La Zamenhofa kriterio estas historio kaj internacieco.

(e) “Ĝi estas formo pli bona, pli moderna.” Fakte, oni ĝin diskutis de la plej fruaj jaroj de Esperanto. Cetere, se la plej lasta estas la plej bona, tiam Ido estas pli bona ol Esperanto, Novial ol Ido, Interlingva ol Novia, kaj Suma ol Interlingva!

(f) “Multaj personoj ĝin uzas.” Des pli grave estas, ke tiuj, kiuj scias pli bone, ĝin evitu. Ankoraŭ pli multaj personoj forlasas aŭ misuzas la akuzativon, kaj alimaniere fuŝas la lingvon. Se oni ja ne povas ekstermi la lolon en la kreskanta tritiko, tio ne pravigas dissemi lolon sur la tritika kampo. Ni ne “sekvu la homamason ĉe malbonfaro” (*Eliro* 23/2).

## (19) ALTERNATIVAJ PROPONOJ KUN IO

(a) Uzi *-io* por teritorioj politikaj, *-ujo* por etnografiaj (Stojan, Frost). Ekz., *En Francio loĝas ankaŭ nefrancoj: Francoj loĝas en Francujo, Svisujo kaj Kanado*. Komplikaĵo, kiu estas konfuza, senutila, kaj kun tre limigita aplikeblo.

(b) Uzi *-io* kiam internacia, alie *-ujo*. Propono atakebla de ambaŭ flankoj; krome pro nereguleco kaj necerteco.

(c) Uzi *-io* nur por ŝtatoj formitaj post la unua mondmilito (Christaller). Iom internacia, sed kreas novajn malfacilaĵojn.

## (20) ALIAJ PROPONOJ

(a) Uzi “j” (*Angljo, Aŭstrjo*) (Funken). Tio plibonigas la akcenton, sed fuŝas la aspekton, de la vorto. Neniu ĝin subtenis.

(b) Uzi “-ej” (*Anglejo*). El ĉiuj ne-Zamenhofaj proponoj, tio ŝajnas la malplej atakebla. Sed ĝi plivastigas la jam tro vastan signifon de “ej”, kontraŭas internacian uzadon, kaj kondukas al neklareco. Oni ja povas rigardi partojn de Kanado kaj Belgujo kiel *Francejoj*, aŭ almenaŭ *Franclingvejoj*, sed ili ne estas partoj de Francujo. En Urugvajo troviĝas *Kimrejo*, kaj en Londono *Ĉinejo*, kiuj ne estas *Kimrujo* kaj *Ĉinujo*.

(c) Uzi “ij” (*Anglijo*) (Ellersiek). Tio imitas kelkajn Slavajn lingvojn, sed tiu fakto ŝajnas la sola argumento por ĝi. Povas esti, ke Zamenhof, mem Polo, unue pensis pri *-ijo*, kaj poste plibonigis ĝin per *-ujo*. Sed tio estas nura konjekto.

(d) Aranĝi, ke ĉiu radiko nomu la landon (klaso I) (Sentis, Privat). Tio liveras aŭ (i) el la radikoj *Briti, Dani...*, pezajn neinternaciajn formojn *Britiano, Grekiano, Poliano...*, anstataŭ *Brito, Polo, Dano*, aŭ (ii) el la radikoj *Brit, Dan...*, la formojn *Britano, Danano, Polano* (egale neinternaciajn ĉar internacie *Brit, Dan, Grek, Pol*, estas ne landnomoj sed gentnomoj). La saman proponon faris Bavaj, kun plua rekomendo anstataŭigi *-ano* per *-ulo* (*Peruo, Peruulo!*).

(e) Formi ĉiun landnomon per *-io* (klaso I). Tio liveras pezajn neinternaciajn formojn: *Amerikio, Amerikiano: Grenlandio: Irlandiano!*

(f) Aranĝi, ke ĉiu radiko nomu la loĝanton (klaso II), nomante la landon per *-ujo* aŭ *-io*. Tio signifas neinternaciajn pleonasmojn, ekz.,

*Islandujo, Finlandujo, aŭ Islandio, Finlandio*, sen kompensa profito. Cetere, tio rekte kontraŭas la Zamenhofan idealon, ke ĉiuj nomoj estu en klaso I (5d).

(g) Fari la radikon neŭtrala, nomante landon per *-ujo*, kaj loĝanton per *-ano*. Ekz., *Franĉujo, Francano*. Tio donas formojn longajn kaj neinternaciajn. Cetere, la simplaj formoj *Anglo, Franco*, tiam havus nenian signifon ajn.

(h) Uzi du apartajn radikojn sensufikse: unu por la lando, la alia por la loĝanto. Ekz., *Dano, Danmarko: Sviso, Helvetio: Anglo, Englando*. Senutila kaj neregula komplikaĵo!

(i) Uzi unu solan radikon sensufikse, nomante la loĝanton adjektive (Euquem). Ekz., *Franco = Franĉujo, Franca = Franco*. Tio estas neinternacia, kaj rompas la regulon ke substantivo finiĝas per *-o*.

(j) Uzi la nacian radikon senŝanĝe: *Deutschland*, aŭ

(k) Uzi ĝin kun fonetika transskribo (*Dojĉland*). “Konsiloj de malespero”, kiuj implicas, ke Esperanto ne kapablas esprimi landnomojn.

## (21) RESUMO : KONKLUDO

**Neniu sistemo estas aŭ povas esti nekritikebla. Sed la Zamenhofa sistemo estas altgrade internacia, logika, kaj praktika. Ĉiuj aliaj proponoj kontraŭdiras unu la aliajn: kreas malfacilaĵojn, anomaliajn, kaj konfuzon: kaj estas multe pli kritikeblaj.**

**La Zamenhofa sistemo ne nur estas ĉiel la plej bona: ĝi estas la sola sistemo aprobita de la LK (Akademio), la sola por la lojala Esperantisto. Pri ĉi tiu demando (kiel diris Privat pri io alia), “ĉiu devas forlasi iun ajn konsideron pri personoj, prestiĝo, venko, aŭ malvenko, kaj vidi nur la bonon de nia lingvo.”**

M. C. BUTLER

36, Penrhyn Road, Kingston on Thames,  
Surrey, Anglujo.<sup>15</sup>

---

<sup>15</sup> Ndlr: Por kompleteco mi redonas ĉi tie la adreson de Butler, kiu aperas en la originala artikolo. Tamen notu, ke Montagu Butler mortis en 1970, do estas senutile nun skribi al tiu adreso!

# Nia fundamente perfekta lingvo

Brunetto Casini

Oni demandis min, kial “mi ankoraŭ preferas -ujon”.

Mi respondis, ke eventuale oni devus klarigi al mi, kial oni malpreferu ĝin.

*Ujo* estas enhavilo, kiu entenas aŭ kolektas aron da ekzempleroj de tio, kion reprezentas la radiko kiun ĝi plidifinas.

Tial *dokumentujo* estas io, en kio kolektiĝas dokumentoj; *rubujo* io, en kio kolektiĝas rubaĵoj; *pomujo* arbo, en kio kolektiĝas pomoj; *frambujo* arbusto, sur kiu kolektiĝas framboj; *Italujo* lando, en kiu vivas italoj, *Toskanujo* regiono, en kiu vivas toskanoj.

Kaj veras, ke oni ankaŭ povas diri *pomarbon*, anstataŭ *pomujo*, sed ankaŭ eblas renomi *dokumentskatolo* la dokumentujon, *rubkesto* la rubujon. Kaj tiu anstataŭigado eblas ankaŭ por aliaj sufiksoj: rideto povas esti *malgranda rido* aŭ eĉ *preskaŭrido*, sportejo *sportsalono* aŭ *sportkampoj* ktp.

Se oni volus, oni povus ŝanĝi simile la tutan lingvon aŭ almenaŭ grandan parton de ĝi: tion malpermesas la Fundamento, sed pri tio fajfis De Beaufront kaj aliaj poste. Kaj la Fundamento asertas, ke *Rusujo* estas la lando, kie vivas rusoj. *Rusio* kaj *Ruslando* ne aperas en ĝi, ĉu ne?

Esperanto havas kiel pozitivan karakterizaĵon sian simplecon kaj koheron, kiu mankas en tioma grado al ĉiuj t.n. “naturaj” lingvoj. Ni povus sintezi, ke ĝia “malnatureco” estas unu el ĝiaj kvalitoj, ĉar ĝi troviĝas ĉefe en ĝiaj “bonaj” flankoj: kiu volus anstataŭigi “kial” per “perkeo” kaj “tiom” per “tantao”, tiel uzante vortojn “pli naturajn” sed perdante la genian simplecon de la korelativoj?

Simile, ne evidentas kial oni devas uzi *Pollandon* kaj *Italion* simple por paŭsi la naciajn lingvojn, kiam *Polujo* kaj *Italujo* plene, klare, sinteze kaj fundamente esprimas la saman koncepton; kaj plie, mi ne vidas, kial lernanto devu memori, ke oni diras *Pollandon* prefere ol *Polion* sed *Italion* prefere ol *Itallandon*.

Idistoj malgajnis sian batalon: kial ni devas plu suferi tiajn iliajn virusojn en nia fundamente perfekta lingvo?

## « La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo. »

Francisko Simonnet

“*La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo.*” El tiu frazo en la *Fundamento de Esperanto*<sup>16</sup> ni lernas multon: interalie ion pri la uzo de la artikolo, pri la uzo de vortokomencaj literoj grandaj ĉe nomoj de regnoj kaj respektive malgrandaj ĉe nomoj de gentanoj (tamen pri ĉi tio ne plene firme, ĉar en iuj aliaj lokoj en la *Fundamento* oni trovas grandajn), pri unu senco de la verbo *loĝi*, pri unu senco de la finaĵo *as*, pri la permeso ne intermeti komon kaj diri nur unufoje la verbon en okazo de du samaverbaj propozicioj kunigitaj per *kaj*.

Sed ni lernas precipe tion, ke el nomo de loĝanto aŭ ĉefgentano nomon de la lando oni kunmetas per almeto de la sufikso *uj’*. La frazo estis tie enmetita ĝuste por tion sciigi al ni. Ĉi tion konfirmas la jenaj vortoj el la *Universala Vortaro*:

**uj’** qui porte, qui contient, qui est peuplé de; ex. [...] **Turk’** Turc—**Turk’uj’** Turquie | filled with; e.g. [...] **Turk’uj’** Turkey | Behälter, Träger (d. h. Gegenstand worin... aufbewahrt wird,... Früchte tragende Pflanze, von... bevölkertes Land); z. B. [...] **Turk’** TÜRKE—**Turk’uj’** Türkei | вмѣститель, носитель (т. е. вещь, въ которой хранится..., растение несущее...или страна заселенная...); напр. [...] **Turk’** Турокъ—**Turk’uj’** Турція | zawierający, noszący (t. j. przedmiot, w którym się coś przechowuje, roślina, która wydaje owoc, lub kraj, względem zaludniających go mieszkańców ; np. [...] **Turk’** turek—**Turk’uj’** Turcyja.

Ŝajnas, ke ĉio direbla pri la landonomoj en la lingvo internacia estas per tio jam dirita. Eĉ sufiĉus la titolo citita frazo el la *Ekzercaro*, sen ia aldono.

Tamen, ni krome scias, ke iuj landoj estas nomataj per radiko sen sufikso. Tiaj estas, ekzemple, *Brazilo*, *Kanado* aŭ *Nepalo*. Pri tiuj venas demando, kiel oni nomu la loĝantojn aŭ la regnantojn.

---

<sup>16</sup> *Ekzercaro*, paragrafo 40-a, frazo 19-a.

Kvankam tiaj landonomoj ne aperas en la *Fundamento*, oni trovas tie la rimedon por el landonomo fari nomon de enloĝanto aŭ de regnano:

**an'** membre, habitant, partisan; ex. **regn'** l'état—**regn'an'** citoyen | inhabitant, member; e. g. **Nov-Jork**<sup>17</sup> New York—**Nov-Jork'an'** New Yorker | Mitglied, Einwohner, Anhänger; z. B. **regn'** Staat—**regn'an'** Bürger; **Varsovi'an'** Warschauer | членъ, житель, приверженець; напр. **regn'** государство—**regn'an'** гражданинъ; **Varsovi'an'** Варшавянинъ | członek, mieszkaniec, zwolennik; np. **regn'** państwo—**regn'an'** obywatel; **Varsovi'an'** Warszawianin.

Do el nomo de iu loko aŭ de iu institucio oni ekhavas nomon de homo tie loĝanta aŭ iel al tiu apartenanta per almeto de la sufikso *an'*. Tion konfirmas la paragrafo 37-a de la *Ekzercaro*:

[...] Ĉiuj loĝantoj de regno estas regnanoj. – Urbanoj estas ordinare pli ruzaj, ol vilaĝanoj. [...] La Parizanoj estas gajaj homoj. – [...] Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj. – Li estas nelerta kaj naiva provincano. – La loĝantoj de unu regno estas samregnanoj, la loĝantoj de unu urbo estas samurbanoj [...].

Rimarku, ke la almeto de *an'* ne igas malgranda la komencan literon grandan de la landonomo (*Rusujanoj*)!

Iuj landoj estas nomataj nek per radiko propra, nek el la nomo de sia loĝantaro, sed el nomo de io alia. Pri tiaj oni ne trovas indikojn specialajn en la *Fundamento*. Sed ankaŭ por tiaj okazoj valoras la normala maniero fari en Esperanto vortojn bezonatajn, kiun fiksas unuavice la regulo 11-a de la *Fundamenta Gramatiko*. Ekzemple, la nomo de la lando nomata laŭ la rivero Senegalo malfacile povus esti en Esperanto io alia ol *Senegallando* aŭ *Senegalolando*; la nomo de la lando nomata laŭ sia ĉefurbo Luksemburgo malfacile povus esti en Esperanto io alia ol *Luksemburglando* aŭ *Luksemburgolando*.

Nun ni vere jam preskaŭ ĉion diris pri nomado de landoj kaj landanoj en la lingvo internacia. Pendantaj restas nur demandoj tre specialaj, el kiuj multaj apenaŭ estas lingvaj. Ekzemple, ĉu tiu lando, kies ĉefurbo estas *Andoro Malnova* (aŭ, eble pli bone:

---

<sup>17</sup> Atentu, ke **Nov-Jork** certe estas kompostista eraro anstataŭ la bezonata **Nov-Jork'** !

*Andoro la Malnova*), estu nomata *Andor(o)lando*, aŭ, konforme al sia kutimo, *Andoraj Valoj* aŭ *Andora Valaro*, aŭ per ia alia vorto aŭ duvortaĵo, komenciĝanta per *Andor(o)val(ar)* kaj enhavanta la radikon *land'*? Eble propre lingva tie estas nur tiu demando, ĉu eneston de *land'* oni nepre postulu ankaŭ tiam, kiam tiu venus apud iun alian vorteron jam indikantan, ke temas pri ia regiono. Tiun demandon mi en la nuna teksto lasos senresponda.

### **Kial do oni pri la landonomoj en Esperanto disputadis dum multaj centoj da paĝoj?**

Oni tamen multe pridisputadis pri la landonomoj en Esperanto, kaj oni plu bezonas tiel fari, pro diversaspecaj kaŭzoj, el kiuj iuj estas pravigeblaj, aliaj ne.

Unuflanke, en la elektado de la uzotaj radikoj, kiam tiuj ankoraŭ ne ekzistas aŭ ne estas kontentige fiksitaj, oni devas iom cerbumi: Kiun el la fontalingvaj formoj oni preferu? Kiel la elektitan formon oni internaciigu? Ĉu signifon havantajn nomojn oni laŭsignife traduku aŭ oni nur laŭforme adaptu al la internacilingva ortografio? Laŭ kiuj reguloj oni faru la necesajn transskribojn kaj adaptojn? Disputado pri tiaspecaj demandoj ofte estas respektinda kaj ofte utila. Sed ni klare komprenu, ke tio ne rilatas al la funkciado de Esperanto; tio rilatas nur al elekto por Esperanto de vorteroj bezonataj kaj mankantaj, aŭ respektive al enpreno aŭ ne-enpreno de vorteroj novaj.

Bedaŭrinde la multa disputado havis ankaŭ alispecajn kaŭzojn, kiuj agis ankaŭ interne de la ĵus menciitaj per si mem pravigeblaj disputoj, kaj ekster tiuj. Iuj homoj nepre volis fari ŝanĝojn en la lingvo, kvankam tiaj ne necesis, aŭ pro nuraj kapricoj, aŭ pro troa imitemo al lingvoj aliaj, aŭ pro deziro anstataŭigi Esperanton per iu alia, nova lingvo, havanta, ekzemple, alian alfabeton aŭ alian sufiksaron. Al multaj lernintoj kaj lernantoj de Esperanto oni instruadis kaj instruadas iujn tiajn novajn lingvojn ne dirante al tiuj kompatinduloj, ke tio ne estas Esperanto. Kulpas la instruintoj kaj la instruantoj, ne la lernintoj kaj lernantoj, ke ĉi tiuj eraras. Mi esperas, ke la nuna libro kontribuos al la bezonataj reĝustigoj.



La lingvon internacian ja difinas la *Fundamento de Esperanto*, publikigita en Parizo en la jaro 1905-a kaj samajare en Bulonjo ĉe Maro sankciita de la Unua Universala Kongreso de Esperanto per la paragrafo 4-a de la “Deklaracio pri la esenco de la Esperantismo”, el kiu mi citu la jenon:

[...] La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo «Fundamento de Esperanto», en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj “tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto”. Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la «Fundamento de Esperanto», ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

Tio klare signifas, ke Esperantistoj “havas la rajton” nek “fari ŝanĝon” en la *Fundamento*, nek “dekliniĝ[i] de la reguloj kaj modeloj donitaj en [tiu] verko”, kaj ke nur por diri ion, “kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la «Fundamento de Esperanto»,” ili rajtas ĉerpi el aliaj fontoj. Kiu ne submetiĝas al tio, tiu ne rajtas nomi sin Esperantisto, kaj kiu instruas iun lingvoformon ne konforman al tio, dirante, ke Esperanton li instruas, tiu estas mensogisto. Pro respekto al la honestaj erarigitoj, indas reveni al punktoj tute ne pridisputeblaj kaj jam tro multe pridisputitaj.

Krome multo estas vere pridisputebla; kaj oni povas, konsentante pri la principoj, tamen havi pri iuj demandoj opiniojn malsamajn, ĉar la *Fundamento* difinas Esperanton ja ne-ŝanĝebla, sed ne plene. Ne el la *Fundamento*, ekzemple, ni scios, ĉu unu grandan Afrikan riveron ni nomu *Kongo* aŭ *Kongolo* aŭ *Zairo*, nek, sekve, kiel ni nomu tiujn landojn, kiujn laŭ tiu rivero oni kutime nomas, nek kiamaniere ni distingigu tiujn du landojn; nek ni scios, ĉu unu Nord-Afrikan urbon, el kiu unu landon oni nomas, ni nomu *Tunis*’o, kiel Zamenhof, aŭ *Tuniz*’o,

kiel iuj francoj. Alian ekzemplon vidu pli supre, pri la lando de Andoro. Do la nuna libro ne elĉerpos la temon de landonomado.

Bedaŭrinde ne nur iuj privatuloj emis forgesi, ke Esperanton difinas la *Fundamento de Esperanto*, sed ankaŭ tiuj institucioj, kies tasko propra estas tion rememorigadi al la Esperantistaro, nome la Lingva Komitato kaj la Akademio de Esperanto.

Rilate al landonomado aparte gravas la jeno, kion oni povas legi en la *Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro*<sup>18</sup>:

### 3. La sufikso -io

La Akademio, konsiderante, ke la Lingva Komitato, kiam ĝi en 1922 malkonsilis la enkondukon de la sufikso -io por formi landnomojn, bazu sian decidon sur la konstato de la tiama uzado;

konstatante, ke nuntempe, malgraŭ tiu oficiala malkonsilo, la uzado de tiu sufikso -io ne malkreskis, sed male disvastiĝis;

[...];

[...] nuligante la antaŭan malkonsilon de la Lingva Komitato, sed ne ŝanĝante ĝin al rekomendo, lasas al la ĝenerala uzado libere decidi pri la venko de la pli oportuna formo.

Tion el la kvardek tri tiamaj membroj de la Akademio aprobis tridek tri!

Tute klare estas, ke la Lingva Komitato en la jaro 1922-a nenian konsilon rajtis doni pri tia temo. Nenion alian ĝi rajtis fari, ol rememorigi, ke laŭ la *Fundamento de Esperanto* landonomon el landanonomo oni ricevas per almeto de la sufikso *uj*´, kaj admoni, ke oni ne dekliniĝu de la Fundamenta modelo. “Konstatante, ke nuntempe, malgraŭ tiu oficiala malkonsilo, la uzado de tiu sufikso -io ne malkreskis, sed male disvastiĝis”, la Akademio havis la devon rediri la samon. Nenion pli!

Eble ĝi tamen povus krome atentigi, por malhelpi eblan miskomprenon, ke, kvankam sufikso *i*´ estas ne-permesebla, tamen la litero *i* povas aperi kiel la lasta litero en iu radiko landonoma, kiel, ekzemple, en *Aŭstralio* aŭ en *Polinezio*.

Ne temas nur pri formo de kelkaj centoj da landonomoj. Temas por la Esperantistoj pri lojaleco al sia lingvo kaj al sia samlingvanaro, por la homaro pri la ununureco de ĝia internacia

---

<sup>18</sup> *Aktoj de la Akademio, II. 1968-1974*, paĝo 14-a.

lingvo. Por membroj de la Akademio de Esperanto, kiuj antaŭ sia elektiĝo devis certigi la Prezidanton de la Akademio pri sia “fideleco al la *Fundamento*”<sup>19</sup> la devo estas nepra.

Sed ankaŭ se ĝi ne kunpuŝiĝus kun unu Fundamenta sufikso, ia “sufikso *-io*” estus tute ne ebla. Kun escepto de la multrilate apartaj lingvorandaĵoj *ĉj´* kaj *nj´*, ankaŭ kiuj ne konsistas el vokalo sola, la sufiksoj de Esperanto konsistas el vokalo venanta antaŭ konsonanto aŭ konsonantogrupo. Nu, la proponata *i´* ne havas tian konsiston, kaj ankaŭ pro kelkaj pliaj kialoj ne estus akceptebla. Do rusoj ne povas loĝi en “*Rusio*”.

Al tio oni kelkafoje respondas, ke, se la preparolata lando ne povas esti nomata *Rus´i´o*, ĝi tute bone povas esti nomata *Rusi´o*, kun radiko *Rusi´*, alia, ol la radiko *Rus´*. Efektive povus ekzisti ia radiko *Rusi´* apud la radiko *Rus´*, simile kiel ekzistas la radiko *lini´* apud la radiko *lin´* aŭ la radiko *pensi´* apud la radiko *pens´*. Sed tiu radiko ne povus esti la nomo de tiu lando, en kiu loĝas la rusoj, ĉar *la rusoj* ja “*loĝas en Rusujo*”.

Kvankam malpli okulfrape, ankaŭ formoj kiel *Alĝerio* aŭ *Tunizio* estas mallaŭdindaj kaj rigardeblaj kiel kontraŭaj al la *Fundamento*. Estus ja malfacile ne vidi, ke tiaj landonomoj estis devenigitaj de la nomo de la respektiva ĉefurbo. Nu, ĉar *i´* nek estas, nek povas esti Esperanta sufikso, *Alĝerio* ne povas deveni de *Alĝero* en Esperanto. Uzante parojn similajn al *Alĝerio* kaj *Alĝero* oni do anstataŭigas Esperanton per iu alia lingvo. En Esperanto lando nomata laŭ la urbonomo *Alĝero* malfacile povus esti io alia ol *Alĝerlando* aŭ, por multaj pli facile elparoleble, *Alĝerolando*. Iel simile, lando nomata laŭ la familinomo de *Bolivar* malfacile povus esti io alia ol *Bolivarlando* aŭ *Bolivarolando*; kaj malfacile lando, kies nomo celas indiki, ke ĝi estas la “Lando de Libero”, povus esti io alia ol *Liberlando* aŭ *Liberolando*.

Pro la malprava proponado de *i´* kaj la deziro ne partopreni en disputadoj, iuj volis ne elekti inter tiu *i´* kaj la Fundamenta sufikso *uj´*. Tiuintence ili anstataŭ tiu lasta uzadas la radikon *land´* post radiko nomanta landanon, simile kiel ili aŭ iuj aliaj uzadas la radikon *arb´* anstataŭ tiu sama *uj´* en nomoj de arboj post radiko nomanta ties frukton. Per tio ili malpli krude

---

<sup>19</sup> Statuto de la Akademio, § 9-a.

kripligas la lingvon internacian, ol faras la uzantoj de la ne-ebli *i'*, ĉar radiko *land'* nepre ekzistas en tiu lingvo (ni vidis, ke per ĝi oni faru landonomojn el nomo de io alia, ol landano). Sed ili ja devojiĝas de la Fundamento, laŭ kiu “*La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo*”. *Ruslando* (kiun foje uzis Zamenhof mem, eble, krom la tuj dirota kialo, almenaŭ parte pro premo de la kutimo de kelkaj novaj uzantoj de Esperanto la lingvon ankoraŭ ne firme regantaj) estus pravigebla nur per intenco komprenigi, ke oni ne konsentas, ke tiu lando estus la lando nur de la rusoj, kvankam kun rusoj ĝi ja havas ian rilaton (al tia pravigo tamen malinstigas la Fundamenta frazo: “*Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj*”<sup>20</sup>).

Speciale miriga kaj maltrankviliga estas la konduto de tiuj, kiuj, certe sen tiaspeca intenco, uzadas kunmetaĵojn kun la radiko *land'* ne pri ĉiuj landoj, sed nur pri kelkaj. Al formo *Finlando* instigis la similaj formoj troveblaj en multaj lingvoj, inter kiuj unu el la lingvoj de tiu dulingva lando mem (*Finland*); pli kontentiga estas la formo *Finnlando*, ankaŭ uzata de kelkaj, ĉar temas pri lando de finnoj, ne de finoj, sed tiu estas apenaŭ elparolebla, por multaj eĉ tute ne. Ankaŭ *Skotlando* estas apogata de la propralingva formo (*Scotland*). Kvankam tio neniel pravigas tiujn formojn, tio iagrade komprenigas la emon ilin uzi. Sed kion oni pensu pri homoj, siadire Esperantistoj, kiuj nomas Polujon (polalingve *Polska*, latinalingve *Polonia*) per *Pollando*, aŭ Svisujon (sialingve *Schweiz*, *Suisse*, *Svizzera*, *Svizra*, latinalingve *Helvetia*) per *Svislando*, dum tiujn du formojn apogas nur la lingvo angla?

Estas tre bedaŭrinde, ke, pro influo de la lingvo franca, oni la loĝantojn de tiu lasta lando nomas *svisoj*. Pli kontentige estus uzi la radikon *Svis'* por tiu vilaĝo, de kies nomo devenis tiu de la lando. Tiam la lando estus nomebla *Svislando*, kaj ties homoj *Svislandanoj*. Mi timas, ke estas jam tro malfrue por tion reordigi.

Ni ne tuŝis ĉion tuŝindan pri la nomado de landoj, kaj ne al ĉiuj levitaj demandoj ni alportis respondon. Tamen okazus granda

---

<sup>20</sup> *Ekzercaro*, paragrafo 37-a, frazo 9-a.

pliboniĝo de la internacilingva afero, se tio, kion ni ĵus rememorigis al ni, estus malpli ofte malatentata. Oni ne mallaŭdu, ke nenio science nova nek surprize sprita estas ĉi-supre legebla: la intenco humile estis nur rememorigi kelkajn nepraĵojn.

*La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo, do la skotoj en Skotujo kaj la poloj en Polujo (kaj la ĥinoj en Ĥinujo: en la ofte renkontataj formoj ĉino kaj Ĉinio ni havas ekzemplon de la kripligado de la alfabeto, kiun pli supre nur per aludo ni tuŝetis). Luksemburgo estas la ĉefurbo de Luksemburgolando, Meksiko tiu de Meksikolando. Borde de la rivero Senegalo kuŝas Senegalolando, kaj Paragvajolando borde de la rivero Paragvajo. Oni povus ne havi la vortinternajn substantivajn o; mi rekomendas ties enŝovon por faciligi al multaj la elparoladon.*

Pli grave: Esperanton difinas la *Fundamento de Esperanto*. Por interkompreniĝo de lando al lando kaj de jarcento al jarcento nepre gravas, ke la uzantoj de tiu lingvo tion ne forgesu, alivorte: ke la lingvon internacian de doktoro Esperanto oni ne anstataŭigu per iuj lingvoj aliaj ol tiu. Ankaŭ ŝanĝo de unu sufikso povas fari el iu lingvo iun lingvon alian.

# Kamikazoj loĝas en Kamikazujo!

Petro Desmet'

**Ludo:** Ŝajnas ke Anna Löwenstein reinventis la varman akvon! Ŝi relanĉas la diskuton pri la landnomoj, kaj predikas reiron al la fundamenta *-ujo!*

**Viko:** Ĉu vere? Mi tute ne sciis ke ŝi havas kamikazajn intencojn. Cetere ŝi tamen ne reinventis la varman akvon sed nur remetis la kaldronon sur la fornon. Ĉiukaze mi aplaŭdas reiron al la Fundamento, ĉar kiel vi scias mi ja estas fundamentisto. Bonega afero, ke ni havas la Fundamenton, ĉar danke al ĝi ni disponas pri fonto kiu ĉiam denove inspiras nin.

**Ludo:** Kio pri remetita kaldrono?

**Viko:** Nu, kiel vi mem aludis, jam estis pli ol unu fojon diskutoj pri tio. Oni inventis ĉiuspecajn novajn sufiksojn. Sed mi ne pensas ke ĝis nun iu estis sufiĉe inteligenta por proponi la veran sanan solvon: ni reiru al nia fonto!

**Ludo:** Nu, kaj kial tiuj proponoj ne sukcesis? Kial oni ne akceptis almenaŭ unu el la proponitaj novaj sufiksoj?

**Viko:** Sendube ankaŭ vi jam spertis tion. La plej bona maniero por estigi akrajn disputojn estas lanĉado de amika interŝanĝo de ideoj pri lingvaj problemoj, kaj plej akraj ili fariĝas kiam temas pri propraj nomoj aŭ eĉ nur pri geografiaj nomoj.

**Ludo:** Tamen estus bona ideo, se ni havus tute ĝeneralan regulon pri formado de landnomoj. Ĉu vi opinias tion ebla?

**Viko:** Ne pre jes. Eĉ ne tro malfacila tasko, kondiĉe ke oni ne petu al komitato! Oni sekvu la konsilon de Zamenhof, ofte ripetata en PIV: "Konsiliĝu neniam kun lingvisto, konsiliĝu nur kun personoj, kiuj havas filologian senton kaj havis multe da praktiko en Esperanto."

**Ludo:** Ne tro ĝentilan opinion ŝajne la Majstro havis pri lingvistoj!

**Viko:** Aĥ, mi supozas ke Zamenhof skribis tion kiam li laciĝis pro la emo de iuj lingvistoj nepre plibonigi la lingvon. Cetere, estas

tre verŝajne ke en iu aŭ alia perdita loko troviĝas lingvisto kun filologia sento, kaj kiu eĉ praktikas Esperanton!

**Ludo:** Ĉu vi vere pensas ke en ĉiuj kazoj oni povas trovi solvon?

**Viko:** Nepre! Dum vizitoj al iamaj komunismaj landoj mi konstatis ke la gejunuloj tie kutimas reguligi jam multon! Por ili mi ne estis Belgo, mi ne estis Flandro, sed mi estis Belgiano kaj Flandriano. Aliaj estis Francianoj, Germanianoj ktp... Post komenca ŝoko mi rapide alkutimiĝis, kaj trovis la solvon ne malbona. Almenaŭ oni ne plu devus kontroli ĉu la *i* de *io* estas parto de la radiko, aŭ parto de la finaĵo.

**Ludo:** Nu ja, vi loĝas en lando kiu havas grandan sperton pri lingvaj problemoj! Kaj kiu do eble estas pli elasta en tiaj demandoj ol normaluloj!

**Viko:** Bona esperanta ekzemplo ĉe ni estas la tre malnova esperantigo de la nomo de Valonia urbo. Temas pri Charleroi. Tute klare malfacile esperantigebla nomo! Se oni esperantigas laŭsone ĝi estus *Ŝarlerŭa*, kaj la ortografio ja estus tre malproksima de la originalo kaj plie la uzo de *ŭ* komence de silabo estas diskutebla. Kuraĝe oni prenis laŭvortan tradukon *Karloreĝo*, kiu eĉ, miru se vi volas, mi neniam legis protestojn kontraŭ tiu nomo. Solvado vere ĉiam eblas kaj ne bezonas superan inteligentecon.

**Ludo:** Do kial ne jam longe?

**Viko:** Mi ne kredas ke ankoraŭ estas eble ŝanĝi ion ajn en nia lingvo per decidoj de alte. Aliflanke la lingvo evoluis kaj evoluas! Nur se la gravaj revuoj akceptus iun aplikadon de iu sistemigita tutaĵo, sen multe da diskutado kaj kun endormiga lulado de la protestantoj, ĝi povus sukcesi. Mi sincere pensas ke reiro al la fundamenta *-ujo* kun repenso de iuj bazaj radikoj, estus beno (kaj bono) por ĉiu ajn... Oni nur devos redifini kelkajn, plej ofte nefundamentajn, radikojn. Enkonduko de formoj kiaj *Niponujo*, *Suomujo*, *Baratujo* ktp... vere signifus progreson! Ni sloganu: "Progreso per Regreso!"

# **-i- minacas la kernan strukturon de Esperanto**

Rudolf Fischer

Multaj Esperantistoj havas problemojn uzi la ĝustan nomon de landano, ĉar kutime en Esperantaj revuoj kaj eĉ en kelkaj vortaroj oni ne plu trovas la formojn de la landonomoj kun *-uj-*. Tiel oni renkontas en Interreto malĝustajn formojn kiel *\*Francano* kaj *\*Usonio*<sup>21</sup>. La sistema ne-uzo kaj ankoraŭ pli klare la malpermeso de *-uj-* estas kontraŭ-Fundamenta. Kial valoras konservi la uzon de *-uj-* por “lando”?

## **(Mal)avantaĝoj de *-i-* kaj *-uj-***

Mi mallonge menciuj la lingvoteoriajn avantaĝojn de *-i-* kaj *-uj-*, kaj oni atentu, ke kutime la avantaĝo de unu formo samtempe estas malavantaĝo de la alia.<sup>22</sup>

Avantaĝoj de *-i-*:

- i1) Evitas la homonimecon kun *-uj-* “vaz-” kaj kun la fakte arĥaika “-arb-”.
- i2) Pli internacia (sed se oni kontrolas tiun argumenton laŭkvante, ĝi ne estas tre konvinka).
- i3) Laŭdire “politike pli akceptebla”, ĉar ekzemple en Germanujo ne loĝas nur (etnaj) Germanoj.
- i4) Pli ofte uzata nuntempe (pro la influo de lernolibroj, vortaroj, revuoj, vidu supre).

---

<sup>21</sup> “Kolumbus ... esploris porciojn de la nunaj Kubio, Puertorikio kaj Bahamio. ... En 1508, [Juan Ponce de Leon] esploris Puertorikion; Jamaikion en 1509.” Tion publikigis la “Hejmo de la Dept. de Defendo de Usonio.” (Fonto: <http://www.neta.com/~1stbooks/edefen1.htm>)

<sup>22</sup> Pli detalan diskutadon oni trovas en mia artikolo “Sprachwandel im Esperanto am Beispiel des Suffixes *-i-*,” aperinta en *Linguistische Informationen*, Beiheft 11, 2004, eldonata de Gesellschaft für Interlinguistik, Berlin, aŭ havebla de la aŭtoro.



i5) Pli facila por nespertaj Esperantistoj, kiuj povas uzi ĝin en landnomoj, ne atentante, ĉu -i- apartenas al la vortradiko, ĉu al la finaĵo.

Avantaĝoj de -uj-:

uj1) Fundamenta formo.

uj2) Obeas al la Fundamenta strukturo de sufikso per sia formo VK(K). (V = vokalo, K = konsonanto; sole -*estr-* havas la formon VKKK)<sup>23</sup>.

uj3) Estas uzebla kiel memstara vorto konforme al la Esperanta lingvostrukturo.

uj4) Evitas homonimecon kun pluraj morfemoj de Esperanto kaj kun (pseŭdo)afikso -i- (ekz. en *biologio*, *Luksemburgio*, *Germanio*, *demokratio*, *mikroskopio*, *io*, ktp.).

uj5) Klare montras, ke la radiko antaŭ ĝi nomas la landanon.

### Nuna uzo kaj lingvoŝanĝiĝo

En la praktiko dum la lastaj jaroj pli kaj pli venkis -i- kontraŭ -uj-. La kaŭzoj laŭ mia opinio estas ĉefe jenaj. Unue punkto i3 supre: Pro tiu duba politika kialo (oni povas ja same diri: *En Germanio ne loĝas nur Germanoj*) estiĝis punkto i4. Kiel la lingvouzantoj konduku alimaniere, se lernolibroj kaj vortaroj prisilentas -uj-? Gravas tamen ankaŭ punkto i5: Lingvoŝanĝiĝo inklinas al pli leĝeraj formoj, eĉ se tiuj minacas la regulecon de la lingva strukturo! Tio validas ankaŭ por vaste parolata planlingvo.

### -i- minacas la kernan strukturon

La ĝenerala uzo de -i- fakte minacas la kernan lingvan strukturon de Esperanto! Kaj sekve ĝi estas vere - nerekte - kontraŭ-Fundamenta. Kiel mi pruvu tiun (espereble) iom ŝokan aserton per faktoj?

---

<sup>23</sup> Nur -ĉj- kaj -nj- devias de tiu koncepto, sekve lezas laŭgrade la striktan aglutinecon de Esperanto, sed tio estas alia temo.

Unue: la ekskluziva uzo de *-i-* en landnomoj, kiel jam menciite, kaŭzas, ke tre multaj Esperantistoj ne plu regas la nomojn de la koncernaj landanoj. Pluraj praktikaj kaj sistemaj testoj, kiujn mi okazigis, pruvis la pravecon de tiu aserto. Antaŭ nelonge mi aŭdis en internacia rondo de Esperantistaj fakuloj(!) multajn tiajn erarojn, ekz. *Koreanoj*, *Vjetnamanoj*, ktp. (Ĝustas: *Koreoj* kaj *Vjetnamoj*).

Due: tiu ĉarma *-i-* havas interesan evoluon. Jam oni vidas, ke ĝi afliktas landonomojn kun ĝisnuna simpla vortfina *-(land)o*: *Nederio* (anstataŭ *Nederlando*), *Meklenburgo* (vortaroj de Erich-Dieter Krause) > *Meklenburgio*<sup>24</sup>, ktp. Ĝi estas uzata plivastasence por esprimi ajnan lokan signifon: *Nordio*, *Ŝengenio*<sup>25</sup>, *Horzonio*<sup>26</sup>, *tenebrio*<sup>27</sup> ktp. Ĝi kunfandiĝas kun la pseŭdosufikso *-i-* en *filozofio*, *geografio*, k.a. kun la signifo “tereno”, “kampo”, jam al figura senco “faktereno” > “fako”. Simile ĝi estas intertempe uzata por aliaj derivaĵoj, deviate ĉiam pli de la signifo “lando”. Ekzemple: *tirano* > *tiranio*<sup>28</sup>. Dum la una eldono de *Plena Ilustrita Vortaro* (1970) prezentas ankoraŭ “nur” kvar diversajn signifojn de *-i-*, *La Nova Plena Ilustrita Vortaro* (2002) jam distingas sep! Resume: Ĝi estas survoje al (neregula) pseŭdoderivilo kun ajna signifo (sekve ĝi perdas entute konkretan signifon).

Jam *La Nova Plena Ilustrita Vortaro* avertas, ke *-i-* komencas anstataŭi *-ec-*. Same oni povas aŭguri, ke baldaŭ ĝi servos ankaŭ por *-ej-*. Tiel Esperanto perdos iom post iom siajn famajn semantikajn dimensiojn, esprimatajn per la diversaj afikso(vorto)j kiel *-ul-*, *-aĵ-*, *-ec-*, *-ej-* ktp. Tio estas tipa naturalisma evoluo, rekte kontraŭ la ne-naturalisma, reguleca,

---

<sup>24</sup> *La Nova Plena Ilustrita Vortaro* (2002), *Etimologia Vortaro de la Propraj Nomoj* de André Cherpillod (2005).

<sup>25</sup> La landoj, kiuj subskribis la kontrakton de Schengen. (*Kontakto* 2006:3).

<sup>26</sup> Zono, kiun oni fiksas por la uzo de sama horo (*Kontakto* 2006:3, citaĵo).

<sup>27</sup> Fikcia “lando de tenebro” (*En usa tenebrio* de Don Harlow); komparu kun *tenebrio* (speco de skarabo).

<sup>28</sup> Aperis nove en *La Nova Plena Ilustrita Vortaro*, kiu klarigas: “regado ...”. Kp. *demokrato* - *demokratio*.

aŭtonoma lingvostrukturo de Esperanto, alivorte kontraŭ la Fundamento.

### **Malbona ekzemplo en vortaro**

Kompletan konfuzon kaŭzas la *Etimologia Vortaro de la Propraj Nomoj* de André Cherpillod (2005). Ĝis nun ĉiu bona vortaro montris klare la radikon de landonomo por ebligi regulan derivadon de la nocio por la landano. Ekzemple: *German/ujo, -io* aŭ simile. Cherpillod forlasis tiun sistemon kaj indikas anstataŭe, ĉu landonomo devenas de alia nomo. *Deveni* ne signifas “esti regule derivata”! Ekzemple: ĝusta prezento estus *Alĝeri/o*; nur tiel oni klare vidus, ke la landano-nomo estas *Alĝeriano*. Sed ĉar *Alĝerio* kompreneble devenas de la nomo de la ĉefurbo Alĝero, Cherpillod skribas *Alĝer’io*. Tiel nun ne plu estas dedukteble, kiel nomiĝas la landano, kaj tio pliprogresigas la fenomenon, ke multaj Esperantistoj ne plu regas la landano-nomojn.

### **Alvoko al la Esperantistoj**

Por kontraŭagi tiun fatalan evoluon, mi jen alvokas ĉiujn respondecemajn redaktistojn kaj aŭtorojn, precipe tiujn de lernolibroj kaj vortaroj, uzi sisteme la sufikson *-uj-* por la koncerna grupo de landonomoj, kaj mi tre rekomendas tion ankaŭ al la ordinaraj Esperantistoj, kiuj celas regi la nomojn de la landanoj. Esperanto estas altgrade regula kaj facila; “naturalisma” evoluo iom post iom detruus ĝian unikan strukturon.

## -ujo: finaĵo plej bela

Jorge Camacho

Antaŭ sufiĉe multe da jaroj mi ŝanĝis mian uzadon de *-io* al *-ujo*. Probable en mia rakontaro *Sur la linio* (eldonita en 1991) videblas ĉi diferenco inter la unuaj rakontoj kaj la lastaj. La sufikso *-ujo* estas pli klara kaj preciza: *en Germanujo vivas germanoj, en Bolivio - bolivianoj (ne bolivoj)*.

Male, *-io* ne permesas scii kiu parto de vorto estas la radiko. Antaŭe mi ial trovis la sufikson *-ujo* “malbela”, probable ĉar la formoj kun ĝi ne similas tiujn de multaj eŭropaj lingvoj, finiĝantajn per *-ia*. Mi tamen vidas ke la hungara uzas senprobleme la finaĵon *-ország*, aŭ la ĉina *-kuo*, ambaŭ signifantajn “-lando”, kaj neniu kabeis el tiuj lingvoj ĉi-kiale. *Germanujo* same naturas kiel *Németország* aŭ *Tekuo* (pinjine *Deguo*) respektive hungare kaj ĉine.

Aliflanke, mi uzadas *-io* por distingi regnon de ĉefurbo (*Meksiko/Meksikio*) aŭ de alia rilata nomo (*soveto/Sovetio*), ankaŭ por iamaj politikaj entoj (*Romo/Romio*) kaj por nuntempaj regnoj, por kiuj esperantuloj ankoraŭ ne elektis apartan nomon: *Sudafrikio* (distinge de *Suda Afriko* aŭ *Sud-Afriko* por la geografia plurregna sudo de la kontinento, laŭ la uzo de Privat en *Vivo de Gandhi*: tre interesan ĉapitron de la sudafrika historio konsistigas la sudafrika apartismo) aŭ *Sahario* (por la Demokratia Sahara Araba Respubliko, okupanta nur parton de Saharo).

Plej absurde estas, ke kelkaj umbilikismaj egomaniuloj volas krei distingon inter *Esperantujo* kaj *Esperantio*, alproprigante al si ĉi lastan kaj disdonante atestilojn pri purrasa esperantuja civitaneco! Sed tiu temo ne plu koncernas esperantologojn kaj esperantologion, sed psiĥologojn kaj psiĥologion...

# Ni metu *-ion* en la ujon!

Marcel Leereveld

Dum duona jarcento (1934-1983) mi uzis *-io* anstataŭ *-ujo* por landoj, ĉar mi estis membro de SAT, kaj SAT iniciatis jam antaŭ 1934 uzi ĉiam *-io* anstataŭ *-ujo*.

Nur post lingvismaj studoj (de 1970 ĝis 1980) mi eltrovis, ke la uzado de la sufikso *-i-* estas kontraŭ la spirito de Esperanto kaj krome kreas esceptojn al la Esperanta vortfarado.

Jen la tialoj:

- 1) La sufikso *-i-* egalas al la finaĵo *-i* de la infinitivo. Neniu alia sufikso egalas al finaĵo. Tio do estus escepto.
- 2) Ĝi estas la sola sufikso de nur unu litero. Tio do estus escepto. Zamenhof sendube ne kreis unuliterajn sufiksojn por ne tro densigi la lingvon.
- 3) Unu el la karakteraĵoj de Esperanto estas, ke oni povas, kiam tio utilas, uzi ĉiujn afiksojn memstare, kaj en ĉiuj kategorioj: *ujo*, *ejo*, *emo*, *fia*, *eta*, *ina*, *iĝi*, *igi*, *ege* ktp. La sufikso *-i-* kreas vortojn, kiuj estus samaj al jam ekzistantaj sed havus tute alian signifon: *io* = lando, *ia* = landa, *ie* = en landa maniero, *iu* = estu lando. Tio do kreas homonimojn nepre evitindajn.
- 4) Uzante *-ujo* post popolnomo oni tuj scias, ke la radiko estas popolnomo, kaj ke la finaĵo *-io* sekve ne estas sufikso, sed fina parto de radiko de lando, kies popolo do formiĝas per *-ano*: *Koreujo* → *koreo*; *Ĉilio* → *ĉiliano*. Se oni uzas la sufikson *-io* oni ne estas certa: *Indonezio* → ĉu *indonezo* aŭ *indoneziano*? *Bolivio* → ĉu *bolivo* aŭ *boliviano*? *Moldavio* → ĉu *moldavo* aŭ *moldaviano*? Ni devus lerni por ĉiu lando kun *-io* ĉu ĝi estas radiko aŭ lando farita el popolnomo. Tre malpraktike!

- 5) La sufikso *-i-* estas (necesita) neologismo, tial polucianta la lingvon.
- 6) La oficiala sufikso *-uj-* figure uzata por landoj neniam kaŭzis miskomprenojn.

Do, se oni uzas la t.n. sufikson *-i-* por landoj, oni enkondukas gramatikajn esceptojn kaj necesajn homonimojn, tiel malfaciligante la lingvon. Tio estas ago kontraŭ Esperanto kaj kontraŭ nia racio.

## ***Francujo* trovas lokon en mia koro**

**Fra Gaeta**

Kutime mi uzas la vorton *Francio* parolante pri ĝi pro ia ajn kialo, sed kiam temas pri intima sento al mia lando, mi ŝatas nomi ĝin *Francujo*. Tiel ĝi pli bone trovas lokon en mia koro.

# Esperanto, lingvo de paco kaj toleremo

Franciska Toubale

Vi certe legis kaj aŭdis tiun diraĵon, ke Esperanto estas la lingvo de paco kaj toleremo. Por konvinkiĝi, mi proponas al vi eksperimenton: skribu libron aŭ artikolon, aŭ traduku sufiĉe gravan verkon. Elektu paroli en ĝi pri *Francujo*, *Germanujo*, *Koreujo* ktp. Petu kelkajn homojn de diversaj devenoj ke ili reviziu vian tekston.

Sen komento, ili tuj korektos viajn *-uj*-formojn al *-io* (*Francio*, *Germanio*, *Koreio*). Se vi insistas, ili anoncos al vi, ke vi estas aŭ malmoderna homo, kiu forgesis evolui, aŭ eĉ malbona SATano ĉar en SAT neniu uzas *-uj*.

Trankvile, vi klarigas ke estas granda diferenco inter *Aŭstrali-o* kaj *Ital-i-o*, ke vi ne povas akcepti la decidon uzi *-i-* kiel sufikson por la landnomoj, ĉar *-i-* jam havas alian rolon en Esperanto. Plie, ne eblas alikategoriigi ĝin kiel *-et / eta*, aŭ *per / peri*, ĉar *ie* kaj *ia* jam ekzistas. Kaj cetere, ĉu ne estas pli simple tuj scii, ke se la lando nomiĝas *Rusujo*, la civitano havos la nomon *ruso*? Ĉion ĉi mi lernis de Marcel Leereveld, kiu regule aperigas artikolojn en *Laŭte* pri lingvaj problemoj. Li instigis min pripensi kaj finfine uzi tiun pli simplan sistemon.

Damne! se vi persistas en la uzo de la sufikso *-uj*, anstataŭ kontraŭargumentoj venas insultoj, minacoj. Amikeco kun kelkaj homoj estas en danĝero. Vi perfidis kaj ne kapablas rekoni vian eraran konduton. Subite vi komprenas la sorton de la unuaj kristanoj aŭ de la judoj dum la Inkvizicio, kiuj ne volis rezigni pri sia religio.

Mi kore dankas la du literojn *-uj*, kiuj montris al mi, ke esperantistoj povas esti pli batalantaj ol pacaj.

# La Esperantaj landnomoj tamen kontentigaj

Edwin de Kock

*La sekvonta artikolo estis verkita en 1983, responde al artikolo de Bernard Golden.*

Antaŭ kelka tempo Bernard Golden asertis (*Horizonto*, n-ro 22, p. 86), ke la landnoma sistemo en Esperanto estas malregula, eble eĉ pli ol tiu de la naciaj lingvoj. Leginte tiun misideon, mi komence ne reagis, sed nun ektrovas, ke ĝi efektive stimulas al nenecesa reformemo sur ĉi tereno. Mi do demonstros la plenan erarecon de la Goldena tezo, kaj ke la Esperantaj nomoj por teritorioj kaj ties loĝantoj efektive estas kontentigaj kaj neŝanĝendaj. La nunaj formoj montriĝas facilaj kaj konsekvencaj ĝis alta grado.

Mia deirpunkto estu komparo inter Esperanto kaj la du naciaj lingvoj kiujn mi konas plej bone, nome la Angla kaj la Afrikansa. Unue ni konsideru la jenajn listojn, kiujn mi kompilis iom rapide kaj tial nekomplete.

## Angle

Tipo	Teritorio	Loĝanto	Adjektivo
1	America	America/n	America/n
2	Italy	Itali/an	Itali/an
3	Egypt	Egypt/ian	Egypt/ian
4a	Belgium	Belgi/an	Belgi/an
4b	Norway	Norw/egian	Norw/egian
5	Europe	Europ/ean	Europ/ean
6	Israel	Israel/i	Israel/i
7	Asia	Asia/tic	Asia/tic



8	Spain	Span/iard	Span/ish
9a	Iceland	Iceland/er	Iceland/ic
9b	New Zealand	New Zealand/er	New Zealand
10	France	French/man	French
11a	Japan	Japan/ese	Japan/ese
11b	China	China/man	Chin/ese
12	Congo	Congo/lese	Congo/lese
13	Holland	Holland/er	Dutch

<b>Tipo</b>	<b>Adjektivo</b>	<b>Loĝanto</b>	<b>Teritorio</b>
1a	English	English/man	Eng/land
1b	Cornish	Cornish/man	Corn/wall
2	Brit/ish	Brit/on	Brit/ain
3	Swiss	Swiss	Switzer/land
4	Dutch	Dutch/man	Netherlands
5	German	German	German/y
6	Greek	Greek	Greece
7	Afghan	Afghan	Afghan/istan

<b>Tipo</b>	<b>Loĝanto</b>	<b>Adjektivo</b>	<b>Teritorio</b>
1	Malay	Malay/an	Malay/a
2	Arab	Arab/ian	Arab/ia
3	Pole	Pol/ish	Po/land
4	Turk	Turk/ish	Turk/ey
5	Swede	Swed/ish	Swede/n
6	Dane	Dan/ish	Den/mark

Por konstati la diferencojn, iufoje subtilajn, oni devas atenti ankaŭ la sonojn. Ekzemple la literoj *ti* en *Egypti/an* reprezentas fonetikan ŝanĝon al *ŝ*, kompare kun la *t* en *Egypt*. En la Angla do troviĝas entute - parte pro ĝia granda malreguleco - almenaŭ 30 manieroj formi nomojn por la teritorioj, kune kun ties loĝantoj kaj la koncernaj adjektivoj. Por kompari jen:

## Afrikanse

<b>A</b>	<b>Tipo</b>	<b>Teritorio</b>	<b>Loĝanto</b>	<b>Adjektivo</b>
	1a	Amerika	Amerika/ner	Amerik/aans
	1b	Itali/ë	Itali/aner	Itali/aans
	2	Span/je	Span/jaard	Spaan/s
	3a	Brasili/ë	Brasili/aan	Brasili/aans
	3b	Peru	Peru/viaan	Peru/viaans
	4	Europa	Europ/eaan	Europ/ees
	5	China	Chin/ees	Chin/ees
	6	Kongo	Kongo/lees	Kongo/lees
	7	Japan	Japan/nees	Japan/s, Japan/nees
	8a	Nieu-Seeland	Nieu-Seeland/er	Nieu-Seeland/s
	8b	Noorweë	Noorwe/ër	Noorwee/gs
	9	Australi/ë	Australi/ër	Austra/lies
	10	Israel	Israel/i	Israel/s
	11	Vlaandere	Vla/ming	Vlaa/ms
<b>B</b>	<b>Tipo</b>	<b>Adjektivo</b>	<b>Loĝanto</b>	<b>Teritorio</b>
	1	Engels	Engels/man	Enge/land
	2	Duits	Duits/er	Duits/land
	3	Frans	Frans/man	Frank/ryk
<b>C</b>	<b>Tipo</b>	<b>Loĝanto</b>	<b>Adjektivo</b>	<b>Teritorio</b>
	1a	Griek	Griek/s	Griek/eland
	1b	Rus	Russ/ies	Rus/land
	2	Belg	Belg/ies	Belgi/ë
	3	Brit	Brit/s	Britt/anje
	4	Sweed	Sweed/s	Swed/e
	5	Argentyn	Argentyn/s	Argentin/ië
	6	Hongaar	Hongaar/s	Hongar/ye
	7	Deen	Deen/s	Dene/marke
	8	Afgaan	Afgaan/s	Afgan/istan

En la Afrikansa ekzistas ne malpli ol 26 manieroj formi nomojn por teritorioj, kun ties loĝantoj kaj la rilataj adjektivoj.

Kaj jen la skemoj Esperantaj:

<b>A</b>	<b>Tipo</b>	<b>Loĝanto</b>	<b>Adjektivo</b>	<b>Teritorio</b>
	1	German/o	German/a	German/ujo
	2	Rus/o	Rus/a	Rus/lando
<b>B</b>	<b>Tipo</b>	<b>Teritorio</b>	<b>Adjektivo</b>	<b>Loĝanto</b>
	1	Island/o	Island/a	Island/ano

Tipo A2 estas malpli ofta ol kaj interŝangebla kun tipo A1. Oni rajtas ankaŭ diri *Rus/ujo* aŭ *German/lando*. Tio ne eblas en la supraj ekzemploj el la nacilingvoj. Oni ja povas Angle diri *Asia/n* anstataŭ *Asia/tic*, sed tute ne *Span/ish* por *Span/iard*, aŭ Afrikanse *Griek/er* apud *Griek*.

Kaj nun ni povas konkrete testi la aserton de Golden, ke Esperanto estas tiel neregula kiel la naciaj lingvoj, aŭ eĉ pli kaosaj ol ili. Du aŭ tri bazaj tipoj en Esperanto kompariĝas ne malbone kun la 30 en la Angla aŭ la 26 en la Afrikansa, ĉu?

Krome ni observu, ke la Esperantaj ekvivalentoj de la supraj listoj estas regule uzeblaj kaj tial kroĉiĝas multe pli facile en la memoro. Eĉ en la propra lingvo gepatra la infano baraktas distingi la multajn tipojn konfuzige proksimajn unuj al la aliaj. Kontraŭ tio la tuta kaoso de la multaj tipoj supre donitaj, Angle kaj Afrikanse, reduktiĝas en Esperanto al simpla ordigo duopa. Jen de ili pliaj ekzemploj laŭ la deirpunkto:

**Regiono:** Amerik/o, Argentin/o, Aŭstrali/o, Azi/o, Brazil/o, Eŭrop/o, Holand/o, Island/o, Israel/o, Kong/o, Kornval/o, Nederland/o, Nov-Zeland/o, Peru/o. *Kun ĉi radikoj uzu -a por la adjektivo kaj -ano por la loĝanto.*

**Loĝanto:** Afgan/o, Angl/o, Arab/o, Belg/o, Ĉin/o, Dan/o, Egipt/o, Flandr/o, Franc/o, German/o, Grek/o, Hispan/o, Hungar/o, Ital/o, Japan/o, Malaj/o, Norveg/o, Polo/o, Rus/o, Sved/o, Svis/o, Turk/o. *Kun ĉi radikoj uzu -a por la adjektivo kaj -ujo aŭ -lando por la teritorioj.*

Jen baze ĉio. Sed ĉu ne ekzistas problemetoj? Mi ne kontestas, ke iufoje la efektivo aspektas alia ol la teorio. Jen kaj jen oni povas argumenti, ekzemple pri tio, ĉu *Egipt/o* devus esti homo aŭ lando, aŭ ĉu ekzistas *Belg/o* anstataŭ *Belgi/ano*. Sed tiaj detaloj, facile ĝustigeblaj, ne tuŝas la esencan regulecon de la sistemo Zamenhofa. Efektive la sola vera problemo granda estis

kaŭzita far iuj miscelaj samideanoj per sia enkonduko de la fuŝa sufikso *-io* por anstataŭi *-ujo*. Tiel kreiĝas konfuzaj neregulaĵoj kie ili neniam ekzistis antaŭe. Laŭ la Zamenhofa sistemo oni diras:

1) *Aŭstrali/o* - *Aŭstrali/ano* sed 2) *Angl/o* - *Angl/ujo*. Sed ŝanĝi *Angl/ujo* al *Angl/io* necesigas tutan serion da modifoj de la tipo *Angl/o* al *Angl/i/ano* aŭ *Aŭstrali/ano* al *Aŭstral/o*. Alie la Zamenhofa skemeco disfalas ĉi-punkte.

Kaj ĉu la Naturalistoj inter ni neniam pensas pri la rezulta malbeligo de la lingvo? Laŭtleĝu: *Ĉeestis Anglo, Ĉino, Ruso, tri Usonanoj, Aŭstraliano kaj Zuluo*, kaj tiam: *Ĉeestis Angliano, Ĉiniano, Rusiano, tri Usonanoj, Aŭtraliano kaj Zuluiano*. Kiel la misrimo de la plurfoje ripetataj *-ano*, kiu portas la vortakcenton, agacas homon kun orelo sentema! Sed ekzistas spiritoj sen ajna respekto por aferoj estetikaj. Ili kompreneble ne apartenas al la sama specio kiel Zamenhof.

Ni do konsideru du pliajn faktorojn.

Unue, la sistemo de Esperanto utiligi kaj la landnomon kaj la vorton por loĝanto kiel bazon por pluformado verŝajne konsistigas la plej ordan eblon per la materialo prenita el la naciaj lingvoj tiel malregulaj, kiel ni jam vidis rilate al la Angla kaj la Afrikansa. Redukti ĉion al unu skemo alportas tro multajn kripligojn.

Due, la nuna sistemo ne konsistigas lezon de la morfologio Esperanta. Tute kontraŭe. Ĉe la unua rigardo la Internacia Lingvo ja ŝajnas ege regula, kvazaŭ ĝi estus maŝino; sed ekzameno pli profunda rivelas ankaŭ aspektojn malsimetriajn. Tiel estas ĉe la artaĵoj. Ni neniam forgesu, ke Esperanton elpensis poeto kaj ne matematikisto. Zamenhof estis kaj racia kaj sentema.

Por la landnoma fenomeno ekzistas en nia gramatiko pluraj paralelaĵoj, tiel ke oni povas utiligi pli ol unu rimedon atingi la saman rezulton. Jen kelkaj:

Por indiki personon ni uzas iufoje radikon, sed alikaze tion plus sufikso, ekzemple *tajloro* apud *dent/isto* aŭ *matrono* apud *vir/ino*. Parenecas al tio la instrumentoj, kiel *martelo* kaj *ĉiz/ilo*. Same la lokoj. Ni parolas pri *salono* sed *manĝ/ejo* (eventuala ankaŭ pri *manĝoĉambro*).

Analoge al tiu variemo estas la diferenco inter verboradikoj transitivaj kaj netransitivaj, kion oni devas lerni por ĝusta uzado. Tiel diferencas laŭkaraktere la similsignifaj *fini* kaj *ĉesi*. Per tio oni pluformas ilin malsame. El *fini* oni konstruas *finiĝi*, sed el *ĉesi* *ĉesigi*.

Plue mi aludas tion, ke ne ĉiuj substantivoj en Esperanto finiĝas necese per *-o*, ĉar ekzistas regulo permesanta ties elizion, per kiu multe riĉiĝis nia poezio. Samas ĉe la aliaj vortspecoj. La adjektivo ne finiĝas senvarie per *-a/j* (komparu *ambaŭ homoj*, *multaj homoj* kaj *ĉiuj homoj*) aŭ la adverbo per *-e* (ĉar kantistino ne kantas nur *bele*, sed *hodiaŭ*, *tiom* aŭ *iam*). Kaj eĉ ne ekzistas unu finaĵo por karakterizi la verbon kiel tian, nur specifigiloj: *-as*, *-is*, *-os*, *-us*, *-u* kaj *-i*. La lingvo estas harmoniaĵo, sed ne mekanisme simetria.

Tiu plurformeco ne indikas ian mankon en Esperanto, sed pruvas kontraŭe ke ĝi estas homa lingvo. Kiu jukas ĉion skemigi, tiu ne komprenas la sistemon Zamenhofan en ĝia baza aglutineco aŭ aspektoj artismaj.

Ĉiukaze ni nun agnosku, ke la dueca skemo fari niajn landnomojn, pasintecce tro kritikita, per si mem prezentas nek malregulaĵojn, nek ion esceptan en Esperanto, sed fenomenon tute konforman al ĝia spirito. Ne ekzistas ajna kialo ŝanĝi tion reformisme kaj kontraŭ-Fundamente.

# Tankae pri *uj*

Tacuo Huĝimoto

Tankae pri *uj*  
Mi provos versi tuj,  
Nome pri gentuj',  
Do ankaŭ pri Japanuj',  
Kaj same pri Italuj'.

En Bulgarujo  
Oni tamen evitu  
Ĝin uzi buŝe,  
Ĉar ĝi sonas tro krude  
En senco seksorgana.

Ĉiam esceptoj  
Troviĝas ĉiuteme,  
Ankaŭ landnome,  
Do funkcias *Japani'*  
Same ankaŭ *Itali'*.

Mi estas tamen  
Nature konvinkita  
Pri valideco  
De *ujo* ĉe landnomo  
Malgraŭ ĉio kaj ĉiuj.

Sed ja kaj tamen  
De tempo al tempo, mi  
Foje malgraŭ mi  
Cedas al cirkonstancoj  
Kaj uzas *Japanion*.

Tamen kaj tamen  
Principe mi ja restas  
*Uj*-praktikanto  
Kiel Zamenhofida  
Fundamentisto tuta.

Cetere *io*  
Fundamente signifas,  
En la serio  
Korelativa ion  
Sed neniom landnomon.

# Instrui la landonomojn

Anna Löwenstein

La leciono pri landonomoj: kia okazo por elrevigi la lernantojn! Ili estas firme konvinkitaj pri la simpleco kaj logikeco de Esperanto, sed nun necesos prezenti al ili sistemon kiu estas nek simpla, nek aparte logika. La tasko tamen estas certe pli facila por tiuj instruistoj, kiuj uzas *-ujo*, ol por tiuj, kiuj uzas *-io*; la du partoj de la landonoma sistemo almenaŭ estas klare indikitaj per malsamaj finaĵoj, anstataŭ konfuziĝi en laŭŝajne sama finaĵo kun du funkcioj.

Mi de pluraj jaroj instruas Esperanton laŭ la Cseh-metodo, kaj laŭ la normoj de tiu metodo ellaborigis lecionon por instrui la landonomojn. Antaŭ ol priskribi tiun lecionon necesas memori, ke la Cseh-metodo estas konversacia metodo; tial, instruante la nomojn de landoj kaj loĝantoj, mi evitas simple prezenti tedajn listojn. Enkondukante tiujn nomojn, mi konstante starigas pri ili demandojn al la lernantoj: “Kiu estas la ĉefurbo de Francujo?”, “Ĉu vi iam vojaĝis al Grekujo?”, “Kia lando estas Svedujo?”, “En kiu kontinento estas Ĉinujo?”, “Kiu estas la ĉef-ministro de Germanujo?” “Kion trinkas la italoj/japanoj/britoj?” kaj simile. Krom aldoni intereson al la leciono, tio signifas, ke la lernantoj komencas tuj mem uzi la vortojn en vera kunteksto, kio helpas ilin parkerigi ilin.

## Preparoj por la leciono pri landonomoj

Esenco de la Cseh-metodo estas zorga pretigado de ĉiu leciono. Ĉiu nova vorto aŭ gramatikaĵo estas bazita sur tiuj jam lernitaj.

Antaŭ ol instrui pri la landonomoj mem, mi preparas la terenon en pli frua leciono, instruante la du bezonotajn sufiksojn *-ujo* kaj *-ano*.

- *-ujo*: Mi instruas vortojn de la speco *sukerujo*, *teujo*, *monujo*, *abelujo*, ankaŭ *pomujo*, *pirujo* ktp. (tamen menciante, ke oni ĝenerale preferas la alternativon kun *-arbo!*), kaj ankaŭ nedetale tuŝas ĝian uzon en landonomoj, ekz. *Italujo*, *Britujo*, kiujn la lernantoj jam de tempo al tempo renkontis neformale.



- *-ano*: Mi kaptas la okazon por instrui la nomojn de la kvin kontinentoj kun ties loĝantoj: *afrikanoj*, *amerikanoj* ktp. Tiuj nomoj por parolantoj de eŭropaj lingvoj estas tuj rekoneblaj. De tie mi progresas al loĝantoj de urboj: *romanoj*, *parizanoj*, *londonanoj* ktp., kaj finfine al vortoj kiaj *urbano*, *vilaĝano*, *familiano*, *komitatano*, *kristano*, *islamano*. Mi evitas en ĉi tiu fazo mencii la uzon de *-ano* por nomi landanojn (*usonano*, *niĝeriano*), ne dezirante jam komenci la klarigon pri la du-parta sistemo, kiun mi traktos en la posta leciono.

## La leciono mem

Mi komencas per tiaj demandoj: “Kiel oni nomas la homojn, kiuj loĝas en Italujo?” , “En kiu lando loĝas la angloj?” Baldaŭ do aperas sur la maldekstra flanko de la tabulo tian liston:

norveg/o	Norvegujo
hispan/o	Hispanujo
japan/o	Japanujo
ĉin/o	Ĉinujo ktp.

(Kial ĉe la maldekstra flanko de la tabulo? Tio fariĝos klare poste!)

Nun eblas klarigi en simpla Esperanto la regulon: “La simpla radikoj signifas la homon. Oni aldonas la finaĵon *-ujo* por fari la nomon de la lando.” Mi aldonas komence de la listo titolon:

<u>Homo</u>	<u>Lando</u>
x-o	X-ujo

Alkutimiĝinte al la simpleco de Esperanto, la lernantoj emas nun supozii, ke finiĝis la leciono; evidente ili jam lernis ĉion, kion ili bezonas scii pri formado de lando- kaj popol-nomoj en Esperanto! Venis la momento por senluziigi ilin: “La sistemo de landonomoj en Esperanto havas du partojn. Sed ni lernis nur la unuan parton. Nun ni lernos la duan parton.”

Finfine mi dividas la tabulon en du partojn per vertikala linio laŭ la mezo. En la dekstra flanko mi komencas listigi ekzemplojn de jena speco, unue donante ilin mem, poste petante pli de la lernantoj. Nur poste mi aldonos la titolon:

<u>Lando</u>	<u>Homo</u>
X-o	x-ano
Brazil/o	brazilano
Niĝeri/o	niĝeriano
Aŭstrali/o	aŭstraliano
Ĉili/o	ĉiliano
Uson/o	usonano

Notu la diagonalan strekon, kiu dividas la radikon de la finaĵo. Tio aparte utilos en la postaj paŝoj, kiam mi prezentos la ŝajnfinaĵojn *-lando* kaj *-io*; estos grave distingi, kie finiĝas la radiko.

“Ni jam lernis la sistemon *Italo loĝas en Italujo*. Oni uzas tiun sistemon ĉefe por eŭropaj popoloj, sed ankaŭ por kelkaj aliaj, ekzemple ĉinoj, japanoj, etiopoj ktp.

“En la dua parto de la sistemo, la simpla radiko indikas la nomon de la lando, ekzemple *Brazil-*, kaj oni aldonas la finaĵon *-ano* por fari la nomon de la homo, kiu loĝas tie: *brazilano*.

“Sed estas du problemoj. Foje oni povas uzi la finaĵon *-lando* anstataŭ *-ujo*.”

Nun mi komencas doni ekzemplojn, unue ĉe la maldekstra flanko de la tabulo:

pol/o	Polujo / Pollando
skot/o	Skotujo / Skotlando
svis/o	Svisujo / Svislando
finn/o	Finnujo / Finnlando

“Sed rigardu la nomojn *Irlando, Islando, Nederlando*. Kiu loĝas en ili?”

Provante respondi tiun demandon, la lernantoj tuj vidas, ke la sistemo ne funkcias. Tial eblas nun aldoni en la dekstra flanko de la tabulo:

Irland/o	irlandano
Island/o	islandano
Nederland/o	nederlandano

Nun oni vidas la utilon de la dividolinio meze de la tabulo. La lernantoj propraokule vidas, ke iuj nomoj aldoniĝas al la

maldekstra flanko, aliaj al la dekstra. Ili ne povas preteratenti la fakton, ke ekzistas du kategorioj, kaj ke *Svislando*, ekzemple, apartenas al unu kategorio, dum *Islando* apartenas al la alia. Pri la dua grupo mi klarigas: “-lando ne estas finaĵo. Oni ne povas forpreni ĝin. Ĝi estas parto de la radiko.”

Nun venas la lasta malfacilaĵo. “Tio estas la unua problemo. La dua problemo estas la finaĵo -io. Mi mem ĉiam uzas -ujo, sed multaj homoj preferas -io. Ekzemple, anstataŭ *Italujo* oni povas diri *Italio*; anstataŭ *Francujo* oni povas diri *Francio* ktp.” Je ĉi tiu punkto, mi aldonas (-io) kiel alternativan finaĵon post la jam listigitaj landonomoj ĉe la maldekstra flanko de la tabulo.

“Sed rigardu tiujn nomojn: *Ĉilio*, *Niĝerio*, *Aŭstralio* ktp. En tiuj nomoj, -io ne egalas -ujo. Tiuj landonomoj estas en la dua parto de la sistemo.”

Por fini, mi disdonas liston de lando- kaj popol-nomoj al la lernantoj, kaj ankaŭ kvizon por solvi hejme. La kvizo konsistas el listo de ĉefurboj; apud ĉiu urbo la lernantoj devas skribi la nomon de la koncerna lando. Kutime ili ĝuas tiun taskon, ĝuste ĉar ĝi estas prezentata kiel kvizo. Kaj tamen, krom instrui plurajn konatajn urbonomojn en Esperanto, ĝi devigas ilin konsulti la liston kaj praktike ekuzi kelkajn el la landonomoj. Tial ne necesas nepre listigi ĉiujn dum la leciono; estas pli grave, ke la lernantoj bone komprenu kiel funkcias la du-parta sistemo.

## Resumado

Esenca parto de instruado estas konstanta resumado de la jam lernita materialo - ne sufiĉas klarigi komplikan sistemon nur unu fojon! En la posta leciono, ni komune korektas la kvizon, kaj mi kaptas la okazon por samtempe demandi, kiel nomiĝas la loĝantoj de la koncernaj landoj.

Poste mi disdonas resumon de la antaŭa leciono, kiun la lernantoj tuj laŭtleĝos. Ĝi estas verkita per tre simplaj vortoj, kiujn ili jam lernis en pli fruaj lecionoj (eventuale necesos aparte instrui la vorton *anstataŭi*). La resumo aperas en p. 78-81 de ĉi tiu libro. Elŝutebla versio taŭga por multobligado aperas ankaŭ ĉe <http://www.edukado.net/lerniloteko/10433>.

## LANDONOMOJ EN ESPERANTO

### La baza sistemo

La sistemo de la landonomoj en Esperanto havas du partojn.

La unua parto:

<b>I</b>	<b>homo</b>	<b>lando</b>
	<b>---o</b>	<b>---ujo</b>
	ital-o	Ital-ujo
	franc-o	Franc-ujo
	german-o	German-ujo
	angl-o	Angl-ujo
	ĉin-o	Ĉin-ujo
	japan-o	Japan-ujo
	egipt-o	Egipt-ujo

Ĉi tie la radiko indikas la homon, kaj necesas aldoni la finaĵon *-ujo* por krei la landonomon.

La dua parto:

<b>II</b>	<b>lando</b>	<b>homo</b>
	<b>---o</b>	<b>---ano</b>
	Brazil-o	brazil-ano
	Uson-o	uson-ano
	Kolombi-o	kolombi-ano
	Pakistan-o	pakistan-ano
	Indonezi-o	indonezi-ano
	Kenj-o	kenj-ano
	Sud-Afrik-o	sud-afrik-ano

Ĉi tie la radiko indikas la landon, kaj necesas aldoni la finaĵon *-ano* por krei la nomon de la homo, kiu loĝas tie.

## La finaĵo *-lando*

Sed estas problemo! Oni povas uzi la finaĵon *-lando* anstataŭ *-ujo*. Rigardu:

<b>I</b>	<b>homo</b>	<b>lando</b>
	<b>---o</b>	<b>---lando (---ujo)</b>
	pol-o	Pol-lando (Pol-ujo)
	svis-o	Svis-lando (Svis-ujo)
	skot-o	Skot-lando (Skot-ujo)
	finn-o	Finn-lando (Finn-ujo)
	dan-o	Dan-lando (Dan-ujo)

Teorie oni povus aldoni la finaĵon *-lando* al ĉiuj landonomoj anstataŭ *-ujo* (ekz. German-lando, Sved-lando ktp.) En la praktiko oni tre malofte aŭdas tiajn formojn.

Tiuj nomoj apartenas al la parto I de la sistemo.

La radiko indikas la homon, kaj necesas aldoni la finaĵon *-ujo* aŭ *-lando* por krei la landonomon.

Sed rigardu la subajn ekzemplojn:

<b>II</b>	<b>lando</b>	<b>homo</b>
	<b>---o</b>	<b>---ano</b>
	Irlando-o	irland-ano
	Island-o	island-ano
	Nederland-o	nederland-ano

Tiuj nomoj apartenas al la parto II de la sistemo.

La radiko indikas la landon, kaj necesas aldoni la finaĵon *-ano* por krei la nomon de la homo, kiu loĝas tie.

*-lando* ne estas finaĵo, sed estas esenca parto de la radiko, kiun oni ne povas forigi.

## *-ujo/-io*

Multaj homoj preferas uzi la finaĵon *-io* anstataŭ *-ujo*. Ekzemple:

<b>I</b>	<b>homo</b>	<b>lando</b>
	<b>---o</b>	<b>---io (---ujo)</b>
	ital-o	Ital-io (-ujo)
	franc-o	Franc-io (-ujo)
	german-o	German-io (-ujo)
	angl-o	Angl-io (-ujo)
	ĉin-o	Ĉin-io (-ujo)
	japan-o	Japan-io (-ujo)
	egipt-o	Egipt-io (-ujo)

Sed rigardu la subajn ekzemplojn:

<b>II</b>	<b>lando</b>	<b>homo</b>
	<b>---o</b>	<b>---ano</b>
	Kolombi-o	kolombi-ano
	Ĉili-o	ĉili-ano
	Siri-o	siri-ano
	Indonezi-o	indonezi-ano
	Aŭstrali-o	aŭstrali-ano
	Niĝeri-o	niĝeri-ano
	Liberi-o	liberi-ano

Tiuj ekzemploj apartenas al la parto II de la sistemo. La radiko indikas la landon, kaj necesas aldoni la finaĵon *-ano* por krei la nomon de la homo, kiu loĝas tie.

*-i-* ne estas parto de la finaĵo. Ĝi estas esenca parto de la radiko, kiun oni ne povas forigi.

En tiuj ekzemploj, *-io* **ne** anstataŭas la finaĵon *-ujo*. Oni **ne** povas diri “Kolombujo”, “Ĉilujo” ktp.

## Landoj kun *-(i)stano*

En kelkaj landonomoj, pro influo de la naciaj lingvoj, multaj homoj uzas la finaĵon *-stano* aŭ *-istano* anstataŭ *-ujo*. Tiuj nomoj ĝenerale apartenas al la parto I de la sistemo.

### homo

---o

afgan-o

kazaĥ-o

kirgiz-o

kurd-o

taĝik-o

turkmen-o

uzbek-o

### lando

---ujo/ ---(i)stano

Afgan-ujo / Afgan-istano

Kazaĥ-ujo / Kazaĥ-stano

Kirgiz-ujo / Kirgiz-istano

Kurd-ujo / Kurd-istano

Taĝik-ujo / Taĝik-istano

Turkmen-ujo / Turkmen-istano

Uzbek-ujo / Uzbek-istano

Sed estas unu tia landonomo, kiu apartenas al la parto II de la sistemo (ĉar ne ekzistas popolo, kiu nomiĝas “pakoj”). La finaĵo *-istano* estas esenca parto de la radiko, kiun oni ne povas forigi:

### II lando

---o

Pakistan-o

### homo

---ano

pakistan-ano

# Mi havis sonĝon

Luiĝi Rokamoriĉe

En la jaro 1902 nia Majstro L. L. Zamenhof respondis al s-ro Paul Fruictier el Parizo, kiu sendis al li leteron pri landnomoj, jene:

Kara sinjoro! Via opinio pri la nomoj geografiaj estas tute ĝusta, kaj vian ideon pri la uzado de la aldono “lando” mi plene aprobas. Laŭ la reguloj de Esperanto oni povas tute bone diri Franclando, Angllando, Kanadlando, Perulando k.t.p.<sup>29</sup>

Mi havis nun sendorman sonĝon: antaŭ miaj okuloj ekaperas bela mondmapo, kaj ĉiu lando havas flagon; sur ĉiuj flagoj estas la nomo de la lando, kaj sur flirtantaj flagoj mi vidas la nomojn de: Albanlando, Belglando, Brazillando, Ĉinlando, Hispanlando, Kublando, Filipinlando, Germanlando, Itallando, Meksiklando, Ruslando, Vjetnamlando, k.t.p., dum en la aero gaje kaj ŝerce dancas inter la flagoj ĉiuj tiurilataj *-ujo* kaj *-io* kiel aŭtunaj folioj.

---

<sup>29</sup> Zamenhof, L.L.: *Lingvaj Respondoj. Konsiloj kaj Opinioj pri Esperanto*. Redaktis G[aston] Waringhien. 6a eldono, Esperantaj Francaj Eldonejoj, Marmande, 1962 [represo: Pro Esperanto, Vieno, 1995].



## Kiu estas pli facila?

Pluraj kontribuantoj al ĉi tiu libro klarigas, ke ili preferas la finaĵon *-ujo*, ĉar *-io* kaŭzas problemojn: la *-i-* povus aparteni foje al la radiko, foje al la finaĵo.

Eble ne ĉiuj legantoj tamen estas konvinkitaj, ke *-io* efektive estas pli malfacila. Por pruvi sian argumenton, Rudolf Fischer proponas jenan ekzercon, laŭ la modelo de la taskoj, kiujn oni kutime donas al lernantoj en lingvo-kursoj.

### *Derivu el la sekvaj landnomoj la nomon de la landano!*

<i>Hispanio</i>	.....
<i>Svisio</i>	.....
<i>Belgio</i>	.....
<i>Siberio</i>	.....
<i>Serbio</i>	.....
<i>Skandinavio</i>	.....
<i>Albanio</i>	.....
<i>Alĝerio</i>	.....
<i>Etiopio</i>	.....
<i>Indonezio</i>	.....
<i>Tanzanio</i>	.....
<i>Mongolio</i>	.....
<i>Moldavio</i>	.....
<i>Bolivio</i>	.....
<i>Haitio</i>	.....
<i>Aŭstralio</i>	.....

Malfacile, ĉu ne? Nun turnu la paĝon kaj provu la saman ekzercon kun la finaĵo *-ujo* anstataŭ *-io*.

***Derivu el la sekvaj landnomoj la nomon de la landano!***

<i>Hispanujo</i>	.....
<i>Svisujo</i>	.....
<i>Belgujo</i>	.....
<i>Siberio</i>	.....
<i>Serbujo</i>	.....
<i>Skandinavujo</i>	.....
<i>Albanujo</i>	.....
<i>Alĝerio</i>	.....
<i>Etiopujo</i>	.....
<i>Indonezio</i>	.....
<i>Tanzanio</i>	.....
<i>Mongolujo</i>	.....
<i>Moldavujo</i>	.....
<i>Bolivio</i>	.....
<i>Haitio</i>	.....
<i>Aŭstralio</i>	.....

La solvo troviĝas en p. 93.

Kiun el la du ekzercoj vi trovis pli facila?

## **Ujo- kaj io-formoj por la nomoj de regionoj**

**Ekzemplo: La nomoj de la federaciaj landoj en Germanujo**

**Rudolf Fischer**

Dum la nomoj de ŝtatoj plej ofte estas vaste konataj, la nomoj de regionoj, provincoj, ktp. estas malpli ofte uzataj, kaj tial iliaj formoj estas relative malstabilaj kaj necertaj. Ankaŭ por tiu nomgrupo multaj Esperantistoj inklinas senpripense enkonduki iun *io*-formon, egale, ĉu senchave aŭ ne. Kontraŭe mi rekomendas tion nur en tre specifaj okazoj, dum en aliaj *ujo*-formo estas pli praktika, ĉar oni tiam tuj povas derivi facile la nomon de la landano. En aliaj okazoj simpla *o*-formo estas lingve pli ekonomia, ĉar oni ŝparas unu silabon.

Kiel ekzemplon por tiuj diversaj grupoj de okazoj mi uzos tie ĉi la 16 federaciajn landojn de Germanujo. Unu el la problemoj estas, ke iliaj nomoj en la praktiko tre varias, ekzemple, ĉar por la t.n. “novaj” federaciaj landoj, t.e. tiuj de la teritorio de la iama Germana Demokratia Respubliko, la nomoj ankoraŭ ne enradikiĝis.

Mi komparis la uzon sur la Interretaj paĝoj de la landaj Esperanto-ligoj kun la unua eldono de la *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV, 1970), *La Nova Plena Ilustrita Vortaro* (NPIV, 2002) kaj *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch* (Granda Vortaro Esperanto-Germana) de Erich-Dieter Krause (1999). Kompreneble la “novaj federaciaj landoj” mankas en PIV kaj en pli fruaj vortaroj de Krause. Sed partoj de la nomoj ofte indikas pli malnovan landoparton (provincon, dukejon, ktp.), kaj ties nomo jes ja troviĝas en la pli malnovaj vortaroj. Ekzemple por kontroli la nunan landonomon *Meklenburgo-Antaŭpomerio* utilas serĉi en PIV sub *Meklenburg-* kaj *Pomer-*. Mi provas nun klasifiki la unuopajn fenomenojn kaj la koncernan nomproblemon laŭgrupe.

En la unua grupo la Esperanta formo estas simple la Germana nomo plus fina *-o*. Al tiu apartenas *Berlino*, *Bremeno*, *Hamburgo*

kaj (iom adaptita) *Sarlando*<sup>30</sup>. La unuaj tri ekzemploj samtempe nomas jen urbon, jen federacian landon; pro la identa teritorio ne necesas pernoma distingo.

La duan grupon konsistigas tiuj landoj, en kiuj ankaŭ ekzistas (teritorie ne-identaj) samnoma urbo (ofte la ĉef-urbo). Por tiuj paroj *urbo/lando* ekzistas kutimo krei varianton finiĝantan per *-io* kiel landonomon.<sup>31</sup> Vidu la ekzemplojn *Luksemburgo/Luksemburgio*, *Alĝero/Alĝerio*, ktp.<sup>32</sup> Tiu tre speciala kaj limigita uzo de *-io* estas akceptebla. Tiel oni venas al jenaj paroj de urbo kaj nom(part)o de federacia lando: *Badeno/Badenio*, *Brandenburgio/Brandenburgio*, *Meklenburgo/Meklenburgio*. Inter ili *Badenio* ne estas tiom konvinka, ĉar la koncerna urbo jam de pluraj jarcentoj nomiĝas *Baden-Baden* en la Germana, tiel ke la paro *Baden-Badeno/Badeno* ankaŭ taŭgus. Fakte ankaŭ la koncerna landa ligo de Germana Esperanto-Asocio nomas sin *Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo*.

La tria grupo montras la fenomenon, ke foje la *-i-* apartenas al la nomradiko, foje ne. Se ne, tiam la radiko nomas iujn landanojn, kies etna identigo nuntempe en Germanujo pli-malpli diskutblas; aliflanke lastatempe pro la (re)formiĝo de regionaj sin-identigoj tio eble pli gravas ol antaŭ jardekoj. Famaj pro tiu etna memkonscio estas la Bavaroj, tiel ke ĉiuj tri vortaroj indikas ambaŭ variantojn *Bavario/Bavarujo*. La koncerna landa ligo estas Bavara Esperanto-Ligo. Por unu federacia lando la vortaroj indikas eĉ tri formojn, nome *Hesujo*, *Hesio* kaj *Heslando*.

---

<sup>30</sup> La nomo venas de la rivero Saro (Germane: *Saar*). En PIV troviĝas ankoraŭ *Saaro* kaj *Saarlando*.

<sup>31</sup> Bedaŭrinde la naturalismanoj insistas pri plia konkurenca regulo: *Meksik-urbo / Meksiko*, do ke oni deiras de la landonomo kaj formas la urbonomon per kunmetaĵo kun *-urbo*, laŭ mi tute superflua komplikaĵo kaj misformo.

<sup>32</sup> Kvankam NPIV indikas por tiaj formoj sufikson *-i-*, kun malklara signifo, tiu vortanalizo estas erara, vidu ekz. la “a” en la paro *kamero – kamerao* kaj “l” en *speco – specio*. Enmeto de vokalo por ricevi sametiman varianton estas kutima metodo de Esperanta vortkreado; en ĉiu kazo la vokalo apartenas al la radiko kaj ne estas aparta vortstrukturero (sufikso).

Aliaj ekzemploj estas pli komplikaj. Ĉar la iama Pomerujo, kies orienta (“malantaŭa”) parto nun apartenas al Polujo, ne plu ekzistas, estas pli bone uzi por la okcidenta (“antaŭa”) parto ne plu la radikon *Pomer-*. Sekve unue taŭgas *Meklenburgio-Antaŭpomerio* (tamen kun malbelsona duobla *-io*).

Unuanime la tri vortaroj indikas nur *Turingio*, ne *Turingujo*, malgraŭ la landa ligo Turinga Esperanto-Asocio. Simile *Rejnlando-Vestfalia*, kvankam multaj Vestfaloj (la nomo venas de iama Saksa tribo) certe postulos, ke la *-i-* ne apartenu al la radiko. Fakte en fondodokumento el la jaro 1907 de la unua Esperanto-grupo en Münster oni trovas la nomon kiel “Esperanto-Societo Münster [Vestfalujo]”. Aliflanke la koncerna landa ligo nomas sin Rejnland-Vestfalia Esperanto-Ligo.<sup>33</sup>

Ne konsekvenca (kaj do kontraŭ grava interna principo de Esperanto) estas la landonomo *Ŝlesvig-Holstinio*. Origine temis pri du apartaj provincoj, krome ekzistas urbo Ŝlesvigo, tiel ke la landonomo devus esti *Ŝlesvigo-*. Inverse kial *Holstinio*, dum ne ekzistas urbo *Holstein*?

La Saksoj (iama ĝermana tribo) aperas en la nomo de tri federaciaj landoj: *Saksujo/-io*, *Malsupra Saksio* kaj *Saksio-Anhalto* (NPIV) (*Saks-Anhalto* laŭ Krause). En la lasta ekzemplo la varianto de Krause estas preferinda, ĉar pli mallonga kaj ĉar *Saks-Anhalto* ne estas kombino de du landaj nomoj kiel en *Ŝlesvig-Holstinio*. Sed kial ne ankaŭ *Malsupra Saksujo*? (Ĝuste tie la iamaj Saksoj loĝis!)

La lasta tipo de nomvarianteo estas, ke en la kunmetitaj nomoj de federacia lando la unua parto foje havas finan *-o*, foje ne. Tiel *Rejnlando-Palatinato* (NPIV), sed *Rejnland-Palatinato* (Krause). La koncerna membro-organizo de Germana Esperanto-Asocio nomas sin Rejnlando-Palatinata Esperanto-Ligo. Komparu kun *Nordrejn-Vestfalia* (nur la esprimo *Nordrejna-Vestfalia ŝtato* troviĝas en PIV). Analoge: *Meklenburgio-Antaŭpomerio* (NPIV), sed *Meklenburg-Antaŭpomerio* (Krause). *Badenio-Virtembergo* ne aperas en la vortaro de Krause, nur *Badenio* kaj *Virtembergo* (kun indiko de varianteo *Virtembergo*).

---

<sup>33</sup> La federacia lando tamen nomiĝas *Nordrejn-Vestfalujo*. *Nordrejn-* estas nomradiko, ĝi ne egalas al *norda Rejno*; tial la skribmaniero *Nord-Rejno* estas nemotivigita.

Resume mi diru jenon:

(1) Kvankam la paroj urbo/lando kun la *io*-formo por lando estas akcepteblaj, en la unua parto de kunmetita landonomo tiu *io*-formo estas superflua. Mi preferas la pli mallongajn formojn de Krause: *Meklenburg-...*, *Rejnland-...*, *Saks-* kaj *Ŝlesvig-*, analoge al *Nordrejn-*; sed tiam ankaŭ *Baden-*.

(2) Utilus ankaŭ uzo de *-uj-* (do forigo de *-i-* je la radikofino de la dua parto) en la nomoj *Nordrejn-Vestfalujo*, *Malsupra Saksujo*, *Ŝlesvig-Holstinujo kaj Turingujo*, tiel ke oni povas paroli pri *Vestfaloj* (Germane: *Westfalen*), *malsupraj Saksoj* (Germane: *Niedersachsen*), *Holstinoj* (Germane: *Holsteiner*) kaj *Turingoj* (Germane: *Thüringer*).

La formoj rekomendataj de mi por la nomoj de la federaciaj landoj en Germanujo aperas en la tabelo malsupre. Ĉar mi uzis laŭeble la *ujo*-formon, oni el tiuj nomoj povas tute regule derivi la nomon por la landanoj.

<b>Federaciaj landoj</b>	<b>Landanoj</b>
Baden-Virtembergo	Baden-Virtembergano
Bavarujo	Bavaro
Berlino	Berlinano
Brandenburgio	Brandenburgiano
Bremeno	Bremenano
Hamburgo	Hamburgano
Hesujo	Heso
Malsupra Saksujo	Malsupra-Sakso
Meklenburg-Antaŭpomerio	Meklenburg-Antaŭpomeriano
Nordrejn-Vestfalujo	Nordrejn-Vestfalo
Rejnland-Palatinato	Rejnland-Palatinatano
Saksujo	Sakso
Saks-Anhalto	Saks-Anhaltano
Sarlando	Sarlandano
Ŝlesvig-Holstinujo	Ŝlesvig-Holstino
Turingujo	Turingo

# Listo de landoj kaj landanoj

Kompilis Bertilo Wennergren

Tiu ĉi listo enhavas nomojn de ĉiuj sendependaj landoj kaj de kelkaj ne-sendependaj. Por kelkaj landoj menciigās pli ol unu nomformo, ĉar la uzado estas varia. En tiaj okazoj, en kiuj unu nomformo estas Fundamenta aŭ oficialigita, tamen ne menciigās aliaj variantoj, eĉ se ili estas praktike uzataj. En iaj okazoj sufiĉe ofta nomformo ne menciigās, ĉar la Akademio faris klaran rekomendon kontraŭ tiaspecaj formoj. Formoj kun *i*-sufikso anstataŭ *uj*-sufikso ne aperas en la listo. *i*-emuloj povas ilin mem facile krei el la *uj*-formoj.

## Afriko: afrikanoj

Alĝerio: *alĝerianoj*

Angolo: *angolanoj*

Benino: *beninanoj*

Bocvano: *bocvananoj*

Burkino: *burkinanoj*

Burundo: *burundanoj*

Centr-Afriko, Centr-Afrika

Respubliko: *centr-afrikanoj*,

*anoj de Centr-Afriko, anoj*

*de Centr-Afrika Respubliko*

Ĉado: *ĉadanoj*

Ebur-Bordo, Ebura Bordo:

*ebur[a]-bordanoj*

Egiptujo, Egipto: *egiptoj*,

*egiptanoj*

Eritreo: *eritreanoj*

Etiopujo: *etiopoj*

Gabono: *gabonanoj*

Gambio: *gambianoj*

Ganao: *ganaanoj*

Gvineo: *gvineanoj*

Gvineo-Bisaŭo: *gvineo-*  
*bisaŭanoj*

Gvineo Ekvatora: *anoj de*  
*Gvineo Ekvatora*

Ĝibutio: *ĝibutianoj*

Kaboverdo: *kaboverdanoj*

Kameruno: *kamerunanoj*

Kenjo: *kenjanoj*

Komoroj: *komoranoj*

Kongo, Kongolo, Demokratia

Respubliko Kong[ol]o,

Kong[ol]o Kinŝasa: *konganoj*,

*kongolanoj, anoj de*

*Demokratia Respubliko*

*Kong[ol]o, anoj de Kong[ol]o*

*Kinŝasa*

Kongo, Kongolo, Respubliko

Kong[ol]o, Kong[ol]o

Brazavila: *konganoj*,

*kongolanoj, anoj de*

*Respubliko Kong[ol]o, anoj*

*de Kong[ol]o Brazavila*

Lesoto: *lesotanoj*  
Liberio: *liberianoj*  
Libio: *libianoj*  
Madagaskaro: *madagaskaranoj*  
Malavio: *malavianoj*  
Malio: *malianoj*  
Maroko: *marokanoj*  
Maŭricio: *maŭricianoj*  
Maŭritanujo: *maŭritanoj*  
Mozambiko: *mozambikanoj*  
Namibio: *namibianoj*  
Niĝerio: *niĝerianoj*  
Niĝero, Niĝerlando: *niĝeranoj*,  
*niĝerlandanoj*  
Okcidenta Saharo: *anoj de*  
*Okcidenta Saharo*  
Ruando: *ruandanoj*

Santomeo kaj Principeo,  
Saotomeo kaj Principeo:  
*santome-kaj-principe-anoj*,  
*saotome-kaj-principe-anoj*,  
*santomeanoj*, *saotomeanoj*,  
*principeanoj*  
Sejŝeloj: *sejŝelanoj*  
Senegalo: *senegalanoj*  
Sieraleono: *sieraleonanoj*  
Somalujo: *somaloj*  
Sud-Afriko: *sud-afrikanoj*  
Sudano: *sudananoj*  
Svazilando, Svaziujo: *svazioj*  
Tanzanio: *tanzanianoj*  
Togo, Togolando, Togolo:  
*toganoj*, *togolandanoj*,  
*togolanoj*  
Tunizio: *tunizianoj*  
Ugando: *ugandanoj*  
Zambio: *zambianoj*  
Zimbabvo: *zimbabvanoj*

### **Ameriko: *amerikanoj***

Antigvo kaj Barbudo: *anoj de*  
*Antigvo kaj Barbudo*,  
*antigvanoj*, *barbudanoj*  
Argentino: *argentinanoj*  
Bahamoj: *bahamanoj*  
Barbado: *barbadanoj*  
Belizo: *belizanoj*  
Bolivio: *bolivianoj*  
Brazilo: *brazilanoj*  
Ĉilio: *ĉilianoj*  
Domingo, Dominikana  
Respubliko: *dominganoj*, *anoj*  
*de Dominikana Respubliko*  
Dominiko: *dominikanoj*

Ekvadoro: *ekvadoranoj*  
Grenado: *grenadanoj*  
Gujano: *gujananoj*  
Gronlando, Groenlando:  
*gronlandanoj*, *groenlandanoj*  
Gvatemalo: *gvatemalanoj*  
Haitio: *haitianoj*  
Honduro: *honduranoj*  
Jamajko: *jamajkanoj*  
Kanado: *kanadanoj*  
Kolombio: *kolombianoj*  
Kostariko: *kostarikanoj*  
Kubo: *kubanoj*  
Meksiko: *meksikanoj*



Nikaragvo: *nikaragvanoj*  
Panamo: *panamanoj*  
Paragvajo: *paragvajanoj*  
Peruo: *peruanoj*  
Puertoriko, Portoriko:  
*puertorikanoj, portorikanoj*  
Salvadoro: *salvadoranoj*  
Sankta Kristoforo kaj Neviso,  
Sent-Kristofo kaj Neviso:  
*anoj de Sankta Kristoforo*  
*kaj Neviso, anoj de*  
*Sent-Kristofo kaj Neviso,*  
*sankta-kristoforanoj,*  
*sent-kristofanoj, nevisanoj*  
Sankta Lucio, Sent-Lucio:  
*sankta-lucianoj, sent-*  
*lucianoj*

Sankta Vincento kaj  
Grenadinoj, Sent-Vincento  
kaj Grenadinoj: *anoj de*  
*Sankta Vincento kaj*  
*Grenadinoj, anoj de Sent-*  
*Vincento kaj Grenadinoj,*  
*sankta-vincentanoj,*  
*grenadinanoj*  
Surinamo: *surinamanoj*  
Trinidado kaj Tobago: *anoj de*  
*Trinidado kaj Tobago,*  
*trinidadanoj, tobaganoj*  
Urugvajo: *urugvajanoj*  
Usono: *usonanoj*  
Venezuelo: *venezuelanoj*

### **Azio: azianoj**

Afganujo, Afganistano:  
*afganoj, afganistananoj*  
Armenujo: *armenoj*  
Azerbajĝano: *azerbajĝanoj*  
Bangladeŝo: *bangladeŝanoj*  
Barato, Hindujo: *baratanoj,*  
*hindoj*  
Barejno: *barejnanoj*  
Bengalujo: *bengaloj*  
Birmo: *birmano*  
Brunejo: *brunejanoj*  
Butano: *butananoj*  
Ĉinujo: *ĉinoj*  
Filipinoj: *filipinanoj*  
Hindujo, Barato: *hindoj,*  
*baratanoj*  
Honkongo: *honkonganoj*

Indonezio: *indonezianoj*  
Irako: *irakanoj*  
Irano: *irananoj*  
Israelo: *israelanoj*  
Japanujo: *japanoj*  
Jemeno: *jemenanoj*  
Jordanio: *jordanianoj*  
Kamboĝo: *kamboĝanoj*  
Kartvelujo: *kartveloj*  
Kataro: *kataranoj*  
Kazaĥujo, Kazaĥstano:  
*kazaĥoj, kazaĥstananoj*  
Kipro: *kipranoj*  
Kirgizujo, Kirgizistano:  
*kirgizoj, kirgizistananoj*  
Kurdujo, Kurdistano: *kurdoj,*  
*kurdistananoj*

Kuvajto: *kuvajtanoj*  
Laoso: *laosanoj*  
Libano: *libananoj*  
Makao: *makaanoj*  
Malajzio: *malajzianoj*  
Maldivoj: *maldivanoj*  
Mongolujo: *mongoloj*  
Nepalo: *nepalanoj*  
Nord-Koreujo, Nord-Koreo,  
Demokratia Popola  
Respubliko Kore[uj]o: *nord-  
koreoj, nord-koreanoj, anoj  
de Demokratia Popola  
Respubliko Kore[uj]o*  
Rusujo: *rusoj*  
Omano: *omananoj*  
Pakistano: *pakistananoj*  
Palestino: *palestinanoj*  
Saŭda Arabujo, Saud-Arabujo:  
*saŭd-araboj, saud-araboj*  
Siberio: *siberianoj*  
Singapuro: *singapuranoj*

## **Eŭropo: eŭropanoj**

Albanujo: *albanoj*  
Andoro: *andoranoj*  
Anglujo: *angloj*  
Aŭstrujo: *aŭstroj*  
Belgujo: *belgoj*  
Belorusujo, Bjelorusujo,  
Belarusujo: *belorusoj,  
bjelorusoj, belarusoj*  
Bosnujo (kaj Hercegovino):  
*bosnoj, anoj de Bosnujo kaj  
Hercegovino*

Sirio: *sirianoj*  
Srilanko: *srilankanoj*  
Sud-Koreujo, Sud-Koreo, Korea  
Respubliko: *sud-koreoj, sud-  
koreanoj, anoj de Korea  
Respubliko*  
Taĝikujo, Taĝikistano: *taĝikoj,  
taĝikistananoj*  
Tajlando, Tajujo: *tajoj*  
Tajvano: *tajvananoj*  
Tibeto: *tibetanoj*  
Turkmenujo, Turkmenistano:  
*turkmenoj, turkmenistananoj*  
Turkujo: *turkoj*  
Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj:  
*anoj de Unuiĝintaj Arabaj  
Emirlandoj, UAE-anoj*  
Uzbekujo, Uzbekistano:  
*uzbekoj, uzbekistananoj*  
Vjetnamujo, Vjetnamo:  
*vjetnamoj, vjetnamanoj*

Britujo: *britoj*  
Bulgarujo: *bulgaroj*  
Ĉeĥujo: *ĉeĥoj*  
Danujo, Danlando: *danoj*  
Estonujo: *estonoj*  
Eŭskujo: *eŭskoj*  
Ferooj: *feroanoj*  
Finnlando, Finnujo: *finnoj*  
Francujo: *francoj*  
Germanujo: *germano*  
Grekujo, Greklando: *grekoj*

Hispanujo: *hispanoj*  
Hungarujo: *hungaroj*  
Irlando: *irlandanoj*  
Islando: *islandanoj*  
Italujo: *italoj*  
Katalunujo: *katalunoj*  
Kimrujo: *kimroj*  
Kroatujo: *kroatoj*  
Latvujo: *latvoj*  
Liĥtenŝtejno: *liĥtenŝtejnanoj*  
Litovujo: *litovoj*  
Luksemburgo: *luksemburganoj*  
Makedonujo: *makedonoj*  
Malto: *maltanoj*  
Moldavujo: *moldavoj*  
Monako: *monakanoj*  
Montenegro: *montenegranoj*  
Nederlando: *nederlandanoj*

Norvegujo: *norvegoj*  
Pollando, Polujo: *poloj*  
Portugalujo: *portugaloj*  
Rumanujo: *rumanoj*  
Rusujo: *rusoj*  
Sanmarino: *sanmarinanoj*  
Serbujo: *serboj*  
Skandinavujo: *skandinavoj*  
Skotlando, Skotujo: *skotoj*  
Slovakujo: *slovakoj*  
Slovenujo: *slovenoj*  
Svedujo: *svedoj*  
Svislando, Svisujo: *svisoj*  
Turkujo: *turkoj*  
Ukrainujo, Ukraino: *ukrainoj, ukrainanoj*  
Vatikano: *vatikananoj*

### **Oceanio: oceanianoj**

Aŭstralio: *aŭstralianoj*  
Mikronezio: *mikronezianoj*  
Fiĝioj, Fiĝio: *fiĝianoj*  
Kiribato: *kiribatanoj*  
Marŝaloj: *marŝalanoj*  
Nauro: *nauranoj*  
Nov-Zelando: *nov-zelandanoj*  
Palaŭo: *palaŭanoj*

Papuo-Nov-Gvineo: *papuo-nov-gvineanoj, papuanoj, nov-gvineanoj*  
Polinezio: *polinezianoj*  
Salomonoj: *salomonanoj*  
Samoo: *samoanoj*  
Tongo: *tonganoj*  
Tuvalo: *tuvalanoj*  
Vanuatuo: *vanuatuanoj*

### **Solvo al la ekzerco en p. 83:**

Hispano, Sviso, Belgo, Siberiano, Serbo, Skandinavo, Albano, Alĝeriano, Etiopo, Indoneziano, Tanzaniano, Mongolo, Moldavo, Boliviano, Haitiano, Aŭstraliano.

## Promeso

Ofte oni aŭdas komentojn de la speco: “Mi preferus uzi *-ujo*; ĝi estas pli simpla, pli logika. Sed bedaŭrinde ĉiuj nun diras *-io*.”

Ĉu vi memoras la promesslipon, kiun Zamenhof aldonis al la Unua Libro?

<p><b>Nom,o:</b></p>  <p><b>Adres,o:</b></p>	<p><b>Promes,o.</b></p> <p>Mi, sub,skrib,it,a, promes,as el,lern,i la propon,it,a,n de d-r,o Esperanto lingv,o,n in- ter,naci,a,n, se est,os montr,it,a, ke dek mi- lion,o,j person,o,j don,as publik,e tia,n sam,a,n promes,o,n.</p> <p><i>Sub,skrib,o:</i></p>
--	--

Bonŝance la legantoj plejparte ignoris tiun promesslipon, ĉar se oni atendus ĝis dek milionoj da homoj konsentis lerni Esperanton, ni atendus ankoraŭ nun.

Do, ĉu ni aldonu al ĉi tiu libro promesslipon pri uzo de *-ujo*? Ni estu tamen iom pli modestaj pri niaj esperoj ol estis Zamenhof.

**Nomo:**

**Adreso:**

### **Promeso**

Mi, subskribita, promesas ekuzi la finaĵon *-ujo* en landonomoj, se estos montrita, ke kvin mil personoj donis publike tian saman promeson.

*Subskribo:*

Aŭdacu, same kiel aŭdacis la unuaj lernantoj de Esperanto! Se vi opinias, ke estas bona ideo uzi *-ujo*, ne atendu la aliajn 4999 sampensulojn, sed ekuzu ĝin tuj!

Ni tamen havas avantaĝon, kiun Zamenhof ne havis. Se vi decidus ekuzi, aŭ jam uzas, la finaĵon *-ujo* en landonomoj, rigardu en Interreto ĉe [www.bonalingvo.it/promesoj](http://www.bonalingvo.it/promesoj). Tie vi povos vidi, kiuj jam uzas *-ujo*, kaj eventuale mem aldoni vian nomon al la listo. Ĉu la listo ŝajnas al vi ankoraŭ tro mallonga? Do, ne hezitu, sed helpu longigi ĝin!

Se vi ne kutimas uzi Interreton, vi povas kompreneble skribi per ordinara poŝto, petante ke oni aldonu vian nomon al la listo. Jen la adreso:

Anna Lowenstein  
Via del Castello 1  
00036 Palestrina  
Italujo.

